***Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503 dato 15/02/2013 de laJuĝejo de Tirana***



***Shoqata Esperantiste Shqiptare është e njohur ligjërisht sipas vendimit nr 3503 datë 15/02/2013 të Gjykatës së Tiranës***

Retpaĝo- Faqja në internet: http://esperantoshqipria. weebly. com/index. html aŭ www. esperanto. net/al

Diskutlisto- lista e diskutimit në internet: albanajesperantistoj@yahoogroups. com

# BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO - INSTITUTO

## Buletini i Institutit Shqiptar të Esperantos

**Nr. 130, aprilo- prill 2017**

### Niaj albanaj proverboj - Proverbat tona shqiptare

**Gjarpëri ecën dhe fshin gjurmët me bisht.** --*Korçë*

La serpento irante forviŝas siajn spurojn per hvosto

**Gjithsecili në punën e tij është zot.**

Ĉiu estas mastro en sia laboro

**Gjykon puna, s'gjykon guna.** --*Librazhd*

La laboro juĝas, ne la surtuto

**Hekuri sa punohet, aq zbukurohet.** --*Vlorë*

Ju pli la fero batiĝas des pli ĝi plibeliĝas.

**I mjeri ai që s'mendon për pleqëri.** --*Shkodër*

Mizerulo estas tiu ne pensanta pri la maljunaĝo

**I riu ka fuqi, plaku mëncuri.**

La junulo estas forta, la maljunulo estas saĝa

Ni kaj UEA, AIS, ILEI

Afrika esperantista agado

Esperanto en lernejoj

Staĝio por instruistoj

Prelego pri Esperanto

Prelego en Esperanto

Esperanto estis la "svatisto" por mia reedziniĝo

Vizito de fremdaj esperantistoj

Esperanto kaj abiturientoj

Renkontiĝo kun esperantistoj de Kubo

Niaj kotizoj

Gramatiko

Esperanto en bildoj

Proponoj

Internacia tago de la gepatra lingvo

**Nia propagando**

El Brazilo, Hungario, Ĉilio

**Niaj leteroj**

El Brazilo, Kubo, Ĉilio, Britio, Francio, Italio ka

**Informaĵoj**

La Laŭzana Esperanto-Societo

Katalogo pri profesiistoj

*ALTERNATIVO POR IPERNITY..*

Revuo Kontakto

Mesaĝo de Irina Bokova

NOVA REDAKTORO-PARO POR LA REVUO "ESPERANTO"

Revuo PENSEO kaj rakonto de Adil Olluri

**Artikoloj**

La nocio "KOMB", la antaŭhistoria "pasporto" de la arbroj

Totemo 2500 jara

INTERNACIA TAGO DE LA VIRINO

Lingvo por idealistoj

**Beletraĵoj**

Rakonto de Bajram Karabolli

Anekdotoj kaj humoraĵoj

**Matematiko**

Solvu la ekvaciojn

**<u>Ni kaj UEA, AIS, ILEI</u>**

- **Afrika esperantista agado**

- Post kongreso en Tanzanio en decembro 2016 Stefan MACGILL raportis nomante la kongreson, la sesa Afrika Kongreso de Esperanto de UEA. Tiam demando iris al li, ke li diru kiam okazis la unua afrika kongreso de Esperanto de UEA kaj chu ekzistas ankau amerika kongreso de UEA, azia kongreso de UEA, australia kongreso de UEA, ktp. Tial li respondis, ke li petos de afrika komisiono de UEA, ke ghi kolektu la informojn por respondi la demandon. Stefan MACGILL jhus dissendis tekston pri tiuj kongresoj. Intertempe ankau Osmo BULLER reagis por pruvi, ke afrika kongreso de Esperanto estas Afrika Kongreso de Esperanto de UEA. Necesas iomete tralerni tiujn tekstojn por vidi chu efektive ekzistas afrika kongreso de Esperanto de UEA.
(daŭrigita....disputo)
GBEGLO Koffi

- **Afrika Esperanto- Kongreso tra fotoj**

























- **Esperanto en lernejoj**

Ĉi printempo komenciĝis en Albanio Kaj Kosovo kun du retaj lernokursoj: unu en Tirana ĉe la gimnazio "Sami Frashëri" kaj la alia en la gimnazio de Ferizaj de Kosovo. Pro tio ni dankas al ties instruistoj respektive Aida Nova kaj Hyzri Salihu.

Nehat Sokoli

- En Francio

Mireille Grossjan
Esperanto en lernejoj en Francio: eblas! Kaj tio ekzistas jam nun en pluraj lernejoj. Por la elementaj lernejoj estas liberigitaj tri horoj semajne por kromaktivaĵoj. Povas esti sporto, teatro, malkovro de genealogio...aŭ enkonduko al lingvoj, ekzemple al Esperanto.

Tute ne temas pri tio, ke oni faru veran kurson al la infanoj, sed ke ili malkovru en luda maniero la lingvon, ke ili havu plezuron ĝin lerni, kaj ke ili restu kun agrablaj memoraĵoj pri Esperanto. La aliroj estas diversaj, la organizado ankaŭ, multaj pri-esperantaj aktivaĵoj eblas kadre de TAP. Danke al la strebo de Esperanto-parolantoj la lingvo sukcesis eniri per ne-rekta vojo.

Kial vi ne provu la samon? La ebloj estas multnombraj. Imagu, kiom da elementaj lernejoj estas en Francio...

Kaj por prepari vin al tio, baldaŭ denove okazos en Kvinpetalo (Bouresse, Francio):

- **Nova pedagogia staĝo, 10a-14a de aprilo**

Katalin Kovats, redaktoro de edukado.net kaj sperta trejnisto de Esperanto-instruistoj gvidos 5-tagan seminarion celantan pripensi kaj praktike prepari intervenojn enkadre de TAP/NAP en la elementaj lernejoj, kaj atelierojn en gimnazioj kaj liceoj.

Por plene profiti el la seminaria laboro necesas, ke la partoprenantoj estu je minimume B2-nivelo en la lingvo.

Similtema seminario jam okazis en oktobro 2016 (vidu raporton prie). Tial ni atendas kaj la partoprenintojn kaj novajn kandidatojn por plivastigi la laborkomunumon, kies kerno jam nun kunagadas en speciala forumo ĉeedukado.net.

La detaloj pri la kurso troveblas ĉi tie: http://edukado.net/kursejo?kid=26600
Por pliaj demandoj pri aliĝo kaj kondiĉoj, bonvolu turni vin al Kvinpetalo: informoj@kvinpetalo.org

Ne maltrafu la okazon! Ankaŭ ĉi foje la staĝo okazas dank'al subvencio de Klubo 2000 de Espéranto-France.

Bonvenon en Kvinpetalo! Claude Nourmont, KVINPETALO Esperanto-Centro

Akceptejo kaj poŝta adreso: 4 rue du Bureau FR-86410 BOURESSE Pri teknikaj detaloj, vidu la retejon de Kvinpetalohttp://www.kvinpetalo.org/ Telefono : (+) 33 (0) 549 034 314 aŭ se ne respondas: (+) 33 (0) 6 07 31 67 81

- **Prelego pri Esperanto en la gimnazio "Sami Frashëri" de Tirana**

La 2-an de marto okazis prelego pri Esperanto en la aŭlo de la gimnazio "Sami Frashëri" de la ĉefurbo Tirana. Ĉeestis ĝin ĉirkaŭ 70 abiturientoj kaj iliaj

instruistojn, inkluzivee de lernejestriono s-ro Teuda Dobi. Ĉeestis same la aŭtoro de la la libro tradukita al Esperanto s-ro Bedri Alimehmeti.
Post panormamo pri la lingvo ĝenerale kaj ties disvastiĝo enmonden kaj enlanden, oni eksplikis la ties ĉefaj facilecoj per ekzemploj. Sekvis pluraj demandoj kaj pluraj petoj por partopreni retan kurson.
Shaban Hasani





- Johan Derks : **Ĉu la elmigrado detruos la Eŭropan Union?** Ĉula enmigradokaŭzosla disfalonde Eŭ

Angela Merkel: *Ni plenumos tion*




La aŭlo

Angela Merkel:
"Wirschaffen das!"
Ni plenumos tion!

Enhavo
Migrado en la homa historio, miksado de etnoj.
Viktimoj kaj rifuĝintojkaŭze de la Dua Mondmilito.
La ekesto kaj kresko de Eŭropa Unio.
Bildoj pri la rifuĝintoj al Eŭropo en 2015


Kradoj en 2012 -2018, UNHCR
La interkonsento de Dublin suspendita
Eŭropa Unio: kvar ne-negoceblaj liberecoj
Etnismo aŭ Civitaneco, kiun politikistoj alvokos?

Puraj Albanoj? Puraj Nederlandanoj?

Origine la homoj estis nomadoj kaj niaj pragepatroj venas el tre diversaj partoj de la mondo. La tero apartenis al ĉiu. (idealo de Thomas Hobbes)

Nur post invento de agrikulturo kaj ceramiko homoj komencis konstrui permanentajn domojn. Poste venis la ideo de proprieteco de tero. Ŝtatoj interbatalas pri teritorio.


Kio donas identecon al la individuo: la aparteneco al popolo aŭ la loĝloko (ŝtato)? (diferenco inter etneco kaj civitaneco)




**Disvastigo de Neolitiko (agrikulturo kaj ceramiko) el Meza Oriento kaj Anatolio tra Grekujo kaj Balkanio al cetera Eŭropo**

(Multaj setlejoj restis ekzistantaj poste.)

Jussen: propra laboraĵo: https://nl.wikipedia.org/wiki/Neolithische_revolutie#/media/File:Verspreiding_Neolithicum_naar_Europa.jpg




**Kio estas la utilo de la ŝtato?**

La nederlanda ŝtato parte protektas min.

Mi pagas impostojn parte al Nederlando kaj parte al Serbujo.

La serba polico kontrolas kaj serba justico juĝas min.

Ĉiu homo havas la rajton je aparteno al ŝtato.

Kategorioj de delokitaj "personoj" en 2015

**21,3**milionoj da homoj estis rifuĝintoj.

(16,1 miln sub UNHCR kaj 5,2 miln da Palestinanoj sub UNRWA)

**3,2** azilpetantoj atendas decidon (ekz. por scii ĉu la ŝtato konsideras ilin ekonomiaj migrantoj aŭ rifuĝintoj de violento kaj minaco)

**10** miln da homoj estas senŝtataj (neniu protektas ilin), sed laŭ la ŝtataj raportoj nur 3,7 miln!

**40,8**miln da personoj perdis/forlasis sian domon, sed resti en sia lando, sume en la mondo estas

**75,3**miln da "delokitaj personoj".

La dua mondmilito (MM2)

MM2 kostis la vivon al **inter 71 kaj 85**miln da homoj.

El ili proksimume **30** miln estis **civiluloj mortigitaj pro bataloj**.

La nazioj kaj aliancanoj sisteme mortigis **11**miln da Judoj (**5,9**), Slavoj(**4,8**), Romaoj (**0,16**), samseksemuloj, handikapuloj kaj grupoj kun internaciaj kontaktoj.
Post MM2 **inter 11 kaj 20** miln da homoj (krom Germanoj) estis“delokitaj”, inter alie **pli ol 11**miln da sklavaj laboristoj en Germanujo. La intenco estis, ke ĉiuj delokitaj reiru plejbaldaŭ al siaj landoj de antaŭ la milito, sed ofte tio ne eblis, ĉar
a) oni timis persekutadon tie,
b) ilia origina loĝloko nun estis en alia lando, ĉar la landlimoj ŝanĝiĝis.
c) ankaŭ multaj estis tro malsanaj, maljunaj au deprimitaj. Estis tiuj kiuj preferis mortigi sin.
En 1951 estis starigita UNHCR por krei futuron al la restintaj “delokitaj”. Belgujo, Britujo, Kanado, Aŭstralio, Francujo, Usono kaj aliaj landoj akceptis parton de ili kiel enmigrantojn. Por tiuj kiuj restis en Germanujo kaj Aŭstrujo UNHCR konstruigis tie domojn kaj en 1959 (post 14 jaroj!) fermiĝis la lasta barakaro en Germanujo.
UNHCR = () *ĝintajNaciojAlta Komisaropriĝintoj*(vidudiapon16)

EŭropaUnio

**= EŭropaKomunumo por Karbono kaj Ŝtalo (’52-’67)**
**EKKŜ + (‘73) + (’81) + (‘86) = Eŭropa Ekonomia Komunumo (‘67-’93)**
**EEK + (‘95) + (2004)**
**= la tri pilieroj de Eŭropa Unio: (atomenergio+ ekonomio) + (polico+ justico) + (sekureco) (1993-2004)**
**la tri pilieroj de EU + (2007) = EŭropaUnio(2004-2009; EU + (2013) = EU (28 membroj)**
**La prezidantoj de Francujo (Mitterrand) kaj de Germanujo (Kohl) manpremas je 22-9-1982 66 jarojn post la batalo ĉe Verdun (feb –dec 1916), en kiu pereis inter700.000 kaj 800.000 francaj kaj germanaj soldatoj. Dume la du naciajhimnoj sonas. Tio fariĝis simbolo de la fino de (okcident-) eŭropaj militoj.**
**Karbono+ Ŝtalo faras armilojn.**
**EKKŜ estas garantio por paco.**
**El tiu sento kreskis Eŭropa Unio.**
**Ne ĉiuj landoj de la Schengen-zono[Ŝengen] estas membroj de EU (Islando, Norvegujo). Britujo ne apartenas al Schengen-zono.**
**Estas19 membroj de Eŭrozono.**

albanaj rifuĝantoj

8-8-1991: ŜipoVloraatingasla italanhavenonBari


VLORA
DURRES










477528178






7-ми Ноември
ОПШТИНА ГЕВГЕЛИЈА
ОПШТИНА БОГДАНЦИ
Стојаково
Stojakovo
Вардарски Рид
Vardarski Rid
Gevgelija
Богородица
Bogoroditsa
Makedonŭjo
Коњска Река
Река Вардар
Македонија
Τσολιάδες
Tsoliades
Ειδομένη
Idomeni
Ελλάδα
Grekŭjo
Χαμηλό
Chamilo
Evzonoi


H.
R.
Sl.
K.
B.
50430 el Kosovo, Afganŭjo kaj Sirio
S.
Bu.
Mo.
Ko.
M.
T.
48015 el Sirio, Afganŭjo kaj Pakistano
A.
G.
2838 el Albanŭjo
4170 el Sirio k.a.
47008 el Eritreo, Somalujo k.a. subsaharaj landoj


ПОЛИЦИЈА







**Artikolo14**
(1) Ĉiu rajtas peti kaj ricevi en aliaj landoj azilon por protekto kontraŭ persekutado.
(2) Tiu rajto ne estas petebla en okazoj de persekutado malfalse sekvantaj de ne-politikaj krimoj

*Konvencio pri la statuso de rifuĝintoj kaj senpatrujuloj, 1951* →

La rajto je protekto kontraŭ persekutado estas senutila, se la petata lando ne rekonas sian humanan devon serioze trakti tian peton. La *Konvencio pri la statuso de rifuĝintoj kaj senpatrujuloj* reguligis la rekonon**.** 166 landoj en la mondo poste subskribis la Konvencion.
Artikolo14 pri la libereco peti azilon en alia lando ne difinas en kiu lando tio okazu. Ju pli evoluinta la lando, des pli alloga por la fuĝanto tie peti azilon. Por preventi grandan premon de azilpetantoj sur la riĉaj–ofte jam dense loĝataj–landoj de Eŭropa Unio, la ŝtatoj-membroj decidis en Dublino en 1997, ke

**la lando kiu respondecas pri la traktado de azilpeto estas tiu kiun la fuĝanto unua atingas, enirante Eŭropan Union. La fuĝanto tamen povas frustri tiun provizon, se ĝi petas azilon ne en la unua lando, sed en la dua aŭ tria kiun ĝi atingas. Tiam la lasta lando rajtas resendi la azilpetanton al la unua lando de la Unio, kien la fuĝanto eniris.**




kontrau disponoj de solidareco!

Dum la krizo de eŭropaj rifuĝintoj kaj migrantoj en 2015 **Hungarujo** iĝis tro ŝarĝita de azilpetoj tiom ke ĝi ĉesis en junio reakcepti la azilpetintojn el aliaj landoj, ekz. el Germanujo, kiuj poste transiris la limojn al aliaj EU-landoj kaj estis fiksitaj tie. Tiam, en aŭgusto, **Germanujo** decidis libervole preni respondecon por prilaborado de azilpetoj por Sirianoj. Ankaŭ, en septembro, **Ĉeĥujo** proponis akcepti nombron de siriaj rifuĝintoj kiuj jam petis azilon en aliaj EU-landoj. Hungarujo, kiu unua rifuzis aplikon de “Dublin” ankaŭ ne akceptis alternativon, nome disdividon de azilpetantoj laŭ pli justaj reguloj, bazitaj sur ekonomia, demografia kaj aliaj kriterioj por difini la kapaciton de lando por integrigi novajn enloĝantojn. Same **Slovakujo** kaj **Pollando** rifuzis devigajn kvotojn de enmigrantoj.

La ministroj daŭras interkonsiliĝi, dum oni atendas novan ondon de rifuĝantoj
Maarten den Heijer, Universitato de Amsterdamo, skribis antaŭ dek tagoj en http://eumigrationlawblog.eu/category/asylum-crisis/:
La Konsilio de EU-ministro jrespondecaj pri migrado kaj internaj aferoj daŭrigas siajn diskutojn pri reformado de la sistemo. La Eŭropa Komisiono faris **en majo 2016** proponon por korekta atribuado de azilpetantoj, kiu estis rifuzita de orient-eŭropaj membroj de EU. En ilia nomo la tielnomata Visegrad-grupo (Ĉeĥujo, Hungarujo, Pollando kaj Slovakujo) proponas anstataŭe sistemon de "fleksebla" aŭ "efika" solidareco. La grupo skribas, ke *membroŝtatoj decidu pri specifaj formoj de kontribuo konsiderante ilian sperton kaj potencialon. ….. Ajna dissendo mekanismo devus esti libervola*. Ŝlosila defio por la malta Prezidanteco estas trovi kompromison inter tiuj du aliroj.
Visegrad= kastelo sur Danubo apud Pest en Hungarujo

**Krizo en Eŭropa Unio?**

Mi skiza sen mia prelego la motivojn por krei Eŭropan Union kaj ĝian kreskon al ligo de 28 ŝtatoj. Gvidantoj de EU ofte nomas ĝin *komunumo de valoroj*. Per tio oni celas moralajn valorojn, sed plej gravaj estas la kvar"liberecoj" de EU: de varoj (komercado kun alia EU-lando devas esti same libera kiel komercado de varoj kiuj restas en la lando mem), de kapitalo (povas iri libere de unu lando al alia lando kaj tie esti investita), de servoj (entreprenisto el unulandoestasliberastartigientreprenonen alia lando) kajde personoj(homojel unu lando estas libera ja kcepti pagatan laborposteno nen alia lando).
Tiuj liberecoj donas grandan impulson al la ekonomio de membro-lando, sed devigas ĝin akcepti en novaj naciaj leĝoj multajn egalrajtecojn kun alilandanoj.
Ekzemplo: Se Britujo forlasos Eŭropan Union, la laborloko de dekmiloj da eksterlandanoj el EU estas en danĝero.
Politikaj streĉoj ene de kaj inter landoj ofte havas kiel fonon ke enloĝantoj sentas sian identecon malsame: kiel apartenantoj al iu popolo (kies loĝloko ne necese koincidas kun la landlimoj: etneco) aŭ kiel egalrajtigita komunumo de personoj vivantaj sub la leĝoj de iu ŝtato (civitaneco).
Ekzemploj: rifuĝintoj, fremdaj laboristoj, minoritatoj (speciale en meza Eŭropo pro la du mondmilitoj)

**Se tiuj sentoj estos ekspluatataj de politikistoj, Eŭropa Unio perdos sian sencon.**

- **Diskuto de Svjetlana Milanoviĉ**

Mi estas Svjetlana Milanoviĉ kaj venas de Beogrado kune kun mia nederlanda edzo Johan Derks.
Mi naskiĝis en 1948 en Zajeĉar, malgranda urbo en la orienta Serbujo, kie mi pensis ke mi resvivon, sed Dio decidis alie.
Mia tiama edzo kiu estis interalie instruisto serĉis en la por Serbujo mallumaj jaroj sub Miloŝeviĉ, laboron eksterlande kaj trovis ĝin en Dubai en la bontenado de aviadiloj de tiu Emirlando, bedaŭrinde mortis tie 50 jaraĝa.
Tio estis granda ŝoko por mi kaj por miaj du infanoj.
Mi finis ekonomian mezlernejon kaj laboris 30 jarojn en komerca entrepreno.

Post mia pensiiĝo mi parolis kun juna studento kiu komencis lerni internacian lingvon Esperanto kun pli ol 20 homoj. Por havi ian okupon mi enskribigis min kune kun amikino.
Post kvin lecionoj nia instruisto alportis al la lernantoj liston de nomoj de 30 eksterlandaj esperantistoj kiuj volis korespondoi kun aliaj esperantistoj.
Mi elektis kelkajn kaj baldaŭ mi havis reton de 20 korespondendantoj de Brazilo ĝis Japanujo. Kompreneble estis leteroj de fraŭloj kiuj ŝatis havi amikinon. Inter ili estis ankaŭ mia nuna edzo Johan.
Ĉar mi ne parolas bo lingvon kaj Johan simile la serban ni decidis interkomunikiĝi en Esperanto.
Ambaŭ ni samtempe kontribuas al Esperanto movado.
21an de marto

- **Vizito de fremdaj esperantistoj**


De 19 -22 marto 2017 vizitis Albanion gesinjoroj Johan Derks kaj Svjetlana Milanoviĉ. Ekde kelkaj monatoj ili esprimis sian deziron kontaiĝi kun nia lando. Ĉiokaze ni proponis al ili prelegi en iu ĉitiea universitato. Do, Johan kaj Svjetlana sin pretigis respektive pri la temoj "Ĉu la elmigrado detruos EU?" kaj "Kiel Esperanto kunigis nin?".





En Tirana kaj Durrës

Ili enveturis per sia propra aŭto kaj akomodiĝis en relative malmultekosta hotelo apud la urbocentro, posttagmezon dimanĉe. La sekvantan tagon ili vizitis la ĉemaran urbon Durrës je 40 km for de Tirana, kie ili vidis la ruinaĵojn de la antikva granda amfiteatro kaj la longan plaĝon.





Johan kaj Bardhyl S-ro Shaban Hasani akceptas la gastojn

La 21-an de marto okazis la prelego kaj post ĝi vizito al la ĉefavejo bektaŝia en Tirana. Posttagmeze sekvis vizitoj en la familioj de esperantistoj.

Frumatene la 22-an de marto, la amikoj forveturis hejmen.

Rita Përmeti

- **Renkontiĝo kun esperantistoj en Kubo**

Dum januaro en Boston, Usono, bedaurinde mi nur estis en skriba kontakto kun la lokaj Esperantistoj, ĉar amaso da neĝo kaj longaj distancoj malhelpis renkonti la amikojn tie.
Pro mia usona pasporto estis ege malfacila por mi eniri Kubon, ĉar 'turismo' estas 'malpermesata' kialo por viziti la insulon. Do mi petis kuban amikon, Oskar Asensio, sendi inviton al mi, ke mi venos al Kubo kiel Esperanto-instruisto, ĉar edukado estas 'permesita' kialo! Tio, plus stako da Esperanto-materialoj helpis dum la enmigrado.

Cetere, la aviadilo de Boston al La Havano estis plenplena je usonaj turistoj, kiuj tien vojaĝis pro 'esplorado' (ekzemple muzikon), au 'evoluado de la lando', ktp. Angela Pedroso Cuesta, bahaa esperantistino, kiun mi renkontis dum la UK en Lillo, ricevis min en la flughaveno. Post mia lasta vizito al Kubo dum la UK en 1990, kiam oni ne povis aĉeti eĉ unu bananon, la lando sufiĉe evoluis, t.e. eskzistas nun multaj vendejoj kaj merkatoj kun bazaj varoj au manĝaĵoj, ankau diversaj

restoracioj. La gastoj devas ĉion pagi en CUC, la konvertebla kuba mono, dum la popolo uzas kubajn pesojn. 1CUC = plimalpli 1EUR au 24 kubaj pesoj.
Post duontagaj vanaj klopodoj konekti mian komputileton kun la kuba interreto, mi rezignis pri la afero. Por mia tre modesta ĉambro (malalta, sen fenestro au lumo kaj iomete da akvo) mi pagis 25 CUC. Multaj kubaj ŝoforoj enspezas monon veturigante precipe usonajn 'turistojn' en grandegaj, buntaj, usonaj automobiloj el la 50aj jaroj.

Angela prenis min viziti germanan Esperantiston, Sron Vilhelmo Luterman, jam preskau kubano. Li tradukas "Le Monde Diplomatique" en Esperanton kaj eldonas multajn aliajn librojn pere de MAS (Monda Asambleo Socia).

Alian malnovan E-o-amikon mian kaj de Angela ni renkontis tie: Philippe Chauvignon el Francio, kiu ankau vivas kaj servas en Guatemalo. Li montris apudan merkaton al mi, kie ni aĉetis amason da tropikaj fruktoj: papajo, guajavo, ananaso kaj bongustegaj bananetoj.



Alia BELano (membro de Bahaa Esperanto-Ligo) Oskar Asensio, estis ege helpema konatighi kun aliaj amikoj kaj klarigi vidindaĵojn de Havano. Unu tago en la buso - ni ĉiam parolis esperante - sinjoro apud ni diris ke li ankau estas Esperantisto, loĝante iom for de la centro.

Kompreneble ni ankau vizitis la sidejon de Kuba Esperanto-Asocio: Bela, granda 3-etaĝa domo, donaco de la registaro. Tie mi finfine konatiĝis kun Julian, profesoro de la angla en la universitato, kaj de Esperanto en la klubejo. Li aranĝis ne-ordinaran renkontiĝon kun kelkaj amikoj de ĉiuj aĝoj, rakontis pri la historio de Esperanto en Kubo, gitarludis, kaj ni kantis 'Guantanamera' en Esperanto!





Pro diversaj kialoj vojaĝi eksterlanden estas kvazau nerealigebla revo por plejmultaj kubanoj.  Malgrau la atingoj de la revolucio, ili suferas pro manko de multaj por ni normalaj kondiĉoj au eblecoj.
Espereble la estonteco kune kun teknikaj evoluoj ebligos malfermi pliajn pordojn por antauenigi la unuecon de la homaro.

Heide Martha Otto, Vlora, Albanio, Februaro 2017

- **Niaj kotizoj**
  Ni jam pagis niajn kotizoj al UEA kaj ILEI. La ĉijara ILEI sekcio konsistas el:

> *La nomlisto de la albana ILEI Sekcio 2017*
> 1. Bardhyl Selimi bselimi@gmail.com
> 2. Martha Heide Otto martha.otto@gmail.com
> 3. Gjergji Gusho gjergji_gusho@yahoo.com
> 4. Enkela Xhamaj xhamajkl@yahoo.com
> 5. Agim Peraj agimperaj@yahoo.it
> 6. Nehat Sokoli sokolinehat@gmail.com
> 7. Sajmir Beqiraj s_beqiraj@yahoo.com
Registritaj.

Amike
Sebastian CYPRYCH
ILEI komisiito pri membroprizorgado

**Gramatiko**

- **La korelativoj**




**https://www.youtube.com/watch?v=ZaLSRksAlY0**

- **Jmkt Esperanto**<jmktesperanto3@gmail.com>

La akuzativo de direkto

**https://www.youtube.com/watch?v=BROQ1v0eW98&feature=youtu.be**

- Participoj

**https://www.youtube.com/watch?v=_MIaFH6SGIM&feature=youtu.be**

- La korelativaj vortoj i kaj ki en esperanto per video

**https://www.youtube.com/watch?v=j_TIe3CAHtA**

**Se vi volas aŭskulti diversajn radiostaciojn, nur klaku sur la mapo..**

[http://radio.garden/live/clifd en/connemarafm/](http://radio.garden/live/clifd en/connemarafm/)

**sendita de Madrogao, Evandro Cabocio**

**<u>Nia propagando</u>**

Esperanto kaj karnavaloj en Brazilo






- Kunvenoj de esperantistoj






El Hungario El Ĉilio

- Strato Zamenhog, Brazilo



- Brazila profesoro



Jose Leite

**Leteroj**

- Edmond Ludwig, Elzaso, Francio

Mi ĝojas pro la rezulto de via diskonigo de Albert Schweitzer. Via profesoro bonŝancas vivi en Svislando, la plej demokrata lando en la mondo. Kaj riĉa! Miaj gelernantoj ofte provas labori en Svisio, ĉefe en la industrio aŭ kiel kuracistoj kaj flegistoj.

Kompreneble mi sekvis en niaj gazetoj la novaĵojn pri la aresto de la Kosova eksa ĉefministro. Mi ja suspektis ion tian. Francio ja de ĉiam staras flanke de Serbio. Kiam finfine ni iam havos pli civilizitan politikon senmilitan? Dankon pro viaj aldonaj informoj, kiujn mi kompreneble trovis en neniu oficiala gazeto, eĉ se mi suspektis ekonomian kialon. Al la popolo oni servu la kutiman interetnan problemon. Taŭga kaŝilo!!!

Keep Talking: 2017-04-04: Temo: 9-11, nukleaj armiloj kaj sekretaj societoj- Ian Fantom

Ni havas novan kunvenejon por Keep Talking. Ĝi estas facile atingebla por homoj kiuj veturas en Londonon por la prelegoj. Ni havas ankaŭ grandan temon: nuklea fizikisto el Germanio klarigos al ni kial li opinias, ke nukleaj eksplodiloj estis uzataj en 9-11. Tiu estas eventualaĵo kiun mi intencis dum iom da tempo esplori, sed nun mi miras eltrovi tiom ampleksan kaj detalan argumentaron.

Pro la grandegaj implicoj de tiu temo, kaj la ligoj kiujn mi provizis, mi pensis, ke mi sendu tiun ĉi avizon al ĉiuj en mia internacia listo. Se tiu teorio estas ĝusta, tiukaze neniu estas sekura - eĉ ne komplicaj agentoj de la ŝtato, kiuj devus reelpensi siajn proprajn situaciojn.

Temo: 9-11, nukleaj armiloj kaj sekretaj societoj
Parolanto: Heinz Pommer, nuklea fizikisto kaj dokumentisto
Date: Mardon la 4an de aprilo, 2017
Horo: 19:15 (ĉambro mendita 18:00 – 22:00; kafejo en la enirejo

Heinz Pommer estas nuklea fizikisto kiu perlaboras sian vivon per provizo de teĥnikaj dokumentaĵoj. Li estras kompanion en suda Germanio, kaj li venas al Londono specife por prezenti tiun ĉi prelegon al Keep Talking.

La celo de la parolado estas “malkaŝi la eventojn de 9-11 kiel nuklean militkrimon – plenumitan de potenca reto da sekretaj societoj”. Heinz Pommer skribis, ke estas tri kernaj aspektoj por kompreni kio okazis en 9-11: 1. fizikaj pruvaĵoj (prenante en konsideron ĈIUJN pruvaĵojn, eĉ la nekomfortajn) 2. nukleajn armiloj (kiel rekoni la malbelaĉajn efikojn de nukleaj armiloj) 3. regado per sekreteco (kiel sekretaj societoj ja regas niajn publikajn instituciojn). Li parolos pri: * urano kaj la nuklea fingrospuro en la polvo-specimenoj de 9-11 * stabilaj izotopoj de fero kaj radioaktiva polvo * fizika modelo de detruo kaj neŭtrona radiado * mortigi la proprajn homojn; la katastrofo de la usonaj spertoj pri atoma radiado * enplektiĝo de CIA kaj Mossad * sekretaj societoj kaj iliaj metodoj de miskredigo * adorado de la superega mensogo: la diabla danco.

Retejoj: http://911history.de [en la angla]
www.911memorial4kids.org/ [en la germana]
Video: https://www.youtube.com/watch?v=G8xUkOudMts [en la germana - anglaj subtitoloj]

Eniro: £4

Loko: Diorama Arts Centre, 201 Drummond Street, Regents Place, London, NW1 3FE (http://www.diorama-arts.org.uk)

Drummond Street iras paralele al kaj norde de Euston Road. Diorama estas apud la okcidenta fino de Drummond Street, 10 minutojn da promeno okcidente de Euston Station, kaj kvin minutojn da promeno de la subteraj stacidomoj de Warren Street, Euston Square kaj Great Portland Street, kaj dek minutojn da promeno de la subtera stacidomo Regent's Park. Por tiuj kiuj venas de la kontinento, estas 15 minutojn okcidento de la stacidomo St Pancras (unu halto subtere). Ĉiuj kvin ĉefaj interurbaj stacidomoj havas rektan ligon kun unu el la supraj.
Aŭtobusoj: 18, 27, 30, 88, 205, 453, C2
(https://tfl.gov.uk/maps/bus?intcmp=40401 Enigu: 'Diorama')
(http://www.diorama-arts.org.uk/contact.html)

La ĉambro estas ekstere de la 'Congestion Zone' (la pagzono). Liberaj parkejoj eble estas malfacile troveblaj tuj ekstere, sed halto por ŝargi/malŝarĝi devus ebli. Estas lifto, kaj servejo por teo kaj kafo troviĝas en la ĉambro. En la enirejo estas senpaga memserva kafejo.

En okazo de problemo tiuvespere, bonvolu telefoni al mia poŝtelefono.

Kore salutas, kaj restu parolantaj!

- Laŭ mia kompreneto, Napoleono ja kreis la centran bankon kiel privatan bankon, sed la posedanto estis li mem, aŭ lia grupo, tiel ke li povis funkciigi ĝin kvazaŭ ŝtatan bankon.

Ne, ne ne ! tiuj estis tute privataj bankoj (estis iu pasinta historiisto, kiu faris TV elsendojn sur la svisa televido, Henri Guillemin, kiu bone parolas pri tio, kaj verkis libron, pri tio
http://www.agoravox.tv/actualites/politique/article/henri-guillemin-nous-explique-la-34582
https://www.amazon.fr/Napol%C3%A9on-l%C3%A9gende-v%C3%A9rit%C3%A9-Henri-Guillemin/dp/286819737X/ref=pd_sim_14_3/253-4639091-

3941145?_encoding=UTF8&psc=1&refRID=366DJ11568NTM6RJ1B36 ). kun privataj kapitaloj, al kiuj Napoleono "malavare" donis ŝtatajn privilegiojn, unue tion, kiu devus kaj devas esti kaj resti ĉu ne ? privilegio de la ŝtataj, do eventuale demokrataj, instancoj : la rajto krei la monon, stampi monerojn, kaj presi monbiletojn ! li donis al tiu unuiĝo de privataj bankoj la ekskluzivecojn, la leĝan protekton, kaj la potencojn, ŝtatajn ! kiuj normale devus apetrteni nur al vere publikaj establoj ! Fakte estas kiel la usona FED !
Fakte la ekonomia, kiel marksistoj diras "materiala" aspekto de la regno de Napoleono estas la plej grava, kaj klarigas la tuton. Napoleono estis subtenata de la posedaj klasoj, ĉar le restigis la "ordon", t.e. la respekto al privataj bonhavoj ! kaj obemon de la popolo. Kaj militoj kostas ! la finansistoj financis siajn militojn kaj profitis de ili. Sed kiam li volis ĉie trudi la "kontinenta blokado" por ruinigi Anglion, tio estis malbona por la negocoj, cetrere spite la teoria konskripto de soldatoj, la filoj de la riĉuloj ne iris soldatiĝi en la armeon, ĉar ili povis PAGI unu "anstataŭanton", malriĉaj uloj, kiuj igis sin pagi por fari la militistan servon anstataŭe de la filoj de riĉuloj ! Sed post tiom da militoj, Al Napoleon mankis soldatoj, mankis la "karno por kanonoj", do la esceptoj iĝis pli kaj pli malfacilaj, kaj la filoj de la riĉuloj devis soldatiĝi ! Ciuj tuij kialoj igis, ke fine la riĉularo ne plu subtenis lin kaj li falis. Napoleono estis bone konscia pri tio kaj kutimis diri "la mano, kiu donas estas super la mano, kiu ricevas" tio estas, kiel diras la proverbo "kiu pagas, tiu ordonas" :-)
la enŝuldigo de la registaroj profite al financistoj estis tre ofta fenomeno, mi ĵus legis la libro de Markso Die Klassenkämpfe in Frankreich 1848 bis 1850 (1850, MEW 7) (mi ne scias ĉu ĝi estis esperantigita) pri la regno de Louis-Phillippe : la impostoj jam tiam utilis ĉefe por pagi la interezojn de ŝuldoj ! kaj la ŝtato, jam tiam, estis pli kaj pli en ŝuldoj, kaj tio estis volata de la financa klaso fakte ! kaj tio pliĝis dum la 2-a respubliko.
Por enkonduki ion similan en Usono - aŭ pli ĝuste reenkonduki aŭ firmigi - oni enkondukis la Federal Reserve en 1913.

Ŝtatan bankon la ŝtato povas reguligi, tiel ke la kvanto de mono kreita spegulas la valoron de la nacia produktado. Privata centra banko ludas spekulacian ludon, kaj kreas kiom da mono kiom ĝi volas. Ju pli ĝi kreas, des malpli valoras la aliaj bankoj. La mono fariĝas produkto anstataŭ servo.

Fakte estas kialo pro tio ke La anoj de EU devas eliri al EU kaj el Eŭro (kaj el NATO) kiel en Francio volas François Asselineau, ĝis nun la amaskomunikiloj (kiuj ĉiu estas posedaĵoj de milionuloj, armilvendistojn, ktp) ne parolas pri li, ĉar ili blackliston kontraŭ li, time ke la popolo amese aliĝu al liaj ideoj, kaj tro bone komprenus, ko okazas, sed tio ne povos daŭri plu tre longe, li estos inter la kandidatoj por la prezidenta baloto, kaj tiam la amaskomunikiloj estos leĝe devigataj inviti li al debatoj lasi lin en la televidon, ktp. Jam nur par "buŝ-al-orelé" kaj per intereto liaj prelagoj filmitaj estis spektitaj de centoj da miloj da francoj, kaj lia retejo estas nun la plej vizitata de ĉiuj retejoj de politikaj partioj.
Eble pro tio en Albanio la sistemo formale estas privata banko, sed la kapitalo apartenas al la ŝtato. Do supozeble, se la Banko de Albanio kreas pli da mono, tio apartenas al la ŝtato,

kaj do la ŝtato ne devas pruntepreni ĝin de la banko. Kaj tiel Albanio povas obei la leĝon enkondukitan de Maastricht! Ĉu prave?

Kore salutas Ian

Pri la Banko de Albanio

La Banko de Albanio estas la centra banko de la Respubliko de Albanio. La Konstitucio de Albanio (Artikolo 161) difinas la statuson de la Banko de Albanio, kaj la Leĝo no 8269, datita 1997-12-27 "Pri la Banko de Albanio" elmetas la celojn, devojn, rilatojn kun la bankada sistemo kaj ŝtataj institucioj en Albanio, organizado kaj mastrumado, financaj deklaroj, kapitalo kaj profitdisdono. La ĉefa celo de la Banko de Albanio estas atingi kaj konservi prez-stabilecon. La Banko de Albanio estas aŭtonoma kaj sendependa de iu ajn alia instanco en la sekvo de siaj celoj kaj la plenumo de siaj devoj. La Banko de Albanio devas raporti al la Asembleo de la Respubliko de Albanio, kaj ĝia [paid-up: pripagita ??] kapitalo estas posedata ekskluzive de la Ŝtato de Albanio. La Bankon de Albanio regas la Supervida Konsilio, kiun prezidas la Bankestro. La Bankestro servas ankaŭ kiel la Ĝenerala Plenum-Direktoro de la Banko.

Do la kapitalon posedas la ŝtato. Mi sentus min pli komforta se ni havus ion similan en Britio. Laŭ la teorio la Banko de Anglio estas nuntempe posedaĵo de la ŝtato, sed en la praktiko ni ne povas kontroli, ĉar multo tie okazas en sekreteco. La influoj en la Banko de Anglio preskaŭ certe estas la privataj bankaj entreprenoj, kaj la ŝtatigo estas preskaŭ certe nur fasado. Sed la kapitalo de la Banko de Anglio laŭ mia kompreno estas posedaĵo de la Banko. Do jen kerna demando: Ĉu la albana registaro ŝuldas monon?

La brita registaro konstante parolas pri la ŝuldoj, kaj ke ili devas repagi la ŝuldojn, aŭ interezon por la ŝuldoj, kaj por tion fari ili devas pagigi impostojn kaj malpliigi la publikajn servojn, kiujn ili ne povas pripagi. Do la homoj ĉi tie konstante laboradas por forpagi la registarajn ŝuldojn. Ĉu tiel estas ankaŭ en Albanio?

Do kiu kreas la monon? Ĉu la registaro aŭ ĉu la centra banko?

En Britio kaj amaso da aliaj lando nuntempe, la centra banko kreas la monon, kaj la registaro pruntepreans ĝin, kaj devas repagi kun interezo. Kiel devus esti estas, ke la registaro kreas la monon kaj uzas ĝin anstataŭ pagigi tiom da imposto. Se la centra banko en Albanio nur tenas la monon por la ŝtato, eble en Albanio la ŝtato kreas la monon.

Interese ...

Kore salutas Ian

- On 15/02/17 07:34, Bardhyl Selimi wrote:

La veron dirante por mi estas malfacile respondi al la demando de Ian Fantom:

Do kiu respondecas en Albanio pri la monprovizo? Ĉu la registaro, aŭ ĉu privata centra banko?

Jes la bankoj posedas fortan influon al la registaroj, ilia bankroto endanĝerigas la bankroton de tutaj landoj.

En Albanio ekzistas unu tutŝtata banko, nomata Banka e Shqiperise (Banko de Albanio) kaj ekde la jaro 1997 stariĝis privataj bankoj (aŭ bankoj de dua nivelo), aŭstraj, grekaj, italaj, germanaj, turkaj, bulgaraj, malajziaj, usonaj, francaj kaj du pure albanaj. Fakte ili plifaciligis la komercon, la bizneson ĝenerale kaj la servojn. Unue la interezoj estis sufiĉe bonaj, ĝis 5 % por fremdaj valutoj kaj iom pli por enlanda valuto LEK (nomo honore al Aleksandro la Granda, inventita de la eksa reĝo Zog la Unua). Sed aktuale la interezoj draste falis ĝis 0.1 % por fremdaj valutoj kaj 0.5 % por la enlanda valuto. Ankaŭ la imposto sur la profito en bankoj, ricevita de ŝtato altiĝis de 10 % al 15 %. Tamen la loĝantaro plue deponas monon en bankoj.

Problemo por bankoj estas la tiel nomataj "malbonaj kreditoj" kiuj atingas ĝis 25 %!

Kiel eta lando Albanio, Kosovo, Makedonio, Montenegro certe estas pli influemitaj de la ceteraj grandaj potencoj. Tamen la alta grado de privatigo de la ekonomio ĉe ni certigis ĝis nun pli da stabilan kurzon de Lek-o, kiu apenaŭ ŝanĝis longajn jarojn kompare kun eŭro (de 137-140 Lek-oj por 1 eŭro), sed ne kompare al USD. (de 108-129 Lek-oj por 1 USD).

Problemo por la normala evoluo de ekonomio kaj ĝenerale bonfarto estas la neformaleco, t.e. la fakto ke notinda parto de biznesoj laboras sen impostoj, kaŝe; cetere estas la korupteco de la ŝtata administracio, politikistoj, juĝistoj. Tio evidentiĝis ankaŭ en la servoj ŝtataj, kiel en sanprotektado, edukado.

Alia problemo estas ankoraŭ relative malalta nivelo de salajroj kaj pensioj kio aliflanke allogas la fremdajn investaĵojn. La averaĝa salajro ekz. en fasona industrio estas 200- 300 eŭroj monate, en eduksistemo 300-400 eŭroj, en administracio iom pli, dum la pensioj varias de 100-250 eŭroj monate. Mi mem, kiu instruis matematikon dum 40 jaroj ricevas nete 180 eŭrojn monate. Dumtempe la prezoj de la nutraĵoj, vestoj, servoj ka ne diferencas notinde disde tiuj de, ni diru, Italio, Grekio, niaj najbaroj pli riĉaj. Kompreneble tio devigas la plimulton de loĝantaro sin rezigni de multaj aĵoj kiel restoracioj, vojaĝoj, luksaĵoj ktp. Tamen, tia ekonomia nivelo estas sufiĉe pli alta ol antaŭ la jaroj 1990, do en la tempo de komunismo, kiam la plimulto estis egale malriĉa ekstreme. Ekzemple, hodiaŭ per salajro averaĝa oni povas aĉeti televidlion, aŭ lavmaŝinon, dum en la tempo de socialismo (seoni rajtigis vin, ĉar mankis tiam multo en la merkato) unu televidilo kostis egale al la 6-7 monataj salajroj! Unu ĉemizo najlona kostis egale al duono de la salajro! ktp.

Estas tute alia bildo en la provizado per diversaj produktoj, ŝanĝiĝis ankaŭ la urbo ankaŭ la domoj interne.

Mi komprenas s-ron Ian, aktuale en mondo, samkiel en Albanio estis enprofundigita la polariziĝo de la socio, kio certe kondukos al grandaj ŝanĝoj en politiko kaj en la monda nova ordo.

Amike Bardhyl

- José Antonio Vergara a écrit :

Jes ja, en la konspira organizado de la putcho kontrau la registaro de Salvador Allende la CIA forte, fie intervenis helpe al la chiliaj reakciaj fortoj. Kaj poste la doktrino de nacia sekureco (kontrau la enlanada malamiko) estis kerna por la ideologiaj bazoj de la sudamerikaj diktaturoj, kaj tiel la usona armeo trejinigis oficirojn en torturaj taktikoj, ktp.

Sed oni ne povas trosimplige aserti ke Pinochet estis nur "marioneto" de Usono. Tio estus intelekte pigra, idiote suprajha kaj komplete senutila "klarigo".

Lia reghimo estis multe pli ol tio. Ghi intence transformis nian landon en laboratorion por la ekfunkciado de la novliberalismaj ekonomiaj principoj, paralele al la reghimo de Thatcher en Britio kaj Reagan en Usono. Tio komplete shanghis la landon kaj signifis profundan kulturan mnalvenkon de la chi-tiea maldekstro: la socialista kaj aliaj modere maldekstraj partioj kiuj post 1990 ekgvidis la landon jam ighis plene submetitaj al la sama novliberalisma ideologio, simile al Tony Blair en Britio.

La plej terura efiko de la diktaturo de Pinochet konsistas je tio ke la ekstrem-kapitalisma utopio venkis en la mensoj de miaj samlandanoj. Oni ne plu kredas je solidaro au la valoroj de la respubliko. Nur la potenco de la mono kaj la deziro je konsumado estas la solaj kiuj mobilizas la homojn chi tie.

José Antonio Vergara

- Julia Sigmond

2017 JANUARA LETERO

<u>13.01. vendredo</u>

Ĉiutage estas iu datreveno, nur ne ĉiujn ni rememoras.

Estas neforgeseblaj tagoj.

Ankaŭ 13 januaro estas unu el ili. En ĉi tiu tago ni entombigis mian Dolĉapatron, en la tombejon Hàzsongàrd, (haĵongard), en 1968. Tiu tago estis unu el la plej malvarmegaj tagoj de tiu vintro.

Ankaŭ la hodiaŭa tago iĝos neforgesebla. Denove mi estas en Cremona, por kontrolo, en la miraklo-hospitalo. La rezulton mi ankoraŭ ne scias, sed mi esperas, ke ĝi estos bona.

Denove mi estas kun Maura, kiun en oktobro samtage kun mi operaciis dr. Speroni. Nun ni kune atendas la rezulton.

Nia amikino Rita alportis nin al Cremona, tre frumatene. Ŝi venis jam je la 5,30 kaj dum horo ni atingis la hospitalon. Evidentiĝis, ke la distanco estas iom pli ol 60 km.

Mi renkontiĝis kun jam konataj asistantoj kaj flegistinoj. Ankaŭ nun Diego preparis min en la operaciejo. Amike li diskutis kun mi. Antaŭ la endormigo aperis mia kara doktoro kaj laŭ lia stilo, ŝerceme li salutis min.

Filippo kaj Rita atendis mian revenon al mia ĉambro, ĉi-foje nr. 350, kaj vidante min, jam ne dormiĝantan, je la 10,30 ili foriris.

Tagmeze Filippo telefonis kaj mi povis diri al li la veron, ke mi tute bone fartas.

Nia doktoro aperis je la 14,30, por demandi: kiel ni fartas, kaj li permesis, ke mi trinku akvon.

Vespere mi provis telefoni, mesaĝon sendi, sed la telefoneto ne funkciis.

La vespermanĝo estis nur teo kaj biskvito.

<u>14.01. sabato</u>

Ĉio iras laŭ kutima ordo. Matene kontrolo de febro kaj sangopremo, matenmanĝo. Lakto kun kafo kaj biskvito. Oni ŝanĝis la litotukojn.

Vizitis min Filippo kun Milena.

Posttagmeze venis la doktoro. Li diris, ke nur marde ni ambaŭ povos hejmeniri.

Mi demandis lin, kiom foje dum jaro ni devos veni por kontrolo. Li respondis: kvar!

Mi diris al li, ke en aprilo dum Paskofesto nepre mi volas iri al Kluĵo.

Ni pridiskutos! - diris li ridetante.

<u>15.01. dimanĉo</u>

Filippo nur tagmeze telefonis.

Nokte, apenaŭ mi dormis iomete. Je la dua horo mi faris lumon kaj ĉirkaŭ du horojn mi solvis SUDOKU.

Posttagmeze Maura havis vizitantojn. Tre bone ili ridis pri "io", kion mi ne komprenis, sed ege mi ĝuis la bonhumoran atmosferon. Memorigis min pri la malproksimaj tempoj, kiam ankaŭ ni, mia fratino kaj mi, ege bone povis "kunridi". Nun Maura kaj ŝia fratino, Rozi kunridis.

Filippo plurfoje provis telefoni. Vane. Mia telefoneto ne volas funkcii. Eble ni devos aĉeti novan mobiltelefonon.

<u>16.01. lundo</u>

Belegan sunleviĝon mi rigardis hodiaŭ matene. Vera ĝuo estis!

Bonŝance mi petis de Maura ŝian telefonnumeron, ĉar Filippo ne povis telefoni al mia telefoneto, do li telefonis al la telefoneto de Maura. Neniu novaĵo. Ni interkonsentis, ke tuj mi telefonos, kiam mi ekscios, ke ni povos hejmen iri.

Hodiaŭ la teon de la kvina horo alportis je la kvara horo. Hieraŭ je la 14,30!

Ni atendas la morgaŭon, la hejmeniron.

Hodiaŭ mi diskutis kun flegistino el Peruo. Ŝia nomo estas Jeni. Ankaŭ ŝia edzo estas peruano. Ili vivas ĉi tie de 13 jaroj. Ilia fileto, Mateo, estas ok-jara.

Jency, la hinda monaĥino venis diskuti kun mi, kaj adiaŭi, ke morgaŭ ni foriros.

Mi demandis ŝin, kiam ŝi naskiĝis. Nekredeble! Antaŭ du tagoj ŝi havis la naskiĝtagon! Ŝi estas 46 jara, sed aspektas maksimume tridek. Ŝiaj gepatroj havas ok gefilojn, ŝi estas la kvara. Pasintjare ŝi vizitis la familion en Hindio.

Mi faris foton pri ŝi kaj ankaŭ pri Maura.

<u>17.01. mardo</u>

Frumatene je la kvina horo oni forprenis finfine la kateteron.

Jency vizitis min denove.

La doktoro venis je la 11,30 kaj anoncis nin, ke ni povas hejmen iri.

Mi tuj telefonis al Filippo, danke al Maura.

Posttagmeze je la 16-a horo li venis kun nia amiko Eugeno. Li havas belegan aŭtomobilon Ford, kaj tre varman.

Filippo tre atente alportis kovrilon, ĉar vendrede frumatene mi bezonis ĝin, sed nun mi ne devis uzi. Ankoraŭ ne estis la 18-a horo kaj ni estis hejme.

Tuj mi telefonis al ĉiuj familianoj, ke mi estas hejme.

<u>Poŝto</u>

La poŝto inter Rumanio kaj Italio estas plorinda. Ĝia rapideco similas al la limak-rapideco. Imagu! La 16-an de decembro 2016 sendita Unitaria Virina Gazeto alvenis la 25-an de januaro 2017. Almenaŭ ĝi ne perdiĝis.

Kun ĝojo mi legis la belegan recenzon pri nia komuna libro "*Libazar' kaj Tero*", kaj kun iuspeca honto la "recenzon" pri mi. Kvazaŭ mi estus jam vive "sanktigita".

La karmemora episkopo dr. Erdo Jànos estis nia religia profesoro dum la jaroj 1945-1947. Unu el liaj dumvive valoraj instruoj estis la penso: "Ekkonu vin mem!"

Nu, ne-perfekte mi sukcesis ekkoni min mem, sed vane mi batalis dum jardekoj kontraŭ miaj eraroj, ĉar mi ne povis entute liberiĝi de ili.

Jen, miaj "preferataj" eraroj:

OBSTINA mi estas.

PERFORTA mi estas.

MEMLAŬDA mi estas.

MALFIDA mi estas.

MI ŜATAS ESTI LAŬDATA. (Bone, ke nur motivite!)

Laŭ hungara proverbo: EĈ BONAĴO MALUTILAS, SE ĜI TROAS!

Post recenzo aperis ankaŭ malfermita letero, adresita al mi de amikino!

Ho, Bonadio!

- 2017 MARTA LETERO

Mi vidas en ĉiu homo nur homon kaj mi taksas<br><br>ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj.<br><br>L. L. Zamenhof

<u>ĜOJOJ</u>

Se la homo atendas la ĝojojn, ili alvenas.

Ekzemple, ĉi tiu monato marto alportas la printempon. Mem la fakto estas ĝojo. Ekverdas la mondo, ekverdas la vivo!

Poste alvenas la surprizo-ĝojoj!

La 8-an de marto (tago de la virinoj) aperas intervjuo en la budapeŝta virina gazeto: NOK LAPJA, farita al mi de bonega verkistino, Erzsébet Schaffer.

Kaj ĉi tie ne finiĝas la printempaj ĝojoj!

En monato aprilo aperos mia nova proza-volumo en Kroatio (Josip Pleadin!), kun la titolo FRONTO AŬ DORSO.

Aparta ĝojo estas, ke la kovrilpaĝo estas verko de mia nepino Csaga (ĉaga).

En la ĝoĵiga serio sekvas ŝin mia nepo Soma (ŝoma). Li kun grupo de muzikistoj volas prezenti iun muzikan projekton, kies teksto estos la poemo DIALOGO!

(Subite alvenis en mian kapon la penso: se mia fratino Evike kaj mia frato Istvàn, legus ĉi tiun leteron, eble ili ambaŭ skribus al mi: “Fratino, ci denove memlaŭdas!”)

BILI

La “preskaŭ mortinta” hundo, nia Bili (16 jarulo), iomete refortiĝis!

Ni havas multajn problemojn kun li! Preskaŭ ĉiu tage kaj ankaŭ nokte li uzas la kuirejon kaj la antaŭĉambron, kvazaŭ ili estus “sia propra necesejo”. Foje eĉ nian dormoĉambron! Kvankam ofte ni lasas lin, eĉ pli: forportas lin eksteren!

Jam tri foje mi ree promenis kun li, same kiel dum li estis juna! Unuvorte: ankoraŭ li ne volas morti.

POŜTO

La limako gajnus maratonan kurkonkuron kontraŭ la eŭropa poŝtservo!

Imagu! Koverto kun E-gazetoj bezonis *unu monaton* por alveni de Kluĵo al Veano!

Ne sufiĉas la fakto, ke treege ĝi kariĝis, aldone ĝi ege malrapidiĝis. Ĉie oni plendas kontraŭ ĝi! Kaj la alvenon de ĝi certigas nur la ege multekosta registrita sendaĵo!!!

Bonŝance, la plimulton de miaj leteroj mi sendas per interreto!

KLUĴO

Inter 1-23 aprilo mi estos en Kluĵo.

Ege mi bedaŭras, ke Filippo ne plu volas vojaĝi kaj ke mi lasas lin sola. Ni ambaŭ maljuniĝas kaj ni provas helpi unu la alian en diversaj laboroj. Precipe pro Bili estos por li malfacile resti sola. Bonŝance en aprilo jam oni ne devos hejti, tiel li liberiĝos de la laboro pri brul-ligno kaj cindro!!! Krome, ĉiutage ni vidos unu la alian per skajpo, kaj ni povos pridiskuti niajn problemojn!

LEGINDAĴO POR VI:

KIEL MI NOMU VIN?

Kiu ne vidas, tiu estas blinda.

Kiu ne aŭdas, tiu estas surda.

Kiu ne parolas, tiu estas muta.

Kiu ne amas, tiu estas …..?

Ne ekzistas vorto por tiu persono.

Oni diras, ke li/ŝi estas senkora, aŭ ŝtonkora. Eble tion, ke li/ŝi estas sensenta.

Eĉ unu vorto ne povas esprimi, fakte kion tio signifas.

Tamen la vortoj blinda, surda, muta, perfekte komprenigas, ke temas pri homo nevidanta, neaŭdanta, neparolanta.

Multfoje mi pensadis pri tiu fenomeno, sed solvi ĝin mi neniam mi povis. Ĝi similas al nesolveblaj enigmoj. Vane mi cerbumas, la tasko estas nesolvebla.

Oni diras, ke ekzistas tiuj, kiuj tiel naskiĝas.

Nome, kiam naskiĝas nedezirata infano, neniu ĝojas pro ĝi, neniu amas ĝin; eĉ se ĝi naskiĝas kun am-kapablo, ĉi tiu kapablo ne povas evolui kaj kreski en ĝi.

La kapablon ami, laŭ mi, la homoj perdas dum la plenkreska aĝo sekve de trompiĝoj, perfidoj, seniluziiĝoj ks : tiam la malamo anstataŭas la amon.

Eble plej trista estas la manko de amo en olda aĝo, kiam alproksimiĝante al la fino de la vivo, iu ne plu kapablas ami.

En ĉiuj okazoj por mi estas nekompreneble kaj nepercepteble: kiel eblas vivi sen amo?

Ĉu ekzistas floro, kiu havas nek koloron nek odoron?

La blankaj estas plej bonodoraj!

Neniam mi aŭdis pri birdoj nekapablaj kanti.

Kiel povas vivi homo, se li/ŝi ne povas ami?

La koro de tiu homo sensone tintas-gongas.

Ne ekzistas vorto nomi tiun homon.

Ekzistas nekuraceblaj malsanoj. Jam de jardekoj aŭ jarcentoj miloj da esploristoj serĉas la antidoton de tiuj malsanoj.

Kaj ili ne trovas ĝin.

Ĉu mi povas nomi tiu homan sento-malkapablon, se iu ne kapablas ami: malsano?

Kaj ĉu ekzistas "scienculoj" kiuj serĉas la antidoton de tiu "malsano"?

Aŭ ĉu ankaŭ ĝi restos sur la listo de nekuraceblaj malsanoj?

Kiam lernos ĉiuj homoj la novtestamentan instruon: "Amu vian proksimulon, kiel vin mem!"

Resaniĝon mi deziras al ĉiuj miaj ami-nekapablaj homfratoj!

- Erik Felker

Mi estas usona esperantisto kiu serĉas korespondamikon en via lando. Mi estas viro 73-jaraĝa. Mi interesiĝas pri kulturoj kaj religioj de la mondo, manmetioj, la naturmedio, homaj rajtoj, kaj pluraj aliaj temoj. Feliĉe mi korespondos kun viro au' virino de iu ajn aĝo, rete au' paperletere. Mi loĝas en la ŝtato Kalifornio.

Mi dankas vin pro via atentemo kaj kunlaboremo
Samideane salutas vin

---

- Jose Antonio Vergara

Dankon pro tiu tre interesa rakonto pri via vivitinero, Bardhyl.

Kvazau (mallonga) romano sed nefikcia, la skue dolora historio de la balkana regiono dum la 20-a kaj 21-a jarcentoj speguligħas en la hazardoj kiujn viaj gepatroj, vi mem kaj viaj familianoj travivis.

Chu estas iu vere demokratia kaj nekorupta maldekstra parti(et)o en via lando?

- Vilhelmo Lutermano

  Mi povas imagi, ke la transiro de eksaj "komunistoj" en Albanujo al burĝaj pozicioj analizeblas simile kiel Kozingo faras pri la lasta etapo de la stalinismo.

  Mi aktuale tradukas la ĵus en la germana originalo aperinta verko de Alfredo Kozingo: "Stalinismo". Esplorado de origino, esenco kaj efikoj. Fascina verko! ĝis nun nur germane.

  Sed ekzistas tiurilate aliaj tekstoj de Kozingo, jam en Esperanto:

  Alfredo Kozingo: "Stalinismo, leninismo kaj marksismo" MAS n-ro 117;

  Alfredo Kozingo: "Kiom socialisma estis la reala socialismo?" MAS n-ro 164.

- Edmond Ludwig

Ĉu vi konis la jenan aŭstran lingviston? La informo venas de PolaRetradio.
En Innsbruck, Aŭstrio mortis prof. Herman M. Ölberg i.a. interlingvisto kaj esperantologo,
Li ankaŭ fakulis pri la albana lingvo.
Nekredeble:neniam mi aŭdis pri li!!! Verŝajne vi konis lin.

Respondo
Hola kara Edmond, ankaŭ mi, tre bedaŭrinde, ne aŭdis pri tiu eminentulo, kvankam mi ne miras ĉar envere pluraj aŭstraj kaj germanaj lingvistoj okupiĝis pri la albana lingvo. Unu ĵurnalisto albana el Skopje (Makedonio) iam diris ke "germanaj lingvistoj estas por ni, albanoj, ia Prometeo mitika, ĉar ili ebligis per iliaj esploroj sciigi al la mondo la veron pri la albana lingvo".
Mi korespondis plezure, longe antaŭe, kun esperantisto je nederlanda deveno loĝinta en la urbo Leibnitz de Austrio, je familia nomo Cool. (Gerard). Li vivis ĝis 95 jaroj kaj estis same matematikisto. Liajn verkaĵojn mi enalbanigis kaj publikigis siatempe en la ĉi tiea pedagogia almanako de ministrejo de edukado.
Mi pluinteresiĝos nun ankaŭ pri tiu Herman, petante helpon de aŭstroj, sed kial ne ankaŭ de vi, ĉu ne? Cetere la vetero ĉi tie estas agrabla. Morgaŭ mi vojaĝos al Prishtina por rivevi de la Kosova ministro pri kulturo Dankeman Dokumenton por mia patrino kontribuinta ankaŭ al la edukado en Kosovo. (la 7a de marto estas ĉe ni Tago de Instruisto ĉar la 7an de marto 1887 malfermiĝis albanlingva lernejo en la urbo Korĉa).

- Roland Platteau

  En tiaj aferoj oni devas ĉiam demandi, kiuj estas malantaŭ tiuj frontuloj. Jes ja !
  Jam en la historio, kaj sambone en la aktualaĵoj.
  Pri Sirio, kaj la agresoj al ĝi celante faligi la antan respublikan registaron de Baŝar, mi pensas, ke la ĉefa kaŭzo estas en la gasdukto, kiun Kataro celis krei por eksporti sian gason tra Sirio ĝis medeteranea haveno. Krom la mono, planedstrategia influo, konkuremo kun Irano, malamiko de la ŭahabismaj potencoj de Arabio, kaj de Usono, estis celo krantraŭi la komercan, kaj do strategian, povon de Rusio, granda proviante de gaso al Eŭropo. Do ni estas ankaŭ en kdro de la "granda ludo" kiel priskribita de Brzezinski.
  Sed jen Assad rifuzis la trapason de la gasdukto tra Sirio ! do delenda Cartago ! Li devas morti.

- Ian Fantom

Mi ĵus legis en Daily Mail por la unua fojo, agnoskon, ke iuj opinias, ke Israelo estas malantaŭ ISIS. Mi mem opiniis ekde la unua tago kiam aperis 'Islama Ŝtato', ke malantaŭ tio estas NATO (kiu efektive inkluzivas Israelon), kvankam mi ne estis tiom specifa. La afero estis evidenta. Subite post la kontraŭa voĉdono en la brita parlamento pri bombado de Sirio aperis iu grandega milita forto kiu ampleksas

grandajn teritoriojn en Sirio kaj Irako. Evidentege tiu estis starigita por poste doni pretekston al NATO eniri Sirion malgraŭ la dumtempaj problemoj de la Novkonservativuloj en Londono.

Kaj la postaj eventoj tion pravigis, ĉar neniel la rakontoj pri ISIS eblus sen subteno de grandega milita kaj financa potenco kiu povas provizi tuj la armilojn kaj la militistaron por defii al NATO trans la Mezoriento kaj la Mahgrebo, sen ajna signo de amasa moviĝo de armeoj ks.

La artikolo en Daily Mail estas abomeninda kotŝmira artikolo pri Jeremy Corbyn, denuncante lin pro la homoj kun kiuj li asociiĝas, verkita de Jake la Falsulo kiu provis fari same al nia grupo Keep Talking. Mi sukcesis tion nuligi en la supapera versio, sed ne en la retversio. Tuj poste nia ĉeestantaro duobliĝis, kaj mi esperas, ke tiu abomeninda falsa novaĵo kiu aperis la unuan de marto pri Jeremy Corbyn same helpos al li: http://www.dailymail.co.uk/news/article-4253926/Jeremy-Corbyn-NEW-anti-Semitism-row.html (Tony Gratrex, kiu estas fotita kun Jeremy Corbyn estas kolego mia, kaj tute honesta kaj racia).

La fonto de la nuntempa terorismo ne estas islamanoj, sed novkonservativuloj. Ne povas esti nuntempe multaj inteligentaj homoj kiuj ankoraŭ kredas, ke la tri turojn de la Monda Komerca Centro detruis du aviadiloj pilotataj en neebla misio - eĉ por spertaj pilotoj - fare de islamanoj kun kelkaj malsukcesaj lecionoj en pilotado de Cessna! Islamanoj en Britio vivas en timo.

- José Antonio Vergara

mi ankaŭ legis kun intereso vian artikolon pri la religioj en via lando. Dankon pro ĝi. Videble, vi estas katoliko aŭ almenaŭ sufiĉe simpatia al la katolikismo, ĉu ne? Mi nur rimarkas tion, neniel temas pri kritiko, eĉ se mi mem estas sendiulo.

Mi miras pri via aserto ke la sunaisma islamo en via lando estis reformema, abolis poligamion, ktp. Sed ĉu nuntempe la aĉa ŭahabismo, subtenata de la merdaj sektuloj el saŭda Arabio, gajnas terenon inter la sunaistoj en via lando? Ĉu ni vidos la aperon de violentaj, ĝihadismaj islamistoj ankaŭ en Albanio?

Bedaŭrinde, en la maldekstraj medioj de Okcidento estas absurda solidaro kaj komprenemo al la plej reakciaj kaj subpremajj politikoj de la ekstrem-dekstraj islamistoj, nome de "multkulturismo" kaj "kontraŭimperiismo"

- Edmond Ludwig

Dankon pro la sendaĵo! Ege kortuŝa estas la rakonto de Anton Marku *Das Porträt eines Schillings. (La portreto de fuĝinto).*
Vidu: li bedaŭras, ke la propraj infanoj loĝantaj nun en Aŭstrio vivas kiel aŭstroj/...usonanoj !!! Kaj forgesas la albanajn kutimojn kaj lingvon.
Mi vidas, ke en Vieno okazas instruado de la albana lingvo.
Vi eble ankaŭ komprenas, kial mi batalis dum mia vivo por nia dialekto, kiu ebligas senprobleman lernadon de la germana! Ofte mi same malesperis!

Almenaŭ mi ĝojas, ke kun mia filino loĝanta en Partizo mi pertelefone aŭ hejme daŭre parolas la elzasan kaj ke ŝi plezure ĝin parolas. Kaj per la reto mi skribas al ŝi en Esperanto!

Iu, kiu ne suferis pro perdo aŭ minaco de perdo de sia lingvo/kulturo ne povas kompreni tion!
Ĝis!!!

- Vilhelmo Lutermano

HALTIGU LA PERFORTON KONTRAU VIRINOJ !

Al la justicministroj de la Eŭropa Unio (EU)

ALVOKO

Faru Eŭropon fine loko, en kiu knabinoj kaj virinoj estas sekuraj!

Ni instigas vin senprokrate rativi la internacian konvencion por malebligi perforton kontraŭ virinoj kaj eŭropskale realigi ĝin.

Knabinoj kaj virinoj el la tuta Eŭropo povu vivi libere de angoro kaj perforto. Agu nun kaj per tio klarigu: La Eŭropa Unio protektas knabinojn kaj virinojn kaj aktive agas kontraŭ rompoj de homrajtoj, kiuj daŭre ĉie okazas. Kial tio gravas:
Dum la hodiaŭa Internacia Tago de la Virino milionoj da homoj mondvaste surstratiĝas kaj postulas pli da rajtegaleco. Ni uzas tiun tagon, por ke la plej terura formo de perforto estu fine haltigita: la perforto farata al virinoj nur ĉar ili estas virinoj.
Kunlabore kun niaj eŭropaj partneroj ni revenigas la temon al la politika agendo de la EU - kaj kun pli granda emfazo! Ni scias, ke en ĉiu eŭropa lando miloj de ni volas vidi ke perforto kontraŭ virinoj kaj knabinoj estu kontraŭbatalata kaj malebligata.
En la hodiaŭa 8-a de marto ni por tio startigas peticion. Nia postulo? La deciduloj de la EU alprenu klaran sintenon, kiam temas pri niaj homrajtoj, kaj senprokraste ratifu kaj realigu la Internacian Konvencion por malebligo kaj kontraŭbatalado de perforto kontraŭ virinoj.
La Konvencio estas forta kaj deviga instrumento por kontraŭbatali seksspecifan perforton. Se la EU aliĝas al la konvencio, viktimoj estas pli bone kaj pli amplekse protektataj. Per la punjuro, per publika atento kaj financaj rimedoj necesas certigi, ke ĉia formo de perforto estu haltigata kaj punata: seksperforto, batado, homkomerco, seksa ĝenado, trudsekvado - ĉio ĉi, kio por milionoj da virinoj en Eŭropo estas ĉiutaga realo. "Tradiciaj familiaj valoroj" tiam ne estos plu preteksto por ne agi kontraŭ endoma perforto.

Perforto frapas eŭropajn virinoj el ĉiuj landoj kaj ĉiuj sociaj tavoloj. Unu el tri virinoj pli ol 15-jara fariĝis viktimo de perforto. Unu el 20 estis seksperfortita. Inter 60 kaj 100 elcentoj de la viktimoj de malam-krimoj kontraŭ islamanoj en Eŭropo estas virinoj. La konsilantaro de la justicministroj havas en sia mano fari Eŭropon pli sekura por ĉiuj virinoj kaj knabinoj. Ĝi devas nur decidi ratifi la konvencion. Multaj organizaĵoj de la civila socio de jaroj engaĝiĝas por tio, ke oni fine agu. Sed la konsilantaro restis nenifara kaj ignoris la postulojn. La batalo kontraŭ la seksspecifa perforto estis neniam prioritata. Hodiaŭ ni ŝanĝos tion komune. Per via subskribo vi subtenas ĉiujn virinojn, kiuj dum la hodiaŭa Monda Tago de la Virino batalas por siaj rajtoj.

- http://sezonoj.ru/2017/02/2016/

Kion tiuj (stultaj) homoj havas por plendi kaj kritiki, tio jam delonge estas malvarma kafo.
Intertempe ciuj eldonoj de la revuo de Esperanto estis liveritaj, escepte de la februara.

Anstatau kontentighi pri banalaj konstatoj - la verajn kauzojn de la stagnado kaj de la problemoj de Esperanto kaj de la Esperanto-movado tiuj "analizantoj" (estas ciujare la samaj teduloj) komplete prisilentas, au ne komprenas: Ili trovighas en la totala signifoperdo de Esperanto kaj en la komplete malkapabla gvidado de la Fettes-estraroj. Oni eble foje pli serioze okupighu pri tiuj cirkonstancoj.

Kvankam mi mem ne estus esprimінta la aferon tiamaniere, mi opinias, ke en tiu mesaĝo li entute pravas. Do kial mi reagas al ĝi ĉi tie, kaj ne en uea-membroj, por tion diri?

Unue, la temo devus havi intereson al ĉiuj sinceraj Esperantistoj, ĉu aŭ ne ili membras en UEA. La demando, kial Esperanto tiom malkreskas, kaj kial la movado ŝajnas tiom stagna, devus esti ĉeftemo ĉie. Sed iom strange, estas eĉ malfacile diskutigi la temon en serioza maniero en UEA.

Due, mi scias el la sperto, ke eĉ citi en uea-membroj alineon de Andreas Kuenzli por ĝin kritiki alportos AVERTon de la administrantoj, ke mi "uzis insult-vorton". Mi iam citis similan alineon, en kiu li nomas ĉiujn membrojn de UEA 'idiotoj', sed mi citis nur por ĝin analizi, same kiel mi faras ĉi tie. En tiu kazo mi argumentis, ke Andreas Kuenzli kondutas kiel agento provoka, ne kiel sincera kritikanto. Kaj tion mi opinias pri la supra mesaĝo de li sendita.

Trie, estas en tio ankaŭ mesaĝo por la funkciado de la ŝtata propagando tra la Okcidento, pri kiu la homoj estu konsciaj, kaj tio ja profunde devus tuŝi la interesojn de MAS.

Mi tralegis la aluditan tekston en Ondo de Esperanto, kaj estas la vero, ke el ĉiuj 13 kontribuantoj neniu tuŝas la veran kernon de la problemoj de la Esperanto-movado.

Iujn mi povas facile pardoni, ĉar ili efektive ne scias aferojn kiuj estas daŭre kaŝataj for de la membroj, kiuj ne devus esti kaŝataj. Aliajn mi povas eventuale pardoni, ĉar ili scias, ke se ili malkaŝus tiujn sekretojn ili mem eventuale estus celitaj per la kutimaj personaj atakoj. Sed aliajn mi ne povas pardoni, ĉar ili mem estas parto de la problemo.

Preskaŭ entute ili priparolas detalojn, kiuj estus pli bone konsiderataj simptomoj de la malsano ol la malsano mem. Tamen estis unu-du komentoj kiuj povus meti la homojn sur la ĝustan vojon al kompreno de la problemo se ili atentus. Anna Bartek / Anjo Amika (Hungario) skribis, ke inter la malsukcesoj estas "Ne agnosko de la 6a AKE, okazinta en decembro 2015, en Togolando; estis punitaj la togolandaj esperantistoj pro realigo de la 6a AKE". Ankaŭ tiu skismo en Afriko, kaj la ŝajne stulta disputo pri la 6a Afrika Kongreso de Esperanto, estas simptomo de la problemo, sed ĝi estas tre proksima al la kaŭzo.

Gbeglo Koffi faris mirindan laboron por Esperanto en Afriko, sed nun li estas persono nebonvena en UEA. Li ne rajtas plu skribi al uea-membroj. Simile estis kiam li estis Estrarano de UEA por Afrika Agado, kaj estis marĝenigita fare de la Direktoro, Osmo Buller. Lia kunlaboro kun La Civito estis nur preteksto, kaj ĝi okazis ĝuste ĉar li estis elpuŝita fare de la koterio ene de UEA.

Ion similan mi mem spertis en mia landa asocio. Mia sola krimo estis, ke mi, laŭ la Prezidanto, John Wells, "estis kritikema pri la komitato". Kion tio povas signifi, kiam mi estis parto de la komitato? La impreso donita estis, ke mi estis tro fervora kaj kaŭzis grandajn disrompojn en la Estraro de la asocio, sed tio neniam estis eksplicite dirita, kaj la kialo, ke ĝi ne estis eksplicite dirita, estas, ke ĝi ne estis la vero. Ili mem kaŭzis la furoron, speciale post kiam mi konfidence informis la Prezidanton, ke la protokoloj kaj la kontoj ne kongruas; dum la kasisto informadis al ĉiuj, ke la kapitalo malkreskas, la kontoj, laŭ miaj kalkuloj, montris, ke la kapitalo konstante kreskegas. Nur tio, kun analizoj, sed neniuj konkludoj aŭ akuzoj.

Mi do bedaŭris legi la vortojn de José Antonio Vergara, kiu kulpigas la ordinarajn membrojn pro kritikado: "Kontraste, mi tre bedaŭris la diversajn malfacilaĵojn kiujn la estraro de UEA devis alfronti tra la jaro kaj, lige al tio, la akre malsolidaran, kulpigan kritikon flanke de iuj kontraŭ tiu voluntula teamo." La ideo, ke ĉiuj subuloj devas solidare akcepti senkritike ĉion kion diras kaj faras la Estraro, laŭ mi vere tuŝas la kernon de la problemo kaj en UEA kaj en aliaj asocioj. La problemo ne troviĝas ĉe la ordinaraj membroj, kiuj kelkfoje esprimas siajn opiniojn pri aferoj, kaj kelkfoje eĉ prezentas neoportunajn faktojn, sed la reagoj de la elito en la asocio, kiu konstante subpremas iliajn voĉojn, kaj inversigas la kritikojn, kvazaŭ tiuj normalaj membroj estus la fonto de ĉiuj problemoj. Per siaj provokoj, Andreas Kuenzli ebligas, ke ĉiuj kritikantoj estu metitaj en la saman kategorion, kaj estu egale denuncitaj. Tio estas ankaŭ ruzo de la politika elito en diversaj landoj, inkluzive de la mia.

Tiu inversigo estis unu el la unuaj aferoj kiujn mi konstatis kiam en 2005 mi eniris la Estraron de mia landa asocio, por eltrovi ĝuste kio okazas for de la okuloj de la ordinaraj membroj.

Renato Corsetti proksimiĝis al la vera problemo per siaj observoj:

**Negativaj**:

– La perdego de energio kaj tempo por diskuti pri la statutŝanĝo de UEA, kiu estis nek urĝa nek tiom grava el la vidpunkto de la agado de UEA.

– La enfermiĝo de UEA en si mem kaj ĝia malrapida malapero de la gvidantaj fortoj de la movado.

Ĝuste same okazis en mia landa asocio. Ili ŝanĝis la voĉdonadan sistemon en la jarkunvenoj, al kolektiva voĉdonado anstataŭ individua, sen ajna ŝanĝo en la statuto. Mi forte kaj dumlonge kontraŭbatalis tion. Laŭ ili, ĉar ni estas registrita kiel bonfara asocio por ricevi impostajn avantaĝojn, la 'kuratoroj' (elektitaj Estraranoj) havas la respondecon elekti la funkciulojn - do la Prezidanton, Sekretarion kaj Kasiston - kaj ne la membroj. Mi vizitis ilian juran konsiliston por esplori tiun tutan aferon, kaj li informis min, ke la afero ne havas sencon al li pli ol ĝi havas al mi. Estis bela rakonto, per kiu ili amasigis la decidorajtojn al si mem. Post longa batalado mi sukcesis regajni la rajton al la membroj voĉdoni por la Prezidanto, sed tiam mi devis batali por la rajto de la membroj voĉdoni kontraŭ la Prezidanton! Jes, mi ne troigas. La prezidanto voĉdonigis la jarkunvenon, petante voĉdonojn 'por' kaj 'sindetenojn'. Kiam iuj protestis, ke devas esti voĉdono 'kontraŭ' sekvis intensa diskuto de la gvidantoj ĉe la antaŭo, por diskuti kiel solvi la 'problemon'. Fine ili proponis statutŝanĝon, laŭ kiu la membroj havos la rajton elekti la Prezidanton, sed ne la Sekretarion aŭ la Kasiston. Ili ankaŭ invitis al ĉiuj kontribui siajn proprajn statutproponojn, tiel ke la tuta afero plene okupis la Estraron dum duonjaro, dum ili ne progresigis Esperanton.

En UEA mi mem fine ĉesis diskuti pri la statutŝanĝo, kaj finfine mi ne voĉdonis, kun espero ke ne sufiĉe da homoj voĉdonos, tiel ke la rezulto estu nevalida.

La enfermiĝon de UEA mi prikomentis dum jardeko, ĉar ĝuste tiel estis en mia landa asocio. Ĉio falis sur surdajn orelojn, ĉar iuj el la gvidantoj malsincere blokas la liberan diskutadon per ĉiaj rimedoj, inkluzive de tiu falsa akuzo pri uzo de 'insult-vorto' kiam ili mem insultis homojn, sed mi ne.

Katalin Kováts bele priskribis la situacion:

2016 tamen ne estos jaro, kiun mi specife volos memori. Mi eĉ strebos forgesi la ĝeneralan malkontenton de homoj, la malkreskon de la membraro ĉe UEA, la nur promesitajn, sed ne plenumitajn taskojn kaj projektojn.

Iel la movado ŝajnas al mi kiel trupo da turistoj, el kiuj parto per skitelfero celas supreniri pinton de monto, sed blokiĝis meze kaj pendas en fermita kabino senespere super abismo. La aliaj pene kaj ŝvite simple marŝas supren, portante pezajn sakojn kaj multon farante por atingi la celojn.

Ekzistas la timo, ke la «kabinuloj», eĉ se la "ŝlosilfiguroj" mirakle povos refunkciigi la telferon, neniam plu emos eĉ rigardi al la pinto. Mi sugestus reveni rapide al la tero kaj elekti komunan marŝadon, eble pli longan, sed kune faritan.

Jes, ŝi agnoskas la "malkontenton de la homoj", anstataŭ kulpigi ilin, ke ili ne estas obeemaj al la superuloj. Tiu lasta alineo havas rilaton kun la kreskanta raŭmismo, kiun iuj en la centro de la asocio subtile antaŭenpuŝas, inkluzive de Humphrey

Tonkin, en lastatempa numero de la revuo 'Esperanto', pretekstante, ke li elektis 'Trian Vojon' dum li vere donas kredindecon al la ideo Silfer, ke la Esperantistoj estas dividitaj inter tiuj kiuj volas antaŭenigi Esperanton kaj tiuj kiuj nur deziras uzi la lingvon. Silfer enkondukis tiun dividon per la manipula vortumo de La Raŭma Manifesto de 1980. Antaŭe ne ekzistis tia "krizo de identeco".

Renato Corsetti kaj Gbeglo Koffi estis ambaŭ atakitaj de la Direktoro de UEA, Osmo Buller, per evidente falsaj pretekstoj. Mi estis simile atakita de la Direktoro de EAB kaj ilia Prezidanto kaj iliaj akolitoj per simila artefarita preteksto. Ivo Lapenna estis faligita pere kampanjo diskutita en iu seminario pri la temo 'kiel faligi Lapenna'. Oni diris, ke li estas 'diktatoreca'. Ankaŭ tiu estis evidenta preteksto, ĉar tiutempe neniu povis respondi simplan demandon, kion diktatorecan li faris. Estis al mi evidente, ke londona Esperantisto Dermod Quirke estas provokisto kun la celo helpi faligi Lapenna, kaj post dudeko da jaroj tion li skribe konfesis, kaj post pluaj pluraj jaroj tion li diris rekte al mi. Lia stilo, kaj la stilo de Andreas Kuenzli kaj Jorge Camacho estas tre similaj.

La ĉefaj el miaj kontraŭuloj havis klasikan edukon en privataj loĝlernejoj. Se ankaŭ mi estus havinta tian klasikan edukon mi estus en 1973 pensinta pri Julio Cezaro, kies murdintoj donis pretekston, ke li estis diktatoreca. Nur lastatempe mi konstatis, ke tio ja estas preteksto; la vera kialo estis, ke li provis enkonduki leĝojn por limigi la uzurion ĉe la monpruntistoj, kiuj malriĉigis kaj ensklavigis la romanojn dum lia foresto en Egiptio. Simile niaj gvidantoj en NATO ĵus faris kontraŭ Assad en Sirio, kaj Gadhafi en Libio.

La vera kialo ke estis celitaj Ivo Lapenna, Renato Corsetti, Gbeglo Koffi kaj mi ne estis la kialoj donitaj, sed la simpla fakto, ke ni estis gvidantoj en niaj diversaj rondoj en la antaŭenigo de Esperanto kaj de la interna ideo. La ĉefa forto malantaŭ tio venis de la fama studenta Esperanto-Rondo ĉe la Universitato de Kembriĝo ĉirkaŭ 1960, ĉirkaŭ la sama tempo en kiu British Council kaj NSA renkontiĝis en Kembriĝo kaj Oksfordo por plani la hegemoniigo de la angla lingvo kiel unua lingvo por la mondo.

Mi laŭ interkonsento sendis miajn esplorraportojn de 2005 ankaŭ al Humphrey Tonkin kaj al Andreas Kuenzli. Ili havas nenian bonan pretekston ne scii ĝuste kio okazas por faligi la movadon, sed ili ne volas tion agnoski. Humphrey Tonkin insultis min kaj kriis en mian vizaĝon kiam mi demandis al li, kion li opinias pri miaj esplororaportoj. En tiu momento mi subite konstatis, kiel devis esti por Lapenna, ĉar Humphrey Tonkin estis la gvidanto de tiu movado por "faligi Lapenna", kaj li mem transprenis la prezidantecon de UEA post la demisio de Lapenna en 1974.

Sed ĉu vere estas en la interesoj de la subfosantoj en UEA tiom forte malebligi liberan diskutadon de la problemoj, tiel ke sinceraj homoj kun malantaŭkulisaj informoj devas turni sin eksteren al aliaj grupoj por diskonigi siajn spertojn? Nenian 'solidarecon' mi mem sentas en tio. Fakte, en 2006 tuj post la jarkunveno de EAB, en kiu mi estis embuskita de miaj iamaj amikoj kaj kolegoj, mi demetis mian verdan stelon, kiun mi konstante havis sur miaj eksteraj vestoj de la aĝo de 16 ĝis 60, kaj diris al apuduloj, ke mi ne plu portos ĝin en Britio, ĉar mi ne plu identiĝas kun la britaj Esperantistoj.

Ĉiuj, forgesu pri 'solidareco', kaj pensu por vi mem!

Kore salutas Ian

- Raymonde Coquisart

Komisiito pri Ĝemelaj Urboj

La listo pri ĝemelurboj de Seulo

| | |
|---|---|
| Rio-de-Ĵanejro, Brazilo (1960) | Ulanbataro, Mongolio (1995) |
| Tajpejo, Tajvano (1968) | Hanojo, Vjetnamo (1996) |
| Ankaro, Turkio (1971) | Varsovio, Pollando (1996) |
| Gvamo, Usono-Gvamo | Kairo, Egiptio (1997) |
| Honolulu, Usono (1973) | Ottawa, Kanado (1997) |
| San Francisco, Usono (1976) | Romo, Italio (2000) |
| São Paulo, Brazilo | Astana, Kazaĥio (2004) |
| Tehrano, Irano (1977) | Ateno, Grekio (2006) |
| Bogoto, Kolumbio (1982) | Bankoko, Tajlando (2006) |
| Ĝakarto, Indonezio (1984) | Vaŝingtono, Usono (2006) |
| Tokio, Japanio (1988) | Vancouver, Kanado (2007) |
| Moskvo, Rusio (1991) | Mumbai, Barato (2009) |
| Parizo, Francio (1991) | Bau-Bau, Indonezio (2010) |
| Pekino, Ĉinio (1992) | Taŝkento, Uzbekio (2010) |
| Karakaso, Venezuelo (1992) | Bonaero, Argentino (2010) |
| **Tegucigalpo, Honduro** | **Tirano, Albanio (2010)** |
| Meksikurbo, Meksiko (1 | |

Noto

Ni jam sendis du bildkartojn de Tirana laŭpete

- Johan Derks

Hieraŭ aperis la oka numero de *Balkana Verda Stelo.*

Ĉi-okaze la fokuso estas sur la popoloj Romaoj-Sintioj ("ciganoj"; Sintioj estas subgrupo de Romaoj), la plej granda etna minoritato en Eŭropo.

Ĝi havas iom da komuneco kun esperantistoj, kiuj foje konsideras ankaŭ sin kiel "popolon", dise loĝantan sen rekono de sia lingvo, sen ŝtato aŭ ŝtataj organoj.

Sed dum esperantistoj pliparte estas sufiĉe riĉaj por vojaĝi al kongresoj, legi siajn librojn kaj havas ŝtatan identecon, kiu garantias

al ili iom da socia sekureco, sanprizorgado kaj edukado, Romaoj pliparte ne havas tiujn garantiojn kaj mezume vivas dek jarojn malpli longe ol aliaj civitanoj.

Dum la dua mondmilito ili dividis la sortojn kun samseksemuloj kaj judoj kaj da ili proksimume unu miliono estis ekstermita.

Krom pluraj revuaj kaj superrigardaj artikoloj pri la amaso de "ciganoj", BVS ankaŭ donas atenton al dek ses elstaraj romaaj artistoj, kiuj estas tutmonde famaj pro sia kantado, muzikludado kaj similaj scenejaj talentoj.

Aliaj artikoloj en la marta numero de BVS estas:

*"Der Spiegel" pri Esperanto en la lernejoj*

*Kian medicinan lingvon ni deziras?*

*Esperantistoj inter Junularaj Laborbrigadoj en Jugoslavujo*

*Pliaj kursoj de Esperanto por balkananoj*

*Nova takso de nombro da E-parolantoj*

*Miaj spertoj kiel redaktanto de BVS*

En la lasta artikolo mi disiĝas de vi kiel redaktanto de *Balkana Verda Stelo*, ĉar la malgranda nombro da abonantoj ne pravigis la energion kaj tempon, kiun mi ĉiujn tri monatojn dediĉis al vi.

- Mia unua eraro estis ke ene de du jaroj mi povos konvinki vin, ke eblas prezenti ion alian ol alia revuoj: enuigaj priskriboj de sukcesaj renkontiĝoj, de literaturo kiu ne valoras la prezon, de kontaktoj kun gravuloj kaj prezentoj de "Esperanta kulturo", sen tamen alporti la rekonon kaj utilon de nia lingvo, kiun vi kaj mi esperas (krom se vi rezignis pri tio, ĉar vi preferas babiladojn aŭ sensencajn disputojn pri la kaŭzo de la tradicia(j) movado(j))

- Mia dua eraro estis, ke mi kredis en la bezonsento de esperantistoj pri unueco de la lingvo, kontraste al la dekoj da konkurencaj novvortoj, pseŭdoafiksoj, diversspecaj ortografiaj kaj paralingvaj kutimoj, kaj rekte la dekoj da eraroj, de progresintaj esperantistoj, kiuj aŭ neniam studis la jurajn fontojn aŭ asertas, ke Esperanto jam estas matura lingvo, kiu iras sian propran (t.e. ilian) vojon.

- Tria eraro estis, ke mi ne sciis, ke ekzistas popoloj en la Sudorienta Europo, kiu ne volas esti asociataj al la nocio “Balkano”: la Rumanoj, parte la Kroatoj, eble la Grekoj. Anstataŭ fieri pri sia deveno kaj respekti siajn najbarajn popolanojn, ili preferas montri sin superaj al ili. Tiaj orgojluloj ne povas atendi simpation de tiuj, kiujn ili rigardas kulture “malsuperaj”.

Sed tio ne signifas, ke mi rezignas pri la celoj de supernacia kunlaborado, pro kiuj mi startigis BVS. Se vi interesiĝas pri la ŝanĝoj de BVS, vi klaku tie ĉi.

- Peter Redfarn
  Bardhyl, mi bonvenas vian kontribuon al nia diskuto, ĉar Dro Zamenhof kreis nian lingvon por ke homoj kun malsamaj opinioj povu kompreni unu alian. Bedaŭinde vi glutis mensogan propagandon far la riĉeguloj kaj siaj servantoj kontraŭ kdo Presidento Hugo Chavez. La riĉuloj de Venezuelo kaj Usono provis renversi Hugon per milita puĉo sed la soldatoj subtenis lin. Ili provis renversi lin per revokreferendo, sed la popolo subtenis lin. Tiun referendon li mem skribas en konstitucion kaj tia referendo ekzistas, laŭ mia scio, nur en Venezuelo, do tiu lando estas la plej demokrata en la tuta mondo. Ili provas renversi lin per "striko", kiu, kiel en Ĉilio je tempo de Allende, esti striko nur de dungantoj , sed la laboristoj subtenis lin.

Neniu registraro estas perfekta, kaj Chavez faris kelkajn erarojn ekz permesi kapitlistoj aliĝi al sia Unuiĝita Socialisma Partio, malfermante vojon al koruptigo, sed  estas nur unu grava kaŭzo de venezuela problemo t. e. ke ĝia ekonomio dependas de nafteksporto. La tn okcidentaj "demokrataj" landoj elektis aĉeti nafton el eble la plej maldemokata lando de la mondo, Sauda Arabio, anstataŭ la plej demokrata. Chavez respondis al tio ĉi per du metodoj. Li pruvis diversigi la ekonomion. Li fondis Bolivaran Aliancon. Tiu unio enhavas Bolivion, Kubon, Nikaraguon, Ekvadoron kaj sep malgrandajn karibajn landojn. Mi opinias ke se Brazilo, Argentino, Urugvajo kaj Meksiko aliĝus al tiu Alianco ĝi povas stari kontraŭ la forto de Usono kaj Ĉinio kaj ekonoma problemo de Venezuelo finiĝus.

Kubo havis malsaman historion je la aliaj landoj de la Alianco. Pro blokado de mafiemaj usonaj registraro, Kubo devis alianci kun Sovetunio. Iĝis unupartia ŝtatoj, sed la aliaj dek landoj de la Alianco estas vere demokrataj. Homoj kiuj vizitis Kubon por la du UKoj (mi partoprenis la lastan) konstatis pri mensogado pri tiu lando ankaŭ.

Mi havis la privilegion de vidi Hugon kiam li vizitis mian urbon Londono. La estabuloj bojkotis lin. Bonvenis lin nur la loĝantaro de Londono kaj nia tiama urbestro Kenjo Livingstone. Livingstone subskribis traktaton aĉetante venezuelan nafton por niaj aŭtobusoj.

Vivu socialismo, demokrateco kaj la bolivara revolucio! Kondelenco al albananoj, kiu iris el la diktoreco de Zog al tiu de Hoxha per tiu de Mussolini!

- Ĉinio degeneris de jam degenera maoismo al ekspluatemoza ŝtatkapitalismo. Baraton regas hinduaj faŝistoj. La lando restas socimore subevoluinta sub hindua hegemonio, pogromoj kontraŭ islamanoj, ktp. Ambaŭ socisisistemoj estas fekujoj.

  Oni gajnos mulmultan sagacon el la komunistaj kadukuloj kaj ceteraj mensmalsanuloj ĉi tie.

- **jose.antonio.vergara.olavarria@gmail.com**

  Mi shatas la fakton ke vi senhezite nomas "totalisma" la reghimon kiu tiel mizere regis vian landon dum pluraj jardekoj.
  Kun sincera respekto al via sperto kiel albano kiu travivis tiajhojn, mi pensas pri la deliroj de la malgrandaj komunistaj sektoj de iamaj mauistoj kiuj post 1978 sin deklaris "hoghaistoj", t.e. "marksismaj-leninismaj kontraureviziistoj" kaj ekkonsideris la vialandan diktatoron Enver Hogha sia ideologia gvidanto... Ili daure havas sian fantoman internacion "Internacia Konferenco de Marksitaj-Leninistaj Partioj kaj Organizajhoj" (CIPOML).
  Sub la sama nomo vegetas alia kolekto de similaj grupoj kiuj tamen sin deklaras mauistoj, sekvantoj de la t.n. "marksismo-leninismo-Mauzedongpenso".
  Kiel ghene ke preskau en chiuj iamaj "socialismaj" landoj la chefaj komunistaj aparatchikoj, koruptitaj jam de longe, ighis furoraj kapitalistoj kaj enrichighis profitante la konfuzan transiron komence de la 1990-aj jaroj.
  Kaj la novaj, t.n. socialistaj partioj naskitaj de la regintaj shtatpartioj, ofte estas same koruptaj kaj entuziasme novliberalaj.
  Vershajne la sola respektinda partio kiu havas tiun originon estas La Maldekstro, en Germanio (Die Linke).
  Lau via raporto, mi havas la impreson ke vi subtenas la Demokratan Partion, kiu fakte shajnas esti feroce dekstra. Tia estas la situacio en multaj landoj, do katastrofa manko de veraj politikaj alternativoj por institucie strebi al pli justa socia, ekonomia kaj politika ordo.
  José Antonio Vergara Chilio

- Renato Corsetti

  Saluton, Bardhyl! Vi skribis:
  |
  *Kompreneble la komunisma ideo ne povus progresigi iu ajn landon.*
  .
  Provu kompari Ĉinujon kaj Baraton. Ĝeneralaj asertoj estas danĝeraj.

  Amike

- Bardhyl

  La komparo de Ĉinujo kun Barato:

Homrajtoj en Barato estas respektataj dum en Ĉinujo ne.
La laboristoj en Barato enspezas pli multe.
La medio en Ĉinujo estas miseksspluatita ĝisekstreme
La edukiĝo, la scienco, la arto en Barato disvolviĝas sen baroj ideologiaj.
Ĉinujo promocias militarismon
Ktp
Ĉu tio ne elmontras ke komunismo, eĉ ĉinia ne progresigas la landon?

Reago alia

Barato havas mizeron, Ĉinujo ne.

Barato vivas ĉiam en milito, Ĉinujo ne.

Barato estas kontrolada de internacia kapitalisto, Ĉinujo ne.

Barato ne havas komercistoj en ĉiuj landoj, Ĉinujo havas ĝin.

Kiun rilato havas kapitalismo aŭ  komunismo kun honesteco de socio?

- Ian Fantom

Nu, la faligon de la registaro en Sirio oni planis en la dokumento 'Clean Break: A New Strategy for Securing the Realm' [Rekta Rompo: Nova Strategio por Sekurigi la Regnon] jam en 1996!

Tiun dokumenton komisiis Benjamin Netanyahu de la usonaj novkonservativuloj. Ĝi celis esence la landojn kiuj havas sendependajn bankojn, kiuj ne estis parto de la Rothschild-regataj centraj bankoj. Ili antaŭvidis, ke la usona publiko ne toleros militadon sen ke estu ia 'katastrofa kaj kataklisma evento kia estis Pearl Harbor'. Tiu evento estis 9-11, kiu ebligis la sekvajn militojn.

Notu la ambiguecon 'sekurigi la regnon'. Usonanoj certe supozis, ke tiu regno estis Usono, sed konsiderante ke Netanyahu estis en Israelo, kaj la novkonservativuloj estas forte ligitaj al la tre influava lobiada grupo AIPAC en Usono, tiu ambigueco verŝajne estis plene intenca.

Verŝajne estas ankaŭ aliaj konsideroj, kiel tiu gasdukto - kaj tio parte klarigus, kial Kataro estis kun Israelo kaj NATO rilate al Sirio. Tio fakte kaŭzis plurajn demisiojn inter la ĵurnalistoj de Al Jazeera. En la kazo de Afganio la oledukto verŝajne estis serioza konsidero, ĉar Afganio ne estis en la listo donita en tiu Rekta Rompo. Estis strange: Usono volis tuj post 9-11 invadi Irakon, sed la gvidanto de la brita MI5 avertis, ke ili ne faru, sendube ĉar ili ne sukcesu konvinki la publikon pri ligo inter Irako kaj 9-11. Do ili invadis anstataŭe Afganion por komenci la militadon, kaj poste transigis tion al Irako pere de aliaj pretekstoj.

Oni konstante prezentis pretekstojn, kaj dividis la homojn, ĉefe pere de la religioj.

- Jairo Augusto Dos Santos

Oh Peter!!!!! Mia Dio! :-o Oh veeee! Li vere elprenis la vortojn el mia buŝo! Peter simple legis mian menson tiu estas tute netolerebla!!!!!  :-D

Sed nu... mi volas fari kontraŭ penso... ne nur simpla ideo por kontraŭstari simple, por esti enua,... (si hay govierno soy contra! [se estas registaro mi estas kontraŭ]) Tute ne!!!!!!

Imagu vi, ke Ĉaves estis kruela diktatoro envere. Imagu ni, ke la ideoj kiuj li metis al Venezuelo estis vere la provoko de sia ruino. Nu...mi ŝatus memori ian veran negativan punkton de li laŭ mia vidpunkto sed mi ne memoras nun sed ne gravas.... permesu vi ĉiuj eki per la ideo, ke mi ne ŝatas Ĉaves por ia ajn motivon....

Nu.. ĉu ne estus tute maldemokratia sinteno se mi, iu eksterlandano kiu tute ne konas la intimajn problemojn de venezuelanoj, konkludis, ke Ĉaves estas diktatoro? Ĉu ne estus aroganta diri, ke se Ĉaves pensus laŭ miaj ideoj li estus pli bona registaro por Venezuelo? Mi jam renkontis venezuelanon kaj demandis al li, kion li opiniis pri Ĉaves kaj li diris..: laŭ mi Ĉaves estas bona homo. Se li ne estus bona, mi ne havus monon por veni tie ĉi al Brazilo kaj koni vin. (Tiu venezuelano amegis Brazilon kaj celis vivi tie ĉi sed li bezonus laboron) .

Mi kredas, ke Ĉaves estis problemo de Venezuelo ne nia problemo. Se ni volas scii ĉu Ĉaves estis bonulo aŭ malbonulo, ni devus scii de venezulanoj ne de usonaj programoj.

Sed malgraŭ tio, la opinio de Bardhyl estas tre bonvena. Kiu scias mi ne trovas ian veran pravan motivon por malami socialismon? Mi ŝategas legi liajn tekstojn pri lia vivo en sia Albanio.

Kaj pri la eraro de Ĉaves kaj via opinio pri Brazilo, Peter, nu.... jes... Ĉaves faris la samajn erarojn de Dilma. Li permesis vivi en demokratio homojn kiuj luktis kontraŭ ĝi, kiel ni esperantistoj aŭdas kaj konsideras esperantitojn, kiu atingas bonajn postenojn de gvideco en nia movado, homojn kiuj kontraŭbatalas Eon!!! Tiu faris Dilma en Brazilo kaj vi bone scias kion okazis al ŝi. Ni ne povas permesi vivi en demokratio homoj kiuj celas detrui ĝin! Ni almenaŭ devas rekoni ilin por permesi ilin libere sin esprimi. La demokratianoj devas povi aŭdi iliajn ideojn sed tute konsciaj, ke tiuj ideoj detruus la demokration.

La revuo "Carta Capital" [kapitala letero] mencias la akordon inter Brazilo kaj Ukrainio pri la spaca bazo de Alcantara. Kiam Ukrainio decidis havi registaron pro Usono la traktato estis tuj malfarita kaj nun Jose Serra kaŝe diskutas la permeson de ekpluatado en Alkantara per Usono.

https://www.cartacapital.com.br/politica/a-corrida-aeroespacial-estamos-na-estaca-zero


Mi kondolencas  pro Albanio ĉar ĝi ŝajnas sekvi la saman vojon.


- Vilhelmo Luterman

mi estis en Karakaso antaŭ kelkaj jaroj, kaj la gazetoj, la televidoj, la radioj kaj preskaŭ ĉiuj homoj, kiujn mi renkontis en Karakaso - kun la escepto de la plej multaj Esperantistoj - estis fulme kontraŭ Chávez. Mi neniam vidis tiom impresan kaj emocie ŝarĝitan lavangon da unueca propagando.
Mi loĝis ĉe Esperantisto, italdevena, kiu poste forlasis la landon por ekloĝi en Italujo. Li diris same kiel la amaskomunikiloj. Krome li diris, ke estas en Venezuelo dekoble pli da virinoj ol da viroj. Mi prenis tiun kiel ŝercon kaj ridis, sed li diris, ke estas vere, oni bezonas nur iri sur la straton kaj vidi. Mi diris, ke tio maleblas, ni rigardu la statistikon. Kaj li: ĉu vi fidas la statistikojn de tiu ĉi merda ŝtato?
Jes, tiel pensis la homoj en la centro de Karakaso. Se oni levas la okulojn, oni vidas, ke ĉirkaŭ la urbo leviĝas montoj plenaj de domoj - la malriĉaj kvartaloj, kie loĝas la plimulto, ĝis antaŭ nelonge analfabetaj, kies unua generacio, sub Chávez, nun scias legi kaj skribi kaj la unuaj iras en universitato kaj ili por la unua fojo konis kuracistojn - kiuj venis el Kubo.
Oni devas vidi la historion de Venezuelo. La bonstatuloj vivis per la mono de la eksportata petrolo, oni ĉiajn konsumaĵojn importis - oni apenaŭ bezonis la plimulton de la popolo, kiu vivis mizere, analfabete kaj sen kuraca servo. Tio esence ŝanĝiĝis kun Chávez, kiu alidirektis la plaj grandan parton de la petrolenspezoj favore al la ĝis tiam neglektitaj klasoj kaj tavoloj. Kompreneble tio ne plaĉas al la bonstata tavolo, en kies manoj estas preskaŭ ĉiuj amaskomunikiloj, ĝis hodiaŭ, kies enhavo estas preskaŭ sole aŭdata kaj disvastigata eksterlande kaj kiu fidele atingas ankaŭ la lastan angulon de Albanujo.
Cetere Kubo, pri kiu vi ankaŭ skribis ion. Hazarde mi loĝas en Kubo kaj nun ne havas tempon por skribi pri tio - okaze mi certe skribos ion -, sed povas nur konsili informi sin iom pli zorgeme pri la tuta realaĵo kaj ne absolutigi kelkajn larĝe disvastigitajn propagandaĵojn.
Pri la stalinismo: Mi baldaŭ finos la tradukadon de tiu libro, sed se vi deziras, mi povos jam disponigi la ĝisnunan staton (proks. kvar kvinonoj), jam sufiĉe interesan.

**Informaĵoj**

- La Laŭzana Esperanto-Societo






La Laŭzana Esperanto-Societo realigis en 2016, mallongan filmon, cadre de konkurso organizita de Ĉina Radio Internacia; la temo estas TEO KAJ AMO. Ni elektis vizitigi nian regionon svisan. La titolo de nia video estas TETASO AMAS VOJAĜI.

Nia filmo partoprenas inter 77 realigaĵoj venintaj el 5 kontinentoj. Ĝi nun aperas enrete kaj estas proponita al la voĉdono de la interretularo. Mi proponas al vi subteni nian "verketon" donante vian "klikon". Pri tio necesas al vi:

1. Eniri la retlokon: http://esperanto.cri.cn/teokajamo2016e/filme.htm
2. Malsupreniri en la paĝo ĝis la titolo "Eŭropo" kaj malfermi ĝi. La filmo aperas kiel la unua.
3. Por spekti la videon, kliku en la mezo de la foto kaj momentete atendu.
4. Poste, ne forgesu kliki sur "voĉdoni".

En la 4-a linio estas dua filmeto de ni, kiu nomiĝas: AMIKA INVITO en kiu vi plezure vidos Sylvette kaj Marguerite kiuj Gekaraj,

La Laŭzana Esperanto-Societo realigis en 2016, mallongan filmon, cadre de konkurso organizita de Ĉina Radio Internacia; la temo estas TEO KAJ AMO. Ni elektis vizitigi nian regionon svisan. La titolo de nia video estas TETASO AMAS VOJAĜI.

Nia filmo partoprenas inter 77 realigaĵoj venintaj el 5 kontinentoj. Ĝi nun aperas enrete kaj estas proponita al la voĉdono de la interretularo. Mi proponas al vi subteni nian "verketon" donante vian "klikon". Pri tio necesas al vi:

1. Eniri la retlokon: http://esperanto.cri.cn/teokajamo2016e/filme.htm
2. Malsupreniri en la paĝo ĝis la titolo "Eŭropo" kaj malfermi ĝi. La filmo aperas kiel la unua.
3. Por spekti la videon, kliku en la mezo de la foto kaj momentete atendu.
4. Poste, ne forgesu kliki sur "voĉdoni".

En la 4-a linio estas dua filmeto de ni, kiu nomiĝas: AMIKA INVITO en kiu vi plezure vidos Sylvette kaj Marguerite kiuj aktoras. Ĉi tie ankaŭ vi povos spekti la videon laŭ la punktoj 1 ĝis 4 kaj voĉdoni.

Vi sciu ke vi povos re ... re ... re ... vocdoni ĉiutage senprobleme ĝis la 10-an de aprilo 2017; la reguloj ĝin permesas.

Disvastigu tiun mesaĝon al viaj geamikoj. Korajn salutojn al vi el la membraro de Laŭzano - Svisalando.

Por la komitato:
Francisko Randin, sekretario.
aktoras. Ĉi tie ankaŭ vi povos spekti la videon laŭ la punktoj 1 ĝis 4 kaj voĉdoni.

Vi sciu ke vi povos re ... re ... re ... vocdoni ĉiutage senprobleme ĝis la 10-an de aprilo 2017; la reguloj ĝin permesas.

Disvastigu tiun mesaĝon al viaj geamikoj. Korajn salutojn al vi el la membraro de Laŭzano - Svisalando.

Por la komitato:
Francisko Randin, sekretario.

Katalogo pri profesiistoj:
http://profesiulo.info

Salutas vin Paolo Cezar

- ***ALTERNATIVO POR IPERNITY...***

La fama socia reto Vkontakte (VK) ankaŭ en Esperanto!

Bona novaĵo por Esperanto, kaj por ĉiuj kiuj ekhavis problemon pro la anonco pri Ipernity-malapero: ekde nun vi povas paĝojn de la retejo "Vkontakte, VK" por konservi, disvastigi, kundividi viajn diversajn esperantaĵojn.

VK estas bona interŝanĝilo kaj konservilo (arkivejo) kaj estas **tute senpaga**. Ĝi estas pli uzant-amika ol Facebook kaj aferojn pli facilas tie stoki, konservi kaj re-trovi denove *(malkiel ĉe FB, kies ĉefa celo estas tamen iom malsama)*. Granda avantaĝo estas, ke **vi povas uzi la retpaĝon en Esperanto,** ĉar nia nuna E@I-volontulo Ilja Gnusarev el Rusio preskaŭ ĝisfine tradukis ĝin.

En la retpaĝo vi povas senprobleme el/alŝuti videojn, sonregistraĵon, dosierojn, bildojn, fotojn diversformate. Iru al http://vk.com, registriĝu kaj ne forgesu elekti Esperanton kiel lingvon de la interfaco! La retejo estas havebla krom en Esperanto en pli ol 80 lingvoj.

Se vi do daŭre ne trovis taŭgan retspacon por konservi viajn materialojn de Ipernity, aŭ simple serĉas similan retejon, pripensu uzi eble ĝuste "VKontante" – efektive estas granda ŝanco ke la aferoj restos tie longdaŭre, kaj ke la projekto restos perspektive funkcianta.

Por tiuj, kiuj ne konas la projekton – temas efektive pri la plej granda rusa socia reto, kiu havas **dekojn da milionoj da uzantoj**. Same tre utilas, ke ekzistas ankaŭ aplikaĵoj por ĉiuj 3 ĉefaj operaciaj platformoj por poŝtelefonoj. Ĝi ja estas **la 4-a plej vizitata retejo en la mondo**, kun 90 milionoj da uzantoj ĉiumonate. Kiel la retejo skribas pri si mem: "VK estas socia reto por rapida kaj oportuna komunikado inter homoj en la tuta mondo. Tasko de VK estas en ĉiu aparta momento resti la plej moderna, rapida kaj estetika komunukiĝmaniero en la reto."

Do jen, ekuzu ĝin eble ankaŭ vi, kaj rekte en Esperanto!

E@I-teamo, Peter Balaž

*Fonto: http://blogo.ikso.net*

- Revuo Kontakto

---

Sano kaj Malsano - Kontakto 2016:6 en la reto!




Saluton!
Unue mi volas esprimi mian dankon al ĉiuj, el kiuj kelkaj eĉ ne konanta min persone, sendis ian apogan mesaĝon al mi spure de la lasta redakcia enkonduko, en kiu mi informis pri la malfeliĉa okazaĵo fine de la pasinta jaro. Tiaj mesaĝoj estas ja helpaj psikologie. Kiam proksimulo spertas mortoperdon, ni ne scias kion diri, sed sufiĉas kelkaj amikaj vortoj por ke vi faru la amikon senti iomete pli bone kaj tia gesto ne estos forgesata.

Ne hazarde, nia nuna eldono prezentas la temon "Sano kaj Malsano" kiel ĉefartikolo. De Juan Carlos Monteiro el Kubo venas la artikolo pri kuracisto, kiu helpis la batalon kontraŭ la Ebola-disvastiĝo en Sieraleono. Li infektiĝis kaj grave malsaniĝis, sed post kuracado revenis por daŭrigi la laboron. El Ĉeĥio, Max Kašparů prezentas hipnoterapion kaj ĝian uzadon en medicinaj fakosferoj. Ana Ribeiro el Brazilo proprasperte asertas ke por bona sano gravas ne droniĝi en farendaĵoj kaj havi tempon por si mem. Laste pri la temo, patro, kiu perdis sian filinon pro komplika sanproblemo en juna aĝo, rememoras la tragedian situacion kaj meditas prie.

Nia gasto en la intervjua rubriko estas mia konato delonge, ĉar mi estas admiranto de lia muzika laboro sed, malgraŭ tio, mi konfesas ke ĝis ĉi tiu intervjuo, mi neniam eĉ provis prononci la familian nomon de Amir Hadžiahmetović, sed li malkovrigis al mi la sekreton: Haĝiahmetoviĉ. Kun la kunlaboro de multaj gastoj, Amir kiel gitaristo kaj kantisto de la bando Espo Despo lanĉis albumon per kiu li revizitas siajn muzikajn radikojn en Bosnio kaj Hercegovino.

TEJO-Tutmonde, sub la redaktorado de Massimo Ripani nun iĝis Movada Rubriko. KontakTEK speciale por ĉi tiu numero aperigis notojn nur rilatajn al medicino. En Recenzoj vi povas legi pri du KD-oj eldonitaj ankoraŭ en 2016. La Blaga Blogo rakontas pri "perfekta" murdoplanado; en Tiel la Mondo, István Ertl preferas ne prognozi pri tio, kion li verkos en 2017, ĉar neantaŭvideblaĵoj tro oftas en la mondo. Vizaĝojn de kelkaj homrajtaj herooj vi konos danke ankaŭ al Ertl, sed al Klara, filino de István. Eĉ kolorigitajn fotojn de la pli ol centjara Titanic vi trovos ĉi-numere. Mi esperas ke vin ne tro ĝenas la nuna malfrua apero de la numeroj. Mi

promesas ke mi faros ĉion eblan, laŭ miaj ne tiom fidindaj fortoj, por akuratigi. Dum la jaro, mi esperas, mi fariĝos pli menskapabla por akurate liveri al vi la karan *Kontakto*.

La elŝutado de tiu ĉi numero eblas nur por abonantoj. Por elŝuti ĝin vi devas iri al la paĝo http://reto.uea.org/, ensaluti kaj poste elekti la sekcion "Teko". Se vi ankoraŭ ne estas abonanto, vi povas tuj aboni ĝin per reta abonilo. Laŭ la nova reguloj, homoj ĝis 35 jaroj daŭre estas TEJO-memboj. La "novaj junuloj" jam povas elŝuti *Kontakto*-n, sed kun nepra kondiĉo, ke en la datumbazo de UEA estu registrita ilia naskiĝdato. La elŝutado de *Kontakto* por 30-35-jaruloj estas funkciigita nur en la ĉefa retejo: uea.org/revuoj/

Kore, Rogener PAVINSKI Redatoro de *Kontakto*

- **MESAĜO DE LA ĜENERALA DIREKTORO DE UNESKO, S-INO IRINA BOKOVA, OKAZE DE LA INTERNACIA TAGO DE LA GEPATRA LINGVO, LA 21-A DE FEBRUARO 2017**

Okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, Unesko rekonfirmas sian kompletan engaĝiĝon por lingva diverseco kaj multlingveco. Lingvoj esprimas tion, kio ni estas, ili formas niajn pensojn kaj identecojn. Ne povas okazi aŭtenta dialogo, nek efika kunlaboro internacia, sen respekto al la lingva diverseco, kio permesas al ni la veran komprenon de ĉiu kulturo. La alireblo al la diverseco de la lingvoj povas veki la scivolemon kaj reciprokan komprenon de la popoloj. Tial la lingvolernado estas samtempe promeso pri paco, novigo kaj kreiveco.

*La Internacia Tago de la Gepatra Lingvo*, dediĉita ĉi-jare al la multlingva edukado, estas samtempe okazo alvoki pri ago por la realigo de la celoj de la daŭripova evoluo, konkrete pri la 4-a celo: 'Garantii inkluzivan kaj egalecan bonkvalitan edukadon kaj plivastigi por ĉiuj la ŝancojn por tutviva lernado'. La edukado kaj la informado en la gepatra lingvo estas absolute esencaj por plibonigi la lernadon, kreskigi la memfidon kaj sinestimon, kiuj estas la plej potencaj motoroj de la evoluo.

Ni estas lingvaj estaĵoj. La kulturoj, la ideoj, la sentoj, eĉ la deziroj pri pli bona mondo prezentiĝas al ni, unue kaj ĉiam, en iu konkreta lingvo, per specifaj vortoj. Tiuj lingvoj entenas valorojn kaj viziojn pri la mondo, kiuj riĉigas la homaron. La valorigo de tiuj lingvoj plilarĝigas la liston de eblaj futuroj, kaj kreskigas la energion bezonatan por atingi tiujn. Okaze de tiu ĉi tago mi alvokas pri la agnosko de la potenco de multlingva edukado ĉie, en la edukaj kaj administraj sistemoj, en la kulturaj kreaĵoj kaj en la amaskomunikiloj, en la interreto kaj en la komerco. Ju pli ni kapablos valorigi la lingvojn, des pli ni havos ilojn por konstrui futuron dignan por ĉiuj.

Irina Bokova

**NOVA REDAKTORO-PARO POR LA REVUO "ESPERANTO"**

*Unuafoje en la historio de la revuo Esperanto, ĝi oficiale havos du redaktorojn, la geedzan paron**Dima Ŝevĉenko (31) kaj Anna Striganova (29)**. Tiel decidis la Estraro de UEA, kiu intervjuis ankaŭ du aliajn bonajn kandidatojn por sekvi Attila Kaszás en tiu grava posteno.*

Ni estis tre impresitaj de la propono, per kiu Dima kaj Anna kandidatiĝis, komentas la prezidanto de UEA, Mark Fettes. Ili kune disponas pri granda gamo de kapabloj, ne nur pri la enhava redaktado, sed ankaŭ pri grafiko kaj enpaĝigo kaj pri la reteja flanko de la revuo. Tiu kombino de fortoj ŝajnas al ni tre promesplena.

Ambaŭ homoj laboras partatempe ĉe la prestiĝa Rusia Universitato de Amikeco inter la Popoloj en Moskvo, kie ili studis ĵurnalismon (Dima) kaj literaturon (Anna) ĝis nivelo de magistriĝo kaj jam preparas doktorajn disertaciojn por defendo. Ĉe Dima, denaska esperantisto, la diplomverkoj ĉiam rilatas al Esperanto kaj ĝia loko en la mondo de amaskomunikiloj. Interreto grave rolas en ilia nuntempa laboro, ĉu en praktika laboro pri la retejo de la Filologia Fakultato, ĉu kiel instrutemo kaj esplorobjekto. Kvinjara laboro ĉe la rethotela kompanio “masterhost” donis al Dima multajn teknikajn konojn sur tiu kampo.

En Esperanto, ili estas konataj kiel la **gvidantoj de la grava eldonejo Impeto,** kiun fondis en 1992 la gepatroj de Dima, Aleksandr kaj Elena Ŝevĉenko (kune kun Dimitrij Perevalov). De tiu tempo la eldonejo aperigis pli ol 300 librojn en Esperanto kaj la rusa lingvo. Post la forpaso de la fondintoj (Aleksandr en 2012, Elena en 2015), Dima kaj Anna sukcese pluportas la torĉon. Per tiu okupo ili lernis multe pri tekstoredaktado kaj enpaĝigo, same kiel pri la interesoj kaj preferoj de la Esperanta libromerkato. *(Retejo de ilia eldonejo Impeto: http://impeto.trovu.com )*

Ili estas aktivaj en la moskva Esperanto-movado, kie ili organizis plurajn popularajn aranĝojn. Ili kunlaboras ankaŭ pri instruado de Esperanto en diversaj medioj.

Anna kaj Dima transprenos la revuon ekde la aprila numero 2017. Kune kun la preparado de sia unua numero, ili planas krei **modernan retejon de la revuo**, kiu celos interagi kun la abonantoj kaj aŭtoroj, kiel ili proponis en sia kandidatiĝa letero. Tia integriĝo de la tradiciaj paperaj eldonaĵoj en la interretan mondon estas por ili aparte interesa, teorie kaj praktike.

*laŭ gazetara komuniko de CO de UEA*

- **Adil Olluri en la revuo PENSEO**

9 n-ro 304 penseo

tiujn sur la vost'
azena tre zorgeme,
vi trovos, je ajna kost'
mi pravas ĝis ost'."



**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarango xa,xa,a (x=senrima).*

## Sero (Ĉinujo)

### Neĝa pejzaĝo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Neĝ'
tenas per blanka sieĝ'
la teron
jen sen ajna breĉ'.

Roj'
fermas buŝon kun malĝoj'
ŝajn-morte
kuŝante ĉe l' voj'.

Sur
arboj pendas branĉoj nur
de glaci'
en venta susur'.

Bird'
serĉas grenerojn en bild'
arĝenta
per la beka mild'.

El
herboj kuras en blank-hel'
leporo
panike en gel'.

Bru'
en park' aŭdiĝas ne plu,
nur restas
bril-blanka enu'.

Hom'
sola neĝon antaŭ dom'
balaas
sur blanka gazon'.

Fum'
kuira en hela lum'
spirale
leviĝas jam nun.

Bril'
de l' suno kun malfacil'
penetras
per lanta suspir'.

Mond'
tuta jen en frida ond'
tremetas
al neĝa renkont'.

**Deskses-Silabo: ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimarango a,a,xa (x=senrima)*

## Adil Olluri



### La dezertinto

Avni estis tipo ne scianta facile ĝojiĝi, nek malĝojiĝi, eĉ pro iu parolo, estante unu el la plej prudentaj knaboj inter siaj amikoj. Li ne estis kelkiu tiel multe fortimanta, nek unu el tiuj kiuj orgojlas pro faritaj aŭ nefaritaj bravaĵoj, kiel ja faris multaj el liaj sambatalantoj. Li simple plenumis sian taskon, tiel kiel ordonis liaj superuloj. Tian soldaton aspirus havi al si ĉiu militgvidanto.

Li, dum tiuj du jaroj de la jarcentofino, estis vundita dufoje, eĉ la duan fojon nur gracila linio dividis lin de la morto, ne postlasintajn vivsignojn longajn minutojn. Ĉar

—1637—

- Origamio
  Kara, vian mersaĝon de 22a de januaro mi transdonis imediate al s-ro Shaban Hasani. La veron dirante mi persone neniam aŭdis pri origamio kaj origamiistoj. Estus bone ke vi klarigu ion rilate tion. Kiel ajn ni povus publikigu vian programon kaj agadon.
  Origamio estas populara en multaj landoj japana arto de paperfaldado. Oni sukcesas tiel faldi la paperon, ke rezulte aperas diversaj figuroj.. En multaj urboj estas tiuj homoj, ofte ili unuiĝas en la kluboj. Por ni estas preskaŭ neeble alveni en Kijevo, pro financaj kialoj. Kiel ajn, bv atendi la respondon de nia prezidanto mem. Ni restu en kontakto, amike Bardhyl Tamen ni esperu... Eble elekti iun lokan la plej aktivan esperantiston, kolekti potl tiu

monhelpon kaj li/ŝi venu al ni kiel via delegito, ĉu?

Amike, Mikaelo.

---

**Esperanto en bildoj**






Dubrovnik, foto Sogilsu






Kotor, foto Sogilsu

# Hejmaĵoj





Sofo
Lito
Komputilo
Bildo
Bankuvo
Ŝranko
Lavabo
Bretaro
Seĝo
Tablo
Fridujo
Spegulo
Ludiloj
Vestaĵoj
Televidilo




- **Proponoj**

**Yoshiko Miyoshi**

Mi estas Etsuo Miyoshi el Japanio. Mi volas antaŭenigi la E-movadon, kiel estis la deziro de Ludoviko. Mi skribis artikolon por la revuo Esperanto kiel aneksite, sed ili ne aperigis. Bv legi ĝin kaj respondi la subajn punktojn kaj doni vian opinion ene de semajno. kolektinte la rezultojn, mi analizos ilin kaj poste informos tion al UEA kaj la amaskomunikiloj en E-ujo kaj en la mondo.

Ph. V. Parijs T. Pogge W. Kymlicka Etsuo Miyoshi

Bv konservi nur vian elekton

1- Ĉu aperigi mian artikolon en la revuo Esperanto? Jes / Ne / Sindeteno
2- Ĉu aperigo de ĵurnalaj anoncoj? Jes / Ne / Sindeteno
3- Ĉu transloki UEA al Bruselo? Jes / Ne / Sindeteno
4- Ĉu transigi servojn kaj produktojn de UEA al malpli kosta lando? Jes / Ne / Sindeteno
5- Via opinio

Sube vi povas aldoni la tekston, kiun mi alkroĉe sendas.
koran dankon pro via subteno!

Kiel konduki la E-Mondon?

La usona filozofo T. Pogge asertis, ke konante pri maljusta angla dominado de riĉaj landanoj, alpuŝi la anglan al la mondo samas al murdo kaj ŝtelado, rajto pri uzurpo al malriĉaj landanoj, devas esti urĝega temo por reformi en la nuna mondo.

La belga politikerudito Ph. V. Parijs diris, ke nur la denaskaj angloj ricevadas komplezon, kio kreas maljustan mondon. Almenaŭ duono el la anglalandanoj devas pagi la kostojn por lernigi la anglan al neanglalingvanoj.

Aliflanke, la kanada politika sciencisto W. Kymlicka opinias, ke la moviĝo de EU iom post iom limiĝas pro la anglalingva elito. Estas granda risko pri neniiĝo de la demokratia bazo, se oni ne diskutas pri societo, ekonomio kaj gravaj aferoj, inkluzive de aliaj decidoj per ĉiutaga lingvo.

La lingva erudito R. Phillipson:Forlasinte siajn koloniojn, Anglio kaj Usono profitis per politiko kaj komerco, kio rezultis en havado kaj antaŭenigo de hegemonia pozicio por la angla per nacia strategio! 1993: pro IMF-financaj kondiĉoj oni devis ŝanĝi la edukadon de la svahila al la angla, ktp.

Diversaj gravuloj jam konscias, ke la angla dominado ne bonas, tial necesas strategio por trafe kontraŭstari. BonŝanceE-mortintoj heredigis al UEA por la diskonigo de la Movado! Ni respektu ilian volon. Ŝancoj por esti aŭskultitaj ekzistas. Ni povas aperigi nacilingve 10-foje tutpaĝe la saman anoncon en la plej prestiĝaj ĵurnaloj en ĉiu EU-lando. Tio estos ja vetado, sed se oni ne vetas, nenia renversiĝo okazos.

Plie, ni memoru, ke en 1955 UEA translokiĝis al la havenurbo Rotterdam kaj nun troviĝas en donacita domo. Ĉu ne venis jam tempo nin demandi, ĉu efektive havenurbo estas la plej ĝusta loko por la sidejo de nia Movado?

Bruselo estas la ĉefurbo *de facto* de EU. Ĝi estas efektive la plej trafa loko por lobiado antaŭ diversaj politikaj instancoj de EU kaj ankaŭ ĉe NRO'j. Por profiti je tio, ne sufiĉas nur fojaj vizitoj al Bruselo, sed daŭre restadi tie kaj forte aktivi en la ĝusta loko. Eblecoj por renversigo de la monda ordo ekzistas kiel supre dirite, aŭ ĉu ni ĉiuj senesperiĝis kaj agas kiel hobiistoj?

Konsiderante nian nunan forton, sufiĉus malgranda oficejo kun minimuma stabo: direktoro kaj sekretario. La aliajn servojn kaj produktojn de UEA oni transigu al landoj, kie kostoj estas konsiderinde pli malaltaj. Jen nur kelkaj ekzemploj:

| | Minimumaj salajroj | Poŝto ĝis 50 gr. | Vivkosta Indekso |
|---|---|---|---|
| Nederlando | EUR 1,501 | EUR 2,50 | 167 (Rotterdam) |
| Pollando | EUR 430 | EUR 1,22 | 38.53 |
| Brazilo | EUR 219 | EUR 1,47 | 38.88 |
| Ukrainio | EUR 48 | EUR 0,05 | 28.56 |

Aĉeto de plia domo en Rotterdam pli enradikigos nian Asocion tie kaj malfacile eblos moviĝi. Nun estas decida tempo por Bruselo kaj por bona utiligo de nia mono!Ni kune realigu la ludovikan revon! ... aŭĉu dormigi la monon en banko estas pli saĝe?

- **La internacia lingvo Esperanto kiel gepatra lingvo.**
  (Okaze de la tago de la gepatra lingvo, 21-a de februaro)

***Centa mortotago de Ludwik Zamenhof, 14-a de aprilo 2017***
En la 14-a de aprilo estos la centa mortotago de Ludwik Zamenhof, la kreinto de la internacia lingvo Esperanto. Esperanto-parolantoj el pli ol cent landoj montros sian memoron kaj dankon, ke li kreis tiun relative rapide lerneblan lingvon.

***Proksimume mil Esperanto-denaskuloj***
Ankoraŭ nur malmulte estas konate, ke intertempe vivas jam proksimume mil Esperanto-denaskuloj, kiuj lernas la lingvon hejme aŭ lernis dum sia infaneco. Ekzistas ankaŭ specialaj familiaj renkontiĝoj, kie kunvenas Esperanto-denaskuloj el multaj landoj. Ulrich Brandenburg, antaŭa germana ambasadoro en Moskvo, lernis Esperanton dum sia infaneco en la kvindekaj jaroj.

***Zamenhof pri la graveco de denaskuloj***
Ludwik Zamenhof estis jam frue konscia pri la aparta signifo de denaskula komunumo por la estonteco kaj stabileco de lingvo. En 1901 li skibis en letero, kiom grava estas grupo de homoj, kiuj akceptus Esperanton kiel sian familian lingvon. La vivo de la lingvo per tio estus multe pli bone garantiita.

***Denaskuloj en la lingvo-komunumo de Esperanto***
Fakte la Esperanto-denaskuloj estas percepteblaj en la lingvokomunumo de Esperanto malgraŭ ilia relative malgranda nombro - ekzemple ĉe la prilaborado de la Esperanto-vikipedio, kiu enhavas nun pli ol 230.000 artikolojn.

***Vivanta lingvo***
La evoluo de la komunumo de la Esperanto-denaskuloj montras, ke Esperanto jam delonge sukcesis atingi la statuson de vivanta lingvo kaj ke la lingvo nun plu disvastiĝas.

***Esperanto-lingvokurso ĉe Duolingo.com: Nun 700 000 Esperanto-lernantoj***
La nombro de tiuj, kiuj lernis Esperanton kiel duan lingvon kaj regule parolas la lingvon, estas taksata je pluraj cent mil homoj - pli ol la centoblo de la nombro de denaskuloj. Entute laŭ diversaj taksoj pluraj milionoj da homoj lernis Esperanton. Ĉe Duolingo.com nuntempe pli ol 700.000 lernantoj estas enskribitaj por lingvo-kurso de Esperanto.
https://www.duolingo.com/courses/en

***Intervjuo kun Esperanto-denaskuloj ĉe youtube***
Ĉe youtube oni povas vidi intervjuon kun kelkaj Esperanto-denaskuloj, kun subteksto en pluraj lingvoj.
https://www.youtube.com/watch?v=UzDS2WyemBI
**Fontoj**
**Letero al Kofman, 1901**
https://eo.wikisource.org/wiki/Letero_al_Kofman

*Renato Corsetti, 117 Dukes Avenue, London N10 2QD, UK/Britujo*
*tel. +393286315655, +447399273515 renato.corsetti@gmail.com*

https://goo.gl/photos/zwNYBDjrPVe91eQF8

- **Internacia Kunveno en Seulo pri la reunuiĝo de la lando**

Kiel UK povas kontribui por la poco de Korea Duoninsulo? internacia kunveno de NE-prezidentoj por la unuiĝo de Korea Duoninsulo temo : “mia opinio pri la unuiĝo de Korea Duoninsulo” Korea Duoninsulo, sola dividita lando en la mondo. ĉiam frontas palpacon kaj danĝeron. ĉu ni esperantistoj en UK povas kontribui por la paco en Koreio? jes, por tio ni havos la kunvenon dum Seula UK. kiam : 2~5 ptm., la 28-a de julio(vendredo), 2017 kie : prepara kunsido en la Kongresejo(julio. 27, ĵaŭdo) fina kunsido en la Parlamentejo(julio. 28, vendredo) kiu : nefakulaj reprezentantoj el ĉ. 20 landoj. kiulingve : Esperanto (korelingva traduko nur por neesperantistaj koreoj) pri kio : kiuj ajn ideoj kiel deziroj, konsiloj, opinioj, proponoj ktp. por la unuiĝo de Korea Doninsulo kial NE-prezidentoj? angla vorto ‘summit’ havas signifojn: ① ‘pinto’ ② la kunveno de pintuloj(supruloj). en korea lingvo la ‘summit’ estas ‘ĝong-sang(정상), kiu havas du sencojn; ① pinto, supro(頂上) ② normalo(正常). kaj kiam ni tradukas la vorton ‘summit’ en korean lingvon : ① la kunveno de pintuloj(supruloj), ② la kunveno de normaluloj. nun en Koreio la televida programero nomata ‘la kunveno de NE-ĝongsang(非-정 상)’ estas tre populara, pro kio mi enkondukis la nomon de la programero. se ni akurate tradukos tion : ① la kunveno de NE-pintuloj(supruloj), ② la kunveno de NE-normaluloj. en la programero ĉeestas NE-pintuloj(ordinanuloj) el kelkaj landoj, sed ili diskutas pri diversaj temoj, ĉu tio estas normala aŭ NE-normala. unue mi tradukis en Esperanton ‘NE-pintulo(suprulo)“, sed tio ne estis klara, kaj fine mi proponas la vortumon ’NE-prezidento’. mi atendas viajn opiniojn mi invitas jenajn kandiatojn, kaj sendas al ili detalojn, kaj mi petas de vi ① akcepti la proponon, aŭ ② se vi ne povas ĉeesti, bv. afable prezenti alian kompetentulon en sia lando la reprezentotoj de Internacia Kunveno de ne-prezidentoj por la unuiĝo de Koreio. 1. Brazilo S-ro João Silva dos Santos sisant.esperanto@gmail.com 2. Britio : s-ino Anna Lowenstein anna.lowenstein@esperanto.org 3. Chinio : prof. d-ro Liang Ziming(梁梓明)" 470201831@qq.com 4. Francio : s-ino KESLER Nathalie So Yun nathaliekesler@gmail.com 5. Germanio : d-ro Ulrich Lins u.lins@gmx.net 6. Hispanio : prof. GONZALEZ SPINOLA Carlos cspinola1@gmail.com 7. Hungario : d-ro Markus Gabor dr.markus.gabor@gmail.com 7. Japanio : s-ino Tahira Masko tahira-masako@nifty.com 8. Indonezio : s-ino Ilia Sumilfia Dewi ilia.dewi@gmail.com 9. Irano : s-ro Hamzeh Shafiee hamzeho@gmail.com 10. Israelo : prof. d-ro Wandel Amri amri@huji.ac.il 11. Italio : D-ro Francesco Maurelli fran.mau@gmail.com 12. Kanado : prof. d-ro Mark Fettes mtfettes@sfu.ca 13. Kroatio : s-ino Belošević Marija miriam010@gmail.com 14. Kubo : s-ro Fernández-Calienes Barrios Alberto info@esperanto.co.cu 15. Litovio : s-ino Vida Cojiene pere de chtaesok@hanmail.net 16. Meksikio : s-ino Martínez Mateos Mallely nayitamtmt@hotmail.com 17. Mongolio : s-ro Enkhee Chimedtseren chimedtseren.enkhee@gmail.com 18. Pollando au Usono : s-ro Dobrzyński Roman rodobry@gmail.com 19. Rusio : s-ro Dima Shevchenko retumanto@gmail.com 20. Svislando : s-ino Grosjean Mireille mirejo.mireille@gmail.com 21. Tanzanio : s-ro Costantine Mashauri, cmashauri@gmail.com 22. Togolando : s-ro Adjévi Adjé adjevia@gmail.com 23.

Usono : prof. d-ro Tonkin Humphrey tonkin@hartford.edu 24. Vjetnamio : Prof. Nguyen Van Loi loi49van@gmail.com se akceptas la proponon, bonvole sendu al mi jenan aliĝilon. aliĝilo de internacia kunveno de NE-prezidentoj 1) familia nomo : 2) persona nomo : 3) adreso : 4) retpoŝto k. fejsbuko : 5) telefonnumero(kun landa kodo) : 6) naskiĝotago : 7) profesio(eksa aŭ nuna) : iom detale pri kio, kie laboras. 8) stud- kaj labor-fako 9) Aldona mesaĝo (se necesas)

So Gilsu

## Artikoloj

- **Fatbardha Demi**

**La nocio "KOMB", la antaŭhistoria "pasporto" de la arbroj**

*La vero igis vin libera!- – Johano, viii. 32*

Kiam okazas malfeliĉaĵo, sekve de la homaj agoj, nia popolo sin esprimas: "oni eligis siajn okulojn per la propraj manoj". Tio estas ankaŭ la kazo de la misuzo de la nocio "Nacio", fare de esploristoj, ĵurnalistoj aŭ analizistoj albanaj (ne ĉiuj), kies sekvaĵo estis la malrektiĝo de la faktoj pri nia antikva kaj moderna historio.

Por klarigi la kialojn de ĉi tiu opinio, mi komencas la skribaĵon per la frazo ĉerpita el la artikolo "La koncepto pri la nacio" de s-ro N. Spahiu[1]:

*"Post la elekto de Barak Obama kiel prezidento de Usono, la usona nacio atestis ke ĝi estas ne unu-rasa nacio sed fariĝis multi-rasa nacio". (1)*

Ne plu traktante la fakton, ke la usona ŝtato neniam estis "unu-rasa" kaj la vorto Nacio, laŭhistorie reprezentis nur gentan ĝenron, oni rimarkas ke la aŭtoro uzas ĉi vorton por 50 ŝtatoj formintaj Usonon. Pri la supre dirite, oni malrektigis ne nur la demografian kaj historian realecon usonan, sed ankaŭ tiun lingvan kaj historian albanan, egalante Nacion al Ŝtato.

*"Vera fakulo- sin esprimas la konata itala ĵurnalisto Marco Travaglio- por analizi aŭ komenti fakton, devas esplori, trastudi, legi librojn, pripensi pri ĝi..." (2).*

Do ni sekvu lian konsilon.

Ni trafoliumu la vortarojn reprezentantaj la sciencan opinion surkampe de lingvistiko.

En la vortaro de la Albana Lingvo (2006), punkto 2, ni legas:

*Nacio- shtet, vend - ŝtato, lando, Ligo de Nacioj, Oranizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj (3)*

[1] Universitata instruisto en Kosovo

En la vortaro franca- albana (1989):

*Nation - komb- nacio/ National - kombëtar- nacia; territoire national-territor kombëtar - nacia teritorio; shtetas- naciano, armée nationale, ushtri kombëtare - nacia armeo/* ***Nationalité*** *–kombësi - nacieco.*

- En la vortaro itala- albana (Tiranë, 1986) :

***Nazionalita*** *–kombësi - nacieco, shtetësi- civitaneco*

- En la multilingva vortaro de Google-it (interreto), kiu baziĝas sur la eldonaĵoj de la oficiala Albanologio ni trovas:

  *Shqip- albane – Kombi- nacio /germane –nation /Angle –nation /France- nation, ktp. (4)*

Ke la fremda vorto "nacion" ne reprezentas la vorton "komb" en la albana lingvo, oni povas evidentigi tion per la ties uzado en la fremdlingvaj eldonaĵoj. En la biografio de Patrino Tereza ni legas:

***Mother Teresa*** *(De Wikipedia, the free encyclopedia):* ***Nationality*** **- Civitaneco -**

*Yugoslavian citizen - jugoslava civitaneco (1943–1948); Indian citizen - india civitaneco (1950–1997); Albanian citizen - albana civitaneco (1991–1997) (5)*

Ĉi tiuj donitaĵoj atestas ke nia sanktulino, Gonxhe Bojaxhi[2], kiu konfesis mem pri sia albana aparteneco, posedis civitanecon de la respektivaj ŝtatoj, sed estus sensenca fakto por ĉiu albano, se ŝi posedus ankaŭ tri naciecojn.
La supra ekzemplo (de N. Spahiu), montras la nescion fare de aŭtoro, de la lingva signifo, aparte tiu historia, de la albana vorto - Komb- Nacio kaj de fremdaj vortoj -Shtet - ŝtato aŭ Nacion.

Por kontraŭbatali ĉi tiun "malsanon", el sep konoj nepre havendaj de la aŭtoroj aŭ tradukistoj, laŭ Faik Konica[3], mi dividas nur tri plej gravajn:

1) Leksikan konon- la objektivajn aŭ eternajn valorojn de la vortoj

2) Etimologian konon- la serĉadon de la patrineco de la vortoj

3) Esencan konon- genealogian serĉadon de la vortoj. (6)

Ĉar en la albana lingvistiko kaj amasmedio, la vorto Komb uzatas ofte egalvalore al la fremdaj vortoj Shtet-Ŝtato kaj Nacion - Nacio, ni devas postsekvi la vojon de "tri konoj" de F. Konica.

1. La lingva kaj historia signifo de la vorto ŝtato kaj nacio en la vortaro de la albana lingvo kaj en la fremdlingvaj vortaroj:

---

[2] La origina nomo en la albana

[3] Eminentulo albana de XX jc

La vortaro de la albana lingvo (2006)

*Shtet - ŝtato, Politika organizaĵo de la reganta klaso de iu lando, celanta protekti la ties interesojn kaj la ekzistantan ordon, de la kontraŭstarantaj fortoj ene de la lando kaj de la eksteraj malamikoj. (7)*

*Oxford Advanced Learner's Dictionary of Current English* AS Hornby 1977 Great Britain :

*State–ŝtato, nomiĝas la lando de politike organizita grupo, kontrolata de registaro....(8)*

*Larousse – dictionnaires francais* : .

*État - ŝtato, politika socio, sekvaĵo de enfiksiĝo sur certa teritorio kun limoj, de homa grupo elmontranta karakteron pli malpli je homogenaj ecoj (samaj) kulturaj kaj gvidata de instituciiĝinta potenco. (9)*

La deveno de la vorto ŝtato, tiel en la albana kiel en la aliaj eŭropaj lingvoj, originas de la latina "status", elmontranta la regadan formon (forme de gouvernement) (10) kaj reprezentanta politikan organizon, ene de certaj geografiaj limoj.

Historie, la ŝtato estis "produktaĵo" de la militoj aŭ politikaj interkonsentoj. Ne estas escepto ankaŭ la albana ŝtato, tial estas ja scienca eraro (ankaŭ pro aliaj kialoj) ke oni anstataŭi per la vorto Komb- nacio, kiu kreiĝis ne kiel leĝa kaj politika adminstriĝo de shqiptaroj- arbroj kaj ne naskiĝis pro milito aŭ internacia interkonesnto. Ankaŭ la deveno de la vorto"nacion" originas de la latina "natio-nis", de verbo "naskiĝi" kaj en la scienco de historio kaj politiko, ĝi uzatas en la ĉi subaj sencoj.

*La vortaro de la albana lingvo*:

*Nacional - nacia, mb.-vidu Kombëtar- nacia ~E. Çështja nacionale- nacia afero. Problemi nacional- nacia problemo. Lëvizja nacionale - nacia movado. (11)*

*Oxford Advanced Learner's Dictionary of Current English* AS Hornby 1977 Great

Britain :

*Nation- nomiĝas la lando ampleksanta homan grupon kiu posedas saman lingvon, kulturon kaj historion, vivantaj en certa spaco sub certa registaro. (12)*

*Dictionnaire de français Larousse* :

*Nation – Homa komunumo vivanta en certa teritorio, je unu origino, historio, kulturo kaj tradicio, iamfoje ankaŭ komunan lingvon kaj formanta politikan komunumon*. (13)

Ŝajnas kvazaŭ la vorto "nacion" havas proksimajn ecojn al la vorto "komb", kiel la origino, historio, kulturo kaj lingvo. Sed, la historiaj faktoj atestas ke la signifo de la vorto "nacion" de

la moderna periodo de la homa socio difinis la ŝtaton kaj ne rarfoje ĝin ni trovas en la formo "Ŝtato- Nacio", ne inkludante la komunajn etnecon, tradiciojn, folkloron kaj originon.

Tiel la Franca Akademio en la jaro 1694 nomumis nacion:

*komunumo de loĝantoj de la sama ŝtato, vivantaj en la sama grundo kaj uzantaj la saman lingvon. (14)*

Proksimume, du jarcentoj pli malfrue, Ernest Renan (Joseph Ernest, 1823- 1892) en konferenco en la universitato de Sorbono, prelegis pri "kio estas nazion? en la jaro 1882, kie li klarigis ke :

*la etnografia faktoro ne ludis rolon en la formiĝo de la modernaj nocioj. Francio estas kelta, ibera, germana. Alemanjo estas germana, kelta kaj slava, Italio estas lando laŭetne pli miksa. Galoj, etruskoj, pelazgoj, grekoj, ne parolante pri grupo de etnoj, interkruciĝintaj laŭ miksaĵo ne distingebla. La britaj insuloj en sia tuteco, atestas pri miksaĵo de kelta kaj germana sango, kies partoj malfacile difineblas (....)*

*Anglio, Francio, Italio, estas tiuj kun pli miksita sango (...) La homo ne estas sklavo de raso, nek de sia lingvo, nek de sia religio, nek de la fluoj de la riveroj, nek de la direkto de la montaj krespoj. Granda homa komunumo, kun la forto de spirito kaj varmeco de la koro, kreas moralan konscion kiu nomiĝas Nacion* (15).

Por la sama demando, "Kio estas Nacion?" la eksa gvidanto de Sovietunio, J.V. Stalin, kiu dum elmigrado en Vieno konatiĝis kun la okcidenta filozofio pri tiu temo, en artikolo verkita de li (1913) klarigis ke

*"Nacion, antaŭ ĉio estas certa homa komunumo. Komunumo ne rasa nek etna." (16)*

Sekve, en la modernaj tempoj "nacion" envere reprezentis ekonomian kaj administran- politikan organizon de certa ŝtato (estu ĝi monarkeca, respublikeca aŭ unupartia).

La plej granda problemo estis ke la loĝantaro de la eŭropaj nacioj, miksitaj (multi-etnaj), parolanta lingvon kaj diversajn dialektojn ene de sama lando, ne sentis sin spirite unuiĝinta. En la franca ŝtato de la jaro 1900, nur 50 % de la loĝantoj parolis la francan kiel patrinan lingvon. (17)

La sama stato ekziatis ankaŭ en la aliaj ŝtatoj. Por igi pli klara la panoramon de la loĝantaroj de la moderna Eŭropo en la tempo de formiĝado de la nacioj, F. Konica mencias tre trafan komparon el la studaĵo "Ni eŭropanoj", de Julian S. Haksli kaj A.C. Hedon: Eŭropo estis vera kaldrono de miksaĵo kaj tio eliĝinta el ĝi, devus esti tre diversa ol tiu enverŝita en ĝin." (18)

Tia loĝantaro, kion tion rimarkas la filozofoj de 18-19 jc ne povus "ligiĝi" spirite al la ŝtato por realigi ties ekonomiajn kaj geopolitikajn projektojn, por kiuj mem la ŝtato estis kreita. Do, necesus la kreiĝo de unu lingvo, folklora tradicio, komunaj origino kaj historiaj antaŭenintoj. Tiu tasko estis komisiita al la universitatoj, akademioj ĵus fonditaj kaj plej elstaraj intelektuloj de ĉiu lando.

La primaran lokon en ĉi tiu "rekonstruiĝo" okupis la kreiĝo de la lingvo de la ŝtato (standardo), bazite sur la dialekto de "grupo politike reganta" kaj artefaritaj kreaĵoj de la vortoj, fare de poetoj kaj lingvistoj, kiu disvastiĝis per la lernejaj programoj kaj uzado de ĝi en administrado kaj kulturo. Tiu ondo, ampleksinta ĉiujn eŭropajn landojn, aparte tiujn novajn naskiĝintaj pro la renversiĝo de la Osmana Imperio, kondukis al la laŭgrada pereo de la dialektoj kaj lingvo de la familio, ĝis al la kreiĝo de novaj lingvoj.

*"Ĉi tiu (fenomeno- mia noto) ne koncernis nur la lingvojn por kiuj estas videbla la parto de inventemo- kiel konfesas Patrik Geary (Il Mito delle Nazioni)- kiel la lingvoj ukraina, bulgara, serba, kroata, slovena, lituana, hebrea, norvega, irlanda, nederlanda, rumana, sed ankaŭ je pli fajna maniero, en la germana kaj itala lingvoj. (19)*

*Estas la influiĝintaj intelektuloj pro la opinio de Herder, konfesas la franca esploristino Anne M. Thiesse (La kreiĝo de la naciaj identecoj), tiuj, kiuj entreprenis la "konstruon de la lingvoj". (20) ..*

Estas multaj hodiaŭaj eŭropaj naciaj lingvoj, kiuj ne ekzistis envere antaŭ 19a jc. (21).

El tiu lingva panoramo de eŭropa kontinento, la esploristino konkludas ke en la hodiaŭaj ŝtatoj *"ne ekzistas envere lingvo, kiu povus posedi la valoron de la nacia simbolo"*. (22)

La sola popolo de Eŭropo moderna, kiu ne ampleksiĝis en ĉi tiu "rekonstruiĝo" de si mem, kiu havis lingvon kiel nacian simbolon, fokloran tradicion tre riĉan kaj konon de sia origino ekde pratempo, estis shqipetaro-arbroj[4]. Multaj fremdaj esploristoj evidentigis ke ĉi tiu lingvo estis tre praa kaj estis konservita miraklece ĝis hodiaŭaj tagoj. Sed, laŭ ili, tion kaŭzis la granda postrestado de shqipetaroj, manko de kultura evoluiĝo kaj precipe la izolita vivo disde la moderna mondo.

[4] Albanoj sin nomis unue arbroj, poste shqipetar. Arbroj plunomigxas nun la albanoj fugxintaj al Italio en XV jc post Otomana invado de la lando.

Tiun rezonadon subtenas ankaŭ la albanaj esploristoj hodiaŭ.:

*"La ekzistado for de la cetera mondo,  en la montaro, disde la konoj, civilizo, komerco, unuvorte la vivo kvazaŭ sovaĝaj homoj, ebligis al albanoj la saviĝon de la lingvo kaj etneco.*

(P.Zheji, , *Shqipja dhe Sanskritishtja- La albana kaj la sanskrita*, parto.I)(23)

Ĉu nia popolo estis aro de "barbaraj" gentoj vivantaj profunde de la montaro, ne havante rilatojn al la civilizita mondo aŭ ekzistis aliaj kialoj? Pri tiu ne historie prava tezo F. Konica alportas la atestaĵon de la esploristo Milan Ŝuflai[5], kiu bone konis la Mezepokan Albanion, konfesas:

*en tiu tempoperiodo (14 a jc) de sia historio, Albanio ne postrestis aliajn eŭropajn landojn, rilate la vivmanieron kaj ĝeneralan progreson. Ĝi lando estis pli kultura kaj komerca apendikso de Italio ol regiono sub la bizanca influo", (24)*

Multaj nepravaj historiaj pritraktiĝoj, same pri la ĉiutagaj aferoj, estas kaŭzitaj nur pro erara kompreno lingva kaj historia. En la vortaroj albanaj kaj en tiuj dulingvaj por la vorto Komb skribas = ŝtato= nacion.

En la artikolo de Fatos Lubonja[6] "Kosovo inter du flagoj" (2007) ni legas:

*Komb ne estas io donita unufoje por ĉiam kaj ne ŝanĝebla, nek precize difinebla, sed temas pri proceso historia komb-formanta. Kaj en ĉi tiu proceso gravan rolon ludas la politiko. Kiel diras Gellner "la komb-oj envere ne ekzistis, ili naskiĝis pro la rilato de politiko kun la kulturo" (25)*

La uzado de la frazo de la esploristo de la moderna socio, Ernest Gellner (1925-1995) estas erara, ĉar li ne temis pri la vorto "komb", kies historian sencon li ne konis. "La traduko" farita de la aŭtoro de la artikolo, alportis al erara pritraktiĝo de la taga temo, sed ankaŭ en la malrektiĝo de la historio de la formiĝado de la albana Komb-o. Por klarigi la uzadon lingvan kaj historian de la vorto Komb ni sekvos vojon ne iritan de albanologio kaj fremdaj studoj, kiel estas...

## II- La prahistorio origino de la vorto Komb

[5] Elstara kroata albanologo

[6] Nuntempa konata analizisto

En unu el la fruaj skribaĵoj miaj pri la praeco de la albana- arbra Komb-o, mi sin esprimis ke la origino de nia loĝantaro startas ekde la ekiĝo de kreiĝo de la unua socio eŭro- afro- azia, kvankam la nomumo "Komb" ( de albanoj) estas pli novtempa. Tia misrezonaĵo mia venis pro manko de miaj konoj pri la simbola kaj religia naturo, per kiu la primitiva homo provizis sian lingvon, kies heredanto estas la lingvo parolata de nia popolo. Tia aparta naturo de la albana lingvo, kies malkovro apartenas al la genieco de Petro Zheji[7], aperas neŝanĝita en la tuta ties grandiozeco, precipe en la multaj nomumoj de nia popolo (Alban, Iperiot- el kiu formiĝis ankaŭ la nomo Shqipetar, Ilir, Arbër), kie enestas ankaŭ la nomo Komb. En la subdialekto de Ĉamërio[8], kiam oni volas ligi du aŭ pli da fadenoj, diras "faru ĝin kom". Ankaŭ en la vortaro de la albana lingvo (2006), ĉe la vorto Komb ni legas:

*Komb - Premita ligo de du partoj aŭ du flankoj de iu fadeno, ŝnuro kc. aŭ du randoj de iu tuko, tolo kc; nodo. E lidhi kom - oni ligis tion komb. Zgjidh kombin - oni malligis kombon. 2. Nyje druri, gdhë - ligna nodo, nodaĵo*

**Komb -** Stabila aro *de homoj formita historie surbaze de la lingvo, teritorio, ekonomia vivo kaj psika formiĝo, aperanta sur la aro de kulturo. Kombi shqiptar- Albana nacio (26)*

La inica radiko de la vorto "komb" estas "kom" ĉar en la albana ni havas vortojn, esprimantaj aron aŭ ligon per ĉi tiu radiko kiel: *kom - unë*- municipo, *kom-shi*- najbaro.

Ankaŭ multaj novaj vortoj el la fremdaj lingvoj, baziĝas sur ĉi ti radiko, kies senco ekspliciĝas nur en la albana, kiel *kom-unikim* /ligo inter homoj, kom-binat/ ligo de pluraj funkcioj aŭ objektoj, kom-pozim, *kom-promis* / ligo inter opinioj, *kom-erc* / ekonomia ligo, *kom-pani*/ aro de homoj, kc.

Je unua vido, ŝajnas ke la vortoj "kom" kaj "komb" havas nenion komunan. Sed traktante ilin el filozofia senco, ni povas diri ke la kunligilo estas la ideo de "ligo". Per ĉi tiu ideo, ni povas esprimi grandan nombron da ligoj, komencante el tiuj pli simplaj, kiel de du fadenoj, pecoj kc ĝis al la ligoj de la homoj, familio, popoloj, ekonomiaj, politikaj, fizikaj fenomenoj kaj tiel plu. Tiun vastan uzadon, en plej diversaj fenomenoj, ĉi tiu ideo akiris dum la historia evoluo de la homa socio.

Sed en "la unuaj tagoj" de la genta aro, la vorto "kom-b" (grafike) esprimis nur unu simbolan ideon religian, kiel tion ni vidos pli sube.

Laŭ la esploristo de la prakredoj Mircea Elade[9]: "La simboloj estas ĉiam plurdimensiaj (je multaj sencoj, uzoj- mia noto)...ili silidarizas (kunigas, koincidas- mia noto) kelkajn realaĵojn je aspekto tute heterogenaj (malsimilaj - mia noto) riferiĝante al la sama realaĵo, kiu, estasnte, plej profunda samtempe estas ankaŭ la lasta kialo de ilia ekzisto..." (27)

Kiu do estas ĉi tiu "sama realaĵo" kaj "plej profunda", kiu konservas la vorton "komb" de la albana lingvo kaj kial nia popolo nomumis sin per ĝi? Por respondi al ĉi diu demando, unue ni devas eniri en

[7] Renoma albanologo

[8] Regiono en nordokcidenta Grekio kompakte logxata de albanoj

[9] Fremda esploristo

la "haŭton" de la primitiva homo, tiam kiam necesis por li rakonto, ne per gestoj, sed per vortoj, objektojn kaj agojn siajn. Tiutempe la vorto "kom-b" montris la Ligon.

La vorto "ligo" estas tro praa. Tion atestas la sankskrita lingvo, kie en la senco de la ligo- laŭ P. Zheji- troviĝas

*"la esenca parto, pura parto de ĉi tiu operatoro t.e. "li" kiel ekzemple en la vorto upa-li aŭ en la vorto abhy-li (u ba li, a ba li), kio en la latina donis le-gare, en la franca li-er kc "(28)*

Ni daŭrigu nian rezonadon (supozitan) pri la observadoj de la primitiva homo. Kiam ni ligas du partojn de la ŝnuro aŭ du pecojn, ne farante nodon, la ligo ne estiĝas. Do Ligo estiĝas nur kiam ni faras nodon. (la ago de la ligo finiĝas per la nodo) kiu en la albana nomiĝas Komb. Sekve, la vortoj lidhje = komb = nodo, estas ne disigeblaj agoj kaj ne havas sencon unu sen la alia.

Ankaŭ laŭ la traktiĝo de P. Zheji, ĉi tiu simbolaj vortoj, esprimas la saman religian miton (pritraktota ĉi tie). La vorto "nodo" estas uzita pli malafrue, kontraŭe, ni nomumus nin per ĝi hodiaŭ.

Por tro longa tempo, kiam nian antaŭenintoj scipovis ligi, helpe de nodo la objektojn ĉirkaŭantajn, ili komprenis ke ili estis farante agojn super iliaj fizikaj eblecoj. Tiu forto akiritis helpe de la unuaj laboriloj kaj protektiloj kiel: martelo, arko, la iloj por levi kaj altiri la pezojn kc vekintaj iliajn adoron.

Pensante ke tiuj iloj entenis "diinan forton", per diversaj ritoj, la primitiva homo demandis la helpon kaj protekton de ili porĉiame.

D. Gaetano Maria Monforte (Antichita Greche, Napoli, 1823) konfesis ke :

*"Se ni rememorus, la plejparto de la ritoj, celebraĵoj apartenis al la kultoj, originis de kutimoj kaj homa vivagado" (29)*

Observante la konduton de la birdoj kaj animaloj (ekzemple kastoro), kiuj konstruas siajn nestojn aŭ barojn laŭlonge de la akvofluo, kunigante la herbaĵojn kaj la arbobranĉojn, ili ellernis teksi kaj ligi, formante nodojn. Tiu "inventemo" plifaciligis multe la certigon de la nutraĵoj, kovradon de la korpo, konstruadon de la kabanoj, kiuj anstataŭis la kavernojn kaj heĝojn por sin protekti. Sekve, la nodoligo, vestiĝis per diina vestaĵo.

Figuretoj kiel tiuj sube, ne rare troviĝas en la arkeologiaj eltrovitaĵoj de nia Duoninsulo, kie la praaj "artistoj esprimis la plej gravan atingon de la vivestaĵoj-: la pensadon. En tiu periodo, la homo kredis la ideon de ĉiela Kreinto kaj "ligis" sin al ĝi, per la diina nodo.





Meditada momenteto en la Pelazga Duoninsulo. Pre- Cucteni Kulturo (4750 -4500 j). antaŭ Kristo. (30)

*"La nodo- konfesas P.Zheji- estas kompleksa simbolo ampleksanta multajn gravajn sencojn, ĉiuj riferiĝantaj al la ideo de intima ligo, premita ligo..." (31).*

Por la kredanta homo el antaŭhistorio, la plej intima ligo kaj plej premita estis tiu kun Dio, de kies deziroj dependis la ĉiela ordo same la tera ordo. Por certigi ĉi tiun ligon oni plenumis ritojn, oferaĵojn kaj diversajn festojn.

La esploristoj evidentigas ke la simbolo de Nodo- diina havis gravan lokon en la praa kredo, sed ili asertas ke la inica senco ĝia ne estas klara. Tiu malfacileco venas pro fakto ke ankaŭ en nuntempo, oni ne konas la unuan lingvon kaj la unuan kredon eŭro- afro- azian kaj la eksplikado fariĝas laŭ la kristana kredo. Unu el la plej grandaj esploristoj de Kabala (Qabbalah) en Mezepoko, Abulafia (Abraham ben Samuel Abulafia 1240- 1290) malkovris ke la vojo de kuniĝo kun Dio, atingeblis per "malligo de nodoj". (32)

Estas tre grave, kiam ni parolas pri la origino de la vortoj kaj ties simbolika kredema naturo, kiel estas nia kazo, oni devas prikonsideri la tempoperiodon al kio ĝi apartenas. Tiel, Juan Eduardo Cirlot (paĝo 173) sin esprimas ke :

*(la nodo) esprimas la koncepton de ligo kaj enkatenigo...Tio estas la kialo ke "Flamen Dialis" (la pastro je la servo de Dioj en Romo- mia noto) de praaj romianoj ne povis survesti vestaĵojn kun nodoj, samkiel la muslimoj dum ilia pilgrimado al Makao". (33).*

La ekspliko de signifo de Nodo en la kredo, en ambaŭ ĉi supraj kazoj, estas malfrutempa, kiam la simboloj kaj la inicaj mitoj estas adaptitaj al teknologio ellaborita de filozofoj de la religioj kaj estas skribitaj en libroj.

La inica kreda senco, kio estas konservita miraklece en la albana lingvo, esprimas nur unu miton: tiun de "ligo" kaj ne tiun de "malligo de la nodo". Laŭ tiu mito, la nomo Komb-i- Shqipetar kiu esprimas antaŭhistorian simbolon, signifas: Popolo ligita al Dio, kaj ĉi tiu senco konatiĝis ankoraŭ en 19a jc, kiel atestas la historiaj kaj literaturaj dokumentoj. Ĉi tiun eksplikon de Nodo- diina kaj sekve ankaŭ de la nomo de nia popolo, atestas la arkeologiaj objektoj.


34

(34) Kiel oni rimarkas, sur ka kapo de Zeŭso, Eŭropo (fig.1) kiel ĉe Dio de Morto ĉe Aztekoj, Meksikio, sur la zono de geparo el Kongo, Afriko (fig.3) kaj de Julius Cezaro, troviĝas Nodo- diina kaj mirinde ĝi estas sama, malgraŭ ke la arkeologiaj objektoj apartenas al popoloj trovitaj en grandaj distancoj geografiaj kaj diferencaj je raso.

En ĉiuj tiuj kazoj, esprimiĝas la ne malligebla ligo kun Kreinto. El tiu ligo al Dio ili diiniĝis dum la surtera vivo kaj certigis eternecon, postmorte, en la "transa vivo".







La arkeologiaj objektoj atestas ke ne la praa kredo, kiel simbolo de la ligo al Dio, servis ankaŭ nodoj- diinaj formitaj de ligo de rubando, kiel ni vidas sur la kapo de egipta Diino Isis (fig.1) kaj de multaj reĝoj de pratempa Eŭro-Afro- Azio aŭ kiel amuleto lokita sur la zono ĉe Diino- aglino, Horos, nomita "La nodo de Isis" aŭ Tyet (fig.2,3,4)


(35)

Erare, Nodo- diina- Tyet, konsideriĝas simila al la simbolo Ankh, esprimanta la figuron de Diino- aglino ĉe Isis, kiel atestas ĝiaj flugiloj el aglino en la pentraĵoj de la muroj de piramidoj. La diferenco vidiĝas ekde la formo uzita en (fig. sube) de la simbolo Ankh kaj (fig.2) tiu de Nodo- diino Tyet

(36)



La arkeologiaj objektoj atestas ke la simboloj de novaj kredoj konataj hodiaŭ, estas ĉerpitaj de antaŭhistoriaj simboloj (traktita de F. Demi: La nomo "Jezus", "Krisht- Kristo" kaj "Kryq- Kruco" eksplikeblas nur per lingvo kaj kredo de pelazgo[10]-shqipetaroj").

[10] Pelazgoj, granda antikva popolo loĝinta de Danubo ĝis Italio, de Aŭstrio ĝis Grekio

Ĉi tiu simbolo (nodo-diina), ekde pratempo, ornamis la kapojn de la reĝoj, por atesti la diinan naturon kaj la rolon de peranto de Dio (fig. 1 sube) estas konservita en la tradicio de vestoj ĉe arbreŝoj (fig.2). En la Mezepoko ĝi reprezentiĝas (subkompreneblas) per du bendoj malsuprenirantaj malantaŭ la kapon, kiel esur la afresko de 13a jc de Papo Innocenzo III (1198- 1216) kaj sur la celebra ĉapelo de papo Piu XI (fig.3,4).







(37)  Drahmo de Orodes I, Parthia (90- 80 antaŭ Kristo), Arbreŝoj el Contessa Entellina, Hora de Kuntines; Afresko de Papo Innocenzo III; La kapkovraĵo de Papo Pio XI

Mauro Paoletti en sia libro " Nodo, historio, mitologio kaj misteroj de la plej praa simbolo de la homaro" asertas ke :

*Ekde plej fruaj tempoj, la nodo estas aprezata kiel simbolo esprimanta praavan ideon, enradikiĝinta en la homa mondkoncepto kaj precipe en multaj ties mensaj bazaj agoj; tiu speguliĝo povas veki rapide aron da konceptoj kaj sentoj. Eble pro tiu kialo, en ĉiu kulturo, ekde tiu ĉina, ĝis tiu inka, ekde tiu india ĝis tiu greka, ekde tiu tibeta ĝis tiu egipta, la nodo konsistigas ĉefan aktivan rolon, transpasante la geografiajn kaj kulturajn limojn.* (38).

La nodo-diina savis sian valoron kiel kulta simbolo dum la tuta homa historio kaj daŭre admiriĝas en la beletraĵoj, kiel en tiuj de Dante Alighieri; en la pentraĵoj de Leonardo da Vinĉi; en la grafikaj desegnaĵoj, ĝis la multaj konstruaĵoj de Mezepoko (fig.1,2, sube) kaj same kiel religia simbolo en la vestoj en hodiaŭaj tagoj ĉe Papo de Vatikano kaj ĉe monaĥoj. (fig.3)







(39)

1. La preĝejo de Sankta Sofio de Benevento konstruita de longobarda grafo Arechi II, en la jaro 762, Italio; 2. Lisbono, Torre di Belem de skulptisto el 16a jc Francisco de Arruda; Truita nodo sur la pendita bendo ĉe la kolo de Papo.



Dum la miljara historio de nia popolo, la vorto Komb, preter la kredema "ligo" al Dio (domininta ankaŭ dum 19a jc je konvinkaĵo kiel "diina popolo") pliriĉiĝis ankaŭ per novaj ligoj kiel:

- Aparteneca ligo al iu ĝenro, sendepende de nomumoj (Iperiot/ Epirot, Ilir, Arbër / Arbëresh, Shqipetar) en diversaj historiaj periodoj aŭ elmigradoj sur grandaj geografiaj spacoj.

- La ligo kun naturaj teroj, sendepende de limaj, administraj kaj politikaj dividoj.

- La ligo kun gepatroj kaj familio. La esploristo Kolë Kamsi asertas ke

*"La amo por familio ekzistas ĉe ili nun tutsame kiel dum la bravaj tempoj de iliaj prapatroj: unu kulto"*. (40)

-La ligo de lingvo kaj de historia memoro.

- La spirita ligo kun siaj antaŭintoj tra ritoj de tradicio kaj tiu ene de etno tra leĝoj de Kanuno, geedziĝoj, Beso[11], praktikado de bo-onkloj, kvazaŭ-fratoj kc.

[11] Unika vorto en la albana, sanktiganta la donitan parolon.

*Pri la moro de kvazaŭfrateco ĝis hodiaŭ estis sciite ke tio praktikiĝis nur por maskloj, sed K. Kamsi, priskribante la tradicion de arbreŝoj, atestas ke ĝi ampleksis ĉiun ĝenron:*

*"En Greci di Puglia, kolonio de Capitanata- la knabinoj, dum la Paskoj, arigitaj op-op-e konforme al socia ordo, aliras belan monteton, trovita oriente de la vilaĝo nomata Breggo (Bregu- Bordo) por fariĝi kvazaŭfratinoj, eksidas sur freŝa herbo de la paŝtejoj kaj kunmanĝas la kutiman fritaĵon. Poste, antaŭ ol ili disiĝu por eniri la vilaĝon, ĉiu el ili deŝiras po unu hareto unu de la alia, bonaŭgurante ke la spirita kuniĝo, kiu igis ĉi tagon ilin kvazaŭfratinoj de samaj gepatroj, plurestu dum la tuta vivo.*(40)

Kelkaj el ĉi tiuj "ligoj" de Komb povas perdiĝi (kiel estas ja kelkaj tristaj kazoj de neheredîĝo de la albana lingvo ĉe la infanoj de elmigrintoj), sed aparteneco (etneco) neniam malaperas. La kialo estas ke unu el la "ligoj" plej gravaj de Komb estas tio de "sango", t.e. tio de Familio kaj de Antaŭenintoj el kiu ili devenas, kiujn la patrino Naturo igis ne interŝanĝeblaj. Ĉirilate, ni havas historiajn faktojn de shqipetaro- arbreŝoj en Helado (Grekio), Montenegro, Serbio kaj aliaj balkanaj landoj, en Eŭropo kaj aliaj kontinentoj, ĝis ĉe Kalaŝoj de Indio kaj Pakistano, kiuj kvankam estas "perdintaj" la patrinan lingvon, konfesas sian apartenecon kaj originon de iliaj antaŭenintoj.

La fakto ke per la simbola vorto Komb, esprimanta "la mal-ligeblan ligon" kun Dio pere de "nodo", neniu alia popolo enmonde nomumis sin mem, atestas la apartan gravecon havanta ĝia "historio" en la scienco de Albanologio kaj pli vaste. Ĉi tiu nomo atestas:

- Ke la albana popolo en kies lingvo troviĝas la kredema vorto - Nodo (Komb), nomumanta sin mem, estas aŭtoro de la antaŭhistoria simbolo de nodo-diino.

- Ke la antaŭenintoj de shqipetaroj estas la unuaj kreintoj de la organiziĝo de gentaj komunumoj.

- Ke la albana lingvo, kiu ankoraŭ hodiaŭ konservas la praan formon- Kom, estis la lingvo de la unuaj eŭropaj gentoj.

- La inican originon kaj la senĉesan kontinuecon de nia popolo.

Konkludo:

Laŭ ĉiuj supraj faktoj, la vorto "Komb" ne esprimas politikan, ekonomian aŭ militistan administrecon de la urbo-ŝtatoj de la Pratempo, nek la ŝtato-naciojn de la modernaj tempoj.

***Kombi***- estas simboleca nomumo, kreita en la kondiĉoj de la inica kredema evoluo de primitiva homo, dezirinta esprimi sian "ligon" al Dio.

Kombi - estas fenomeno de la historia evoluo de shqipetaro-arbroj, kie krom la "ligo" al Dio, ĉe la arbra loĝantaro inkluziviĝis ankaŭ novaj "ligoj" (al tero, lingvo, familio, tradicio, moroj, kc.), kreintaj la senton de "aparteneco" kaj difinis la ecojn de la karaktero de albanoj- shqipetaroj, distinge de la ceteraj balkanaj kaj eŭropaj popoloj.

Kombi - reprezentas spiritajn fenomenojn de nia popolo. Ĉiuj "ligoj" de Kombi estas envere spiritaj ligoj de "homoj de Komb-i". Ĝi ne dependas de interkonsentoj, deziroj aŭ gustoj (iaj ajn) de homo aŭ homgrupo, motivite de kulturo, ekonomia bezono aŭ ilia religia sindediĉemo (kaj iu

ajn kialo), kiuj havas provizoran karakteron aŭ estas anstataŭeblaj, kiel atestas la esploristoj de la homa socio. Kombi havas eternan naturon (ĉar "plej grava ties ligo estas tiu de sango").

Hodiaŭ la albana ŝtato ne devas nomumiĝi ŝtato - Komb, ĉar nia Komb nomumas ankaŭ la loĝantaron trovata ekster la geografiaj limoj de Albanio. Tia nomumo Ŝtato povus praviĝi nur se tio ampleksus (almenaŭ) la areojn de la Registroj de Otomana Imperio.

La ŝtato de Respubliko de Albanio kaj tiu de Kosovo, en la politika vortaro, speguligas Partojn de la aŭtoktonaj areoj, de loĝantaro je albana etneco, survivintaj la Balkanajn Militojn, ambaŭ Tutmondajn Militojn kaj pereigan Militon en Kosovo dum 1999 jaro.

Lingvece, kiam oni parolas pri futbalstadionoj, teatroj, sportaj teamoj de Albanio kaj Kosovo, oni devas uzi la ŝtatan nomumon, dum por la diversaj agadoj, tutampleksaj, oni devas aldoni la nomumon: historia, aktiveca, kunvena, festivala kc kaj la kvalifikon "kombëtar- nacia".

Estante psikologia, lingva kaj historia fakto, la vorto Komb ne povas mezuriĝi per "metro" de vorto ŝtato- nacion kaj de iu ajn alia vorto, ĉerpita el la fremdaj lingvoj (kiel raso, identeco, etneco, kiuj esprimas la tutecon de sencoj, kiun havas ĉi tiu vorto en la albana lingvo) aŭ ekster iu ajn homa logiko, krei novan vorton. Ĉar Kombi estas "unika produktaĵo" (aŭ patento, laŭ moderna lingvo) de la antaŭhistoriaj homoj, kreintaj la ideon de Dio.

fatbardha_demi@yahoo.com

25/01.2016

- **Totemo 2500 jara**

Totemo 2500 jara motivigis la enprizonigaxon de sep albandevenaj soldatoj en Grekio. Temas pri gesto, simbolizanta la aglinon, kiun niaj antauenintoj, iliroj, faris ekde antikveco. Totemo adorata ankaŭ dum la Bizanca temo. Sed, lastajn jarojn, okaze de internaciaj futbalmatĉoj de Albanio, miloj da ties fanoj faras tion en la stadiono, kiel signo de kuraĝigo kaj fiero por esti albano.

Interese, tio plaĉis ankaŭ al eksterlandanoj, eĉ eminentuloj, inter ili ankaŭ artistoj, sportistoj, politikistoj, policistoj kaj soldatoj.



La gesto pri aglino

Sed, antaŭ nelonge, sep albandevenaj soldatoj, ĵus varbitaj al la greka armeo en Mesolonĝi, eĉ ankoraŭ ne plenumintaj la militistan ĵuron, renkontiĝinte, fotiĝis farante kune tiun geston tutalbanan. Tio provokis fortan reagon fare de politikaj dekstruloj kaj ministro de defendo de Grekio. Oni ordonis la areston kaj prijuĝon de sep junuloj kiuj estis kondamnitaj je 60 tagoj da enprizoniĝo, je motivo "gesto naciisma kontraŭ greka ŝtato!"(?).

La sep albandevenaj soldatoj en Mesolonĝi
En la arkeologia muzeo de 2600 jaraaĝa urbo de Durrës, Albanio, troviĝas ankaŭ tiu skulptaĵo

Oni tamen ne povas ekskludi la kazon ke mem la okazintaĵo estas enscenigita de la Ŝtata Sekureco de Grekio.


Svisaj soldatoj imitas la aglinon
Futbalisto mondkonata albana

En Grekio loĝas kaj laboras kelkcentmiloj da albanaj rifuĝintoj ekde post 1990 jaro. En la greka armeo deĵoras aktuale almenaŭ 12 000 albandevenaj soldatoj.

Bardhyl Selimi

- **8-an de marto : INTERNACIA TAGO DE LA VIRINO**

***Enkonduko de Mireille Grosjean***

**Virinoj**

Plej gravas

-  Ke knabinoj kaj virinoj povu studi laŭ siaj kapabloj same intense kaj longe kiel knaboj kaj viroj. Ni edukistoj havas en tio ŝlosilan rolon.
-  Ke virinoj, se ili havas la saman diplomon, la saman dumprofesian lertigadon, la saman profesian sperton, havu la saman salajron kiel viroj.
-  Ke elstaraj virinoj kiel Maya Angelou, Bertha von Suttner, Wangari Muta Maathai, Malala Yusafsai kaj multaj aliaj ekzemplodonaj virinoj, estu prezentitaj en la lernejaj programoj. Eltaraj ili estis aŭ estas, ili devas elstari. Tio ebligos pozitivan kaj kuraĝigan efikon ĉe knabinoj.
-  Kaj finfine, ke viroj kaj virinoj KUNE gvidu nian mondon al egaleca disdivido de la riĉecoj kaj produktoj de la planedo. Justa pago de la produktoj endas. Tiel ĉiu homo povos vivi feliĉe kaj digne en la regiono, kie li/ŝi naskiĝis.

***Enkonduko de Verdiana Grossi***, historiistino pri paco, homaj rajtoj kaj historio de la virinoj, prezidanto de la Internacia Lyceum-Klubo de Ĝenevo.
*Originalo en la franca. Esperantigis la tekston Mireille Grosjean.*

**Refoja malkovro de valora teksto : MEMORANDO pri la PACO (1915, ĝisdatigita en 1919 kaj en 2016)**

Estas tekstoj, kiuj impresas nin pli ol aliaj, ĉar ili enhavas mesaĝon. Tiele la Historio povas tiel subite aperi en la Nuno. Memori aŭ forgesi ? Remalkovri signifas devon komenti, kompreni kaj esplori pri rimedoj, ĉefe kiam temas pri konfliktoj. Kelkaj personoj asertos, ke tio senutilas, ke militoj ĉiam aperos kaj ke ekzistas neniu solvo por tio. Aliaj klopodos daŭre esplorante pri solvoj tra diversaj vojoj kaj ĉefe evoluigante efikan preventon de militoj.

En februaro 2015 la ĝeneva Lyceum-Klubo Internacia, fondita en 1912, prilaboris tiun tekston. La originalo estis verkita de 36 virinoj (el ili 13 lernantinoj de supera mezlernejo) el 7 naciecoj kaj estis subskribita en Ĝenevo la 9-an de februaro 1915. Ĝi estis la fondo- kaj kreoakto de la Tutmonda Unio de la Virino por la Paco, kiu aktivis ĝis la fino de la dua mondmilito.

Fakte tiu teksto invitas al reviziado de la imago de la virinoj pri la milito ; ĝi spronas ilin eklukti kontraŭ la psikologiaj kaŭzoj de la militoj : timo, nescio kaj monavido. Devas okazi pripensado pri valoroj kiel toleremo, solidareco, respekto de la kulturaj kaj religiaj diversecoj, respekto de iu eksterlandano, ktp. Temas pri reguloj por taŭga konduto en la ĉiutaga vivo ĉie en la mondo.

La fondintino de la Tutmonda Unio estis la usonanino Clara Guthry d'Arcis ; ŝi elektis kiel sekretariinon la svisinon Marguerite Gobat. Tiu lasta kontribuis kiel redaktistino, feministino,

pacbatalantino kaj edukistino en la lanĉo de tiuj principoj. La originala teksto estas dulingva : en la franca kaj la angla.

La versioj en la franca, germana, itala kaj angla utilis kiel bazo por la traduko al Esperanto verkita en Belgio de Sinjoro Germain Pirlot, laŭ instigo de Mireille Grosjean, prezidanto de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Tiu lingvo utilis kiel referenco por la tradukoj al la araba, la ĉina, la portugala, la nepala ; al tiuj lingvoj espereble aldoniĝos pliaj lingvoj, pliaj versioj de tiu inspira teksto. Intertempe la du versioj en la franca kaj Esperanto ekflugas al la tuta mondo tra plej diversaj kanaloj kaj retoj. Tiu teksto insistas ĉefe pri la respondeco ne nur individua sed ankaŭ kolektiva vidalvide de la milito. Ĉiu persono, ĉu viro ĉu virino, nun devus koni kaj alpropriigi al si unu aŭ plurajn punktojn de tiu dokumento kaj decidi lukti por ĝia respekto.

Tiuj 14 punktoj iru al plej multaj rondoj tra la mondo ! Ili estu inspirofonto kaj kaŭzu fruktodonajn interŝanĝojn. Jen la deziro de la personoj, kiuj subskribis ĝin hieraŭ, subskribas ĝin hodiaŭ kaj subskribos ĝin morgaŭ !

- Verdiana Grossi

**Memorando de Monda Unio de la Virino por la internacia konkordo**
**Parte redaktita de membroj de *Lyceum Club International*(Ĝenevo, 1915 kaj 1920).**

(Dediĉita al la konstruado de la paco. Ĝisdatigita de la membroj de *Lyceum Club International* de Ĝenevo kaj de Svislando, januare 2016).

1) Kapablu distingi la diversecon de la vidpunktoj, devigu vin trovi akordiĝterenon.

2) Anstataŭigu la malamajn pensojn, la detruemajn fortojn, per pensoj de kunsentemo kaj de justeco, per konstruigaj fortoj. Tio kun la celo neniigi la barojn en nia spirito antaŭ ol esperi neniigi la barojn en nia kunvivantaro kaj en la mondo.

3) Evitu diskonigi novaĵojn aŭ raportojn, kiuj povus estigi antaŭjuĝojn kaj malamon inter popoloj kaj nacioj.

4) Kontraŭ ĉiu pesimisma opinio ĉiam kaptu la okazon por starigi la memfidon de via rokfirma fido en la ebleco aboli la militon, fonton de tiom da mizeregoj.

5) Forigu la militludojn kaj lernigu al infanoj, ke la milito estas tro terura tragedio, por ke ĝi estu ludo. Ekinstruu al ili la senperfortan solvadon de konfliktoj, la repaciĝon kaj la mediaciadon.

6) Ne toleru ironiajn, malestimajn aŭ suspektemajn rimarkojn pri alilandanoj. Nepras lerni aŭskulti ilin por ekkoni ilian kulturon kaj la kontribuon, kiun ĉiu persono aŭ nacio povas doni al la komunumo.

7) Intensigu la lernadon de lingvoj ; zorgu, ke la infanoj eklernu vivantajn lingvojn. Respektu la lingvojn de la minoritatoj. Vojaĝante ne forgesu, ke via lando estos taksita laŭ via konduto.

8) Memoru, ke la religia maltoleremo estigis kelkajn militojn el la plej teruraj. Per kompara studado de la religioj respektu la diversajn kredojn.

9) Evitu la stereotipojn, kiuj kontribuas por malakcepti la alian aŭ por servi proprajn interesojn, kiuj ne atentas pri la homaj elementaj bezonoj. Strebu al trankvilaj kaj justaj juĝagadoj ; kuraĝigu kaj defendu la liberecon de penso kaj de opinio, kaj subtenu la sendependajn amaskomunikilojn. Zorgu, ke la antaŭjuĝoj kaj la maljustaĵoj estu forigitaj en la lernolibroj.

10) Respektu viajn apudulojn sen laŭdegi vian landon. Kiam vi vojaĝas, klopodu doni pri ĝi pozitivan bildon.

11) Ĉiam estu pretaj por kunlabori cele al la socia kaj ekonomia evoluado de la virinoj kaj aldoni en ĝin spiriton de solidareco. Luktu por la respekto de la infanaj rajtoj kaj por la protektado de infanoj.

12) Respektu la medion, la naturon kaj la bestspeciojn en malapero.

13) Kia ajn estu iun tagon via situacio, klopodu solvi akordiĝeme la malkonsentojn, kiuj povus naskiĝi ĉirkaŭ vi.

14) Per viaj pensoj kaj viaj agoj klopodu kunagi por la elradikigo de la psikologiaj kialoj de la milito : timo, nescio kaj monavido. Engaĝiĝu favore al la morala kaj materia malarmado.

**2017-03-08**

- **Lingvo por idealistoj**

en Yaffe


Publicita la 11an de januaro 2017

4

**La profesorino Esther Schor rigardas novmaniere Esperanton, inventita por unuigi la mondon**



La profesorino Esther Schor legas Retorikon, la libron en Esperanto de la advokato kaj klerulo Ivo lapenna
*Peter Murphy*



*Jon Valk*

Video je titolo "Kie estas via nazo?" prezentas etan knabon montrante per sia fingro la lokon kie estas sia nazo.

Alia video ĉerpita el You Tube, montras ion rimarkindan: usonan infanon fariĝanta denaska parolanto de Esperanto, lingvo inventita 130 jarojn antaŭe de hebrea-pola okulista medicinisto je misio idealista por repari la rompiĝintan mondon.


Foje ĉirkaŭbrakita kaj mokita, persekvita kaj ignorita, Esperanto obstine survivis kaj hodiaŭ ĝi estas parolata de internacia komunumo kies membroj estimiĝas je nombro ekde dekmiloj ĝis du milionoj. La esperantistoj malfermas siajn hejmojn al la vojaĝantoj esperanto- parolantaj kaj miksiĝas en kunvenoj kie ili survestas sin verdkolore, kantas la himnon de Esperanto ("La Espero"), aĉetas tradukaĵojn en Esperanto pri sekso kaj de Ŝekspiro, kaj kundividas la nutraĵon kaj kulturojn de siaj naskiĝlandoj. Kaj kelkaj el ili estas denaskuloj, t.e. infanoj aŭ genepoj denaske parolantaj en Esperanto.

" Vi estas en ĉambro kie kelkiu venas el Nepalo kaj alia el Kubo kaj kelkiu el Ĉinio kaj kelkiu el Japanio kaj kelkiu el Indonezio, kaj ĉiuj ili parolas Esperante kaj trinkas mojitos," diras la profesorino de la angla de Princeton Esther Schor, kies libro kun historiaj memoraĵoj, "Bridge of Words" (La ponto de la Vortoj): Esperanto kaj la Sonĝo pri Universala Lingvo, estas la lasta aperinta. "Estas kvazaŭ speco de fascina sento".

Esperanto estis ideo de Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917), naskita en la multlingva urbo de Bjalistoko, en la ruse kontrolita Pollando, kie la hebreoj, poloj, germanoj kaj rusoj vivis en reciproka malamikeco. Ekde la infanaĝaj jaroj, Zamenhof, je lingvistika talento, revis pri la invento de nova lingvo kiu servus kiel ponto por la etnaj kaj naciaj diferencoj- ne anstataŭante la denaskajn lingvojn, sed fariĝante dua universala kundividebla kingvo por ĉiuj mondaj popoloj.

La projekto ne estis tiel donĥiĥoteska kiel ĝi sonas, diras la profesoro de historio en Princeton, Michael D. Gordin, kies libro el jaro 2016 Scientific Babel (La Scienca Babelo) ekzaminas kiamaniere la angla forpuŝas la antaŭenintojn kiel la latina, la franca, la germana, la rusa, por iĝi la unua lingvo de la sciencaj publikaĵoj. En la tempo kiam Zamenhof evoluigis siajn ideojn, la sciencistoj estis dediĉinta pli da atento al la fakto ke  la gravaj malkovraĵoj povus pli evidentiĝi se la esploristoj povus kompreni la lingvojn per kiuj estis publicitaj tiuj malkovraĵoj. Neŭtrala, "konstruita lingvo", kiu povus " mallonge cirkli la eŭropajn naciojn" kiuj ĉevalkuras por lingva dominanteco, ŝajnas  plenumebla solvo.

" Tio ne estis aro de stranguloj", diras Gordin. "Tio estis ĉiam marĝina movado, sed serioza movado, kiun entreprenis seriozaj homoj. Ĝi estis grava, kiel la esperantistoj diras".



La inventinto de Esperanto Ludoviko Lazaro Zamenhof, kiu publikigis sian novan lingvon en la jaro 1887.
*Bettmann/Getty Images*

En la jaro 1887 Zamenhof- ekde tiam trejnita oftalmologo kiu praktikis en la sino de malriĉiĝintaj hebreaj civitanoj de Varsovio- publikigis sian novan lingvon en pamfleto eldonita en la rusa sub la kromnomo "Doktoro Zamenhofo". La fundamenta dokumento , kiun la esperantistoj nomas la Unua Libro, elvolvis 16 fundamentajn principojn kaj listigis 900 prefiksojn, sufiksojn akj vortradikojn, sed tio lasis la plejmulton de la vortaro- konstruo al la uzantoj de la lingvo.

Por igi sian novan lingvon facila por lerni, Zamenhof eliminis la malregulajn verbojn kaj arbitrare ĝenrajn nomojn, kiuj embarasigas la lernantojn. La esperanto radikoj estas ĉerpitaj el la germana, angla, rusa kaj speciale el romanĉaj lingvoj; la plejmulto de ĝiaj konjunktivoj kaj partikuloj venas de la latina kaj la greka. Ĉiu singulara nomo finiĝas per "o", ĉiu plurala nomo finiĝas per "oj", ĉiu adjektivo finiĝas per "a" kaj ĉiu adverbo finiĝas per "e". Multaj komunaj adjektivoj kiel 'bona' povas transformiĝi al siaj maloj aldonante la prefikson mal- (malbona), duonigante la vortaron, kiun la lernantoj devas parkerizi. Novaj vortoj estas inventitaj interpremante kune la radikojn kaj afiksojn.

La parolata Esperanto sonas iomete kiel la itala spruĉita per la slava, kaj kun sen etneca aŭ nacia komunumo por insisti sur ricevita prononco, ĉiu parolanto investas la lingvon kun individua akcento derivita de ĝia denaska propra lango. La skribita Esperanto ŝajnas duonfamiliara al angla parolanto, eĉ por iu kun ne anticipa kono de la lingvo.

Por Luke Massa, grava filozofo de Princeton, kiu nun laboras kiel inĝeniero de softvaroj, kiu volis sekretan lingvon en kiun li povus paroli kun amiko en sia mezlernejo de suburbo de

Filadelfio, Esperanto ŝajnis al li la perfekta elekto. Post kvar monatoj da perreta studado kaj konversaciado, ambaŭ amikoj estis pli kapablaj en Esperanto ol en la germana, kiun ili estis studintaj kvar jarojn en la lernejo, Massa diras.

Kiel rimedo por kovri la koridorajn onidiraĵojn, Esperanto disfalis. " Ĝi envere disfalis kiel sekreta lingvo, ĉar en ĝi estas tiel multe da vortoj konataj por la anglo kaj por la franco," Massa diras. "La homoj povas kompreni ĝin."

Vivante en la sino de interetnaj tensioj antaŭ la dudeka jarcento en Orienta Eŭropo, Zamenhof difinis al sia projekto celojn, kiuj baldaŭ estus konotaj per sia kromnomo. "Li revis pri lingvo kiel ilo por konstrui ion, kion li ne havis" diras Carolyn Biltoft, Ph.D. pri historio en Princeton, kies estonta libro pri la intermilita Ligo de Nacioj inkludas ĉapitron pri la lingva reformo kaj lingvakreada movado. "Li pensas ke la lingvo povus esti ilo por akiri transliman bonkomprenon de enpaca komunumo."

Dum la jardekoj post la publikiĝo de la Unua Libro, Esperanto akiris adherantojn kaj suferis kreskantajn penojn. La hebreeco de Zamenhof forpuŝis kelkajn fruajn esperantistojn, speciale post kiam li kodigis sian universalan vizion al religieca filozofio, eventuale nomata Homaranismo, bazita sur etikaj instruoj de la hebrea saĝulo Hillel. En la jaro 1907 Esperanto kunfrontiĝis ĝian plej signifan defion, kiam konferenco aranĝita por selekti internacian helplingvon deinter dudekkvar pretendantoj. pasigintaj la gvidan konkuradon, Esperanton de Zamenhof, favore al reformita Esperanto konata kiel Ido. En la rezultinta laŭtkverelo, probable kvarono de la gvidantoj de Esperanto, sed nur eta elcento de ordinaraj uzantoj, aliĝis al la nova lingvo kiu naskiĝis malpli ol dek jarojn antaŭe.

Dum la eŭropa nacionalismo kondukis al la monda milito kaj revolucio, la Esperanto utopiismo frekvente inspirigis malamikecon, elmontras tion la libro de Schor. (Historia movado de Esperanto, estonte en la angla estas titolita La Danĝera Lingvo). La esperantistoj- kiuj kiel Gordin montras- estis ofte envolvitaj en aliaj formoj de socia kaj politika aktivivado, ekde vegetaranismo al pacifismo- ili estis persekvitaj de Stalin kaj de nazioj; tri plenkreskulaj gefiloj de Zamenhof mortis dum holokausto. La klopodoj por igi Esperanton unu el la oficialaj lingvoj de la Ligo de Nacioj komencis. Dum la disputo de la jaro 1922 brazila delegito nomis Esperanton lingvo de "vagabondoj kaj komunistoj".

En la momentoj kiam la registaroj estis poziciigante la lingvon kiel ilo de propagando kaj militafero, Esperanto strebis "subfosi la strukturojn de la ŝtatpotenco, fiksitaj en la lingvo", diras Biltoft, asista profesoro de la internacia historio ĉe Graduate Institute of International and Development Studies en Genevo.

"Tio moviĝas kontraŭ la celoj de la potencaj fontoj, kiuj estas kreskiĝantaj uzante la konunikteknologiojn kaj la standardizitajn lingvojn per perfortaj manieroj por firmigi la potencon".

En la Orienta Eŭropo de post la Dua Mondmilito, la ĉirkaŭbrakiĝo de Esperanto provizis vojon por la disidentoj por forĝi la rilatojn kun la Okcidento, pere de esperantistoj kaj ties organizaĵoj kaj por esprimi "kvietan rezistadon" al iliaj reĝimoj, Schor diras. Sed Gordin notas ke kelkaj komunismaj reĝimoj ankaŭ promociis aktive Esperanton, rigardante ĝin kiel rimedo por ilia popolo komuniki kun la aliaj ene de Orienta bloko. La esperantistoj ŝatas portretizi sin kiel

batalpretigitaj disidentoj, "ĉar tio donas specon de heroismo al la historio", diras ŝi. "Kaj estas multe da heroismo sen la bezono de rezonado".

Kia ajn estu la eŭropa situacio, almenaŭ unu institucio de la Malvarma Milito, certe estas asociinta Esperanton kun la komunismo: la usona armeo, kiu uzis Esperanton kiel lingvo de fikcia malamiko konata kiel "agresanto" dum la trejnigaj ekzercadoj de 1947 ĝis 1967. "Sur la Zamenhofa lingvo de paco, egaleco kaj monda harmonio, la armeo projekciis ĝian teroron kaj abomenon de la komunista agreso", diras Schor. (Ironie, dum la sama periodo, la usona esperantista movado estis retirita pro la klopodoj de McCarthy por senmaskigi la supozitajn komunistajn enfiltritulojn).

Kvankam la esperantistoj ŝatas pensi pri si kiel politike neŭtralaj, la lingva kontraŭkultura atako estas politike signifoplena, argumentas Schor. Esperanto "simbolizis alternativon al la donita lingvo kaj certe alternativon al totalismo, alternativon al la subpremado, al fanatikeco kaj al milito", diras ŝi. "Ĝi ne estas partia sed mi pensas ke ĝi estas profunde fiksita en la politika naturo de la humanaj estaĵoj".

En sia opoziciema naturo, Esperanto diferencas radikece disde la angla, kiu hodiaŭ servas kiel de facto internacia lingvo, plenumanta kelkajn funkciojn kiujn Zamenhof antaŭvidis por Esperanto. La angla, kiu estas disvastigita tra la tuta globo pere de imperia forto de Britio kaj la ekonomiaj muskloj de Usono, apenaŭ estas ilo paca, neŭtrala kiun Zamenhof estas imaginta, diras Schor.

"Estas potenca historio malantaŭ ĝi, kaj tion evitas Esperanto", diras Schor. "Esperanto ne estas lingvo promociita de potenco. Ĝi estas lingvo promociita de konvinko, de amo, de idealismo".

Kiel mezlernejano en Hindujo, Avaneesh Narla, estis allogita al Esperanto parte pro ties enuiĝo en la postkolonia insistado de la lingvo de la britaj koloniistoj. "Mi malamis la fakton ke ĉiu estis lernante la anglan", diris Narla, nun fizikisto elstara kiu parolas ses lingvojn sed diras ke li ankoraŭ ne posedas Esperanton, la sepan lingvon sian. "Kial ni ne povas lerni ĝuste Esperanton? Mi ŝatis multe la ideon".


En angle centrigita mondo, la denaskaj parolantoj ne havas konkurantojn inter tiuj, kiuj lernis la anglan pli poste- tio estas signifoplena malkonveneco kio molestas Alice Frederick, antropologiston elstaran el Texas verkanta sian doktoriĝan tezon pri la moderna esperantista komunumo. "Tio kion mi ŝatas ĉe Esperanto estas la fakto ke ĝi senigas min de privilegio kiel denaska angloparolanto", diras Frederick, kiu lernis la lingvon cele partopreni la esperanto konferencojn kaj konsultiĝi ĉe la arĥivoj de Universala Esperanto- Asocio bazita en Nederlando. "Tio similis kvazaŭ la tabloj subite malfermiĝis al mi. Mi estis devigita lerni ĉi tiun lingvon se mi volus eniri en la komunumon, kaj mi neniam havis tiun sperton antaŭe'.

La fakto ke virtuale ĉiuj esperanto parolantoj startas kiel lernokursanoj en mezlernejoj- la denaskuloj restas kiel eta malplimulto, nombrante eble 1000 homojn, estimas Gordin- tio helpis por forĝi esperantistojn en amikeca, bonvena komunumo. Dum jardekoj, esperantistoj tenadis la Pasportan Servon, nomlisto de esperanto parolantoj en la tuta mondo, dezirantaj gastigi esperantistojn dum unu-du tranoktoj. Massa, diplomita en Princeton en la jaro 2013, neniam uzis la servon, sed kiam li vojaĝas ,li surmetas esperanto signon- stelo verdan kvinpintan- por anonci sin al iu ajn esperantisto, kiun li povus renkonti (kvankam la probablo estas malgranda). "Ĝi

estas por mi ia rememorigilo pri tio, kion mi pensas pri la lingvoj kaj la vojaĝoj tra la mondo", diras Massa.

Schor aliĝis al la esperanto komunumo en la jaroj 2007-2008, ne longe post publikigo de biografio de poeto hebrea-usona el XIX jc, Emma Lazarus. Dum ŝi kalkulis pri nova projekto, ŝi prikonsideris "aliajn hebreojn kiuj estis pensante ekster la kesto" kaj rememoris pri Zamenhof.

Dum ŝia esplorado Schor engaĝiĝis en trisemajna intensa esperanto lernokurso en San Diego; partoprenis en esperanto konferencoj en Turkio, Vjetnamio, Kubo kaj Pollando; trafoliumis hungaro-esperantan seksan gvidilon; vizitis lernejon kaj loĝis en hejmo de esperantistoj en brazila kamparo; pasigis babilan tagon en Uzbekistano kun la direktoro esperanto parolanta de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidereco de Samarkando.




Poŝtkarto montranta la espoeranto alfabeton, ca, 1900
*Photo12/UIG via Getty Images*

"La Zamenhofa vera akrevideco, mi pensas, ne estas la lingvo mem, sed la fakto ke vi ne povas havi lingvon sen parolanta komunumo". diras Gordin, la profesoro de historio de Princeton. "Konstruante la lingvon li ankaŭ konstruis la komunumon de la parolantoj".

Kaj por la legantoj: Zamenhof mem tradukis Hamleton kaj La Hebrean Biblion al Esperanto, kaj hodiaŭ estas eble legi la esperanto versiojn de ĉio ekde La Infero de Dante ĝis La Mastro de Ringoj de Tolkien, same la originalajn verkojn en la prozo kaj poezio. Schor, mem poeto publikigita, provis traduki Elizabeth Bishop al esperanto (verdikto: ne facila).

En la reto hodiaŭ oni povas lerni esperanton senpage tra la retpaĝo lernu! (www.lernu.net) kiu raportas 200 000 registritajn uzantojn, aŭ per la helpo de lingvolernada app Duolingvo, kiu estas

serĉata de 569 000 studentoj de esperanto. Esperantistoj povas ĉerpi informaĵojn en Vikipedio, renkontiĝi rete en la forumoj por diskuti por proprigi plej bone esperanton per iloj kiel "smartphone" kaj "flash drive", aŭ viziti You Tube por spekti klipojn de Esperanto rok bandoj kaj la plenlongan version de unu el la filmoj malmultaj enmonde en Esperanto, Inkubo, hororfilmo el la jaro 1966, kie ludas stelulo TrekWilliam Shatner.

Malgraŭ la florantan kulturon, tamen, Esperanto estas alfrontinta multan miskomprenon kaj mokadon. En la jaro 1908, Theodore W. Hunt, la unua prezidanto de la Princetona Anglalingva Departmento, diris al la ariĝintaj homoj de la Modern Language Association (Asocio de Moderna Lingvo) ke la konstruitaj lingvoj kiel Esperanto 'neniam povas leviĝi ĝis la rango de la lingvo, kiel la esprimo de la penso ĝis plej alta pinto." (Almenaŭ unu el la kolegoj liaj en Princeton malkonsentis: Kelkaj jaroj pli frue, la pensiiĝinta profesoro de biologio, George Macloskie, tradukis la Evangelion de Mateo al Esperanto). Jarcenton pli poste, invitito de la malfruaj noktohoroj de TV, Stephen Colbert, partoprenis la elsendon de Comic - Com 2014, vestite kiel Princo Hawkcat, supozeble stelulo de "de la plej populara humana- animala fantazio hibrida ekskluziviteco, publikigita iam ajn"- atendu ĝin- "en Esperanto".

Pli frue, ĉijare, Frederick, elstara antropologisto, ege neatendite rabiiĝis, kiam unu profesoro ŝerce komparis Esperanton al Klingon, lingvo de la eskterteraj estaĵoj en Star Trek- lingvo inventita por servi al la celoj de komercema amuzado, ne utopia idealismo. "Mi volis imediate eksalti", diras Frederick. "Mi tenis mian buŝon fermita, sed tio batis min kvazaŭ io, kion esperantistoj povus nomi maldigneco."



Schor (la fronta vico, la dua de maldekstre) kun la esperantistoj Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, kunestroj de la farmo- lernejo kaj infandomo Bona Espero, en la brazila kamparo, kun la oficistaro kaj infanoj
*Courtesy Esther Schor*

De tempo al tempo, Massa estis devigita defendi Esperanton de kriticismo aŭ mokado fare de junaj studentoj, kiuj malestimis la surtavolitan per nutraĵoj esperanto tablon, kiun li fondis en la Rockfelera Kolegio. Esperanto estas "la kozo pri kio mi estas la plej neracia en mia vivo", diras Massa. "Mi defendos ĝin porĉiame, kaj mi scias ke mi estas preta fari tion senhezite".

Esperanto allogas parte malestimon pro mem la naturo de la projekto. "Ekzistas stulta opinio ke ĉar ĝi estas inventita lingvo, ĝi ne povas esti reala", diras David Bellos, profesoro en la

departmentoj de la kompara  literaturo kaj franca kaj itala, kiu aranĝis tagajn esperanto-kursojn por la Princetonaj studentoj, instruataj de li dum ses semajnoj en seminario pri multilingvismo, okazinta en Genevo, somere 2014. " Se vi ne plu pensas pri tio, la plej multaj lingvoj  estas inventitaj tiel vidpunkte. Kiam ili estis inventitaj, ne estas grava ĉu ili fariĝus por servi al iuj funkcioj "kiujn vi volas ke lingvo servu".

La idealismo plej grava de Esperanto same sin alfrontas al la atakoj plej cinikaj de nocio ĉirkaŭbrakita tutkore de Zamenhof pri la Interna Ideo, plej alta celo al kiu lia lingvo estis dediĉita, kaj eĉ hodiaŭ, la esperantistoj nomas unu la alian Samideanoj."

Kion reprezentas tiu ideo ĝenerale, oni ne povas kompreni tuj. Kun la paso de jaroj, la sugestoj de la kleruloj, movadaj gvidantoj, kaj la ordinaraj esperantistoj estas inkludintaj ne nur Horanismon de Zamenhof, sed ankaŭ la pacon, socian justecon, lingvan justecon, interetnan harmonion, antinaciismon kaj antifaŝismon. Ne dubindas ke la esperantistoj povas ĉirkaŭbraki iun ajn internan ideon ĝenerale. "Eblas aliri Esperanton kaj uzi ĝin sen sentante ke vi devas fariĝi vagabondo, longhara, paculo vestite per sandaloj", diras Bellos. "Temas pri tio, kiel vi povas faciligi la malfacilaĵojn de la mondo, havante interlingvon komunan".

Narla, instruante Esperanton en etaj klasoj de la lokaj mezlernejoj kaj al la studentoj de Princeton dum la vintra sezono, kredas ke la estonto de Esperanto povas certiĝi pro sia utileco kiel ilo por promocii la posedon de dua lingvo. En Britio, eta programo nomata Springboard to Languages (Salttabulo al lingvoj) pretendas ke la infanoj de lerneja aĝo, kiuj ekposedas unue travideblan Esperanton, regulan gramatikon, akiras konojn kaj strukturajn bazojn, bezonataj  de ili por trakti pli komplikajn lingvojn- tutsimile kiel kelkiu, lerninta fluton pretigas sin por ludi ankaŭ per pli komplikitaj muzikiloj. " La franca en la klasĉambro estas fagoto". La kreinto de Springboard, Tim Morley, argumentas en iu konversacio TEDx talk en 2012 "Esperanto estas fluto".

Tiaj modestaj streboj ŝajnas foraj de la vizio de Zamenhof pri la Finavenko- esperanto parolanta mondo. Ĉi tagojn, lia ambicio ŝajnas pli fora ol iam ajn, kaj estigante tion, se estas ebla, povus eĉ fariĝi dezirinda, sugestas Frederick, antropologisto elstara. " Esperanto estas speco de ligilo ĉimaniere", diras ŝi. "Ĝi volas fariĝi  la dua lingvo por la mondo, sed por ke faru tion, ĝi devus fariĝi tiel granda kiel la popolo sentu tion kiel devigo por lerni ĝin, se ili ne farus tion, ili perdus ĝin. Esperanto devus investiĝi kun tia forto, kion ĝi evitas havi. Ĝi povus deziri fariĝu kiel la angla, sed mi pensas ke ĝi povus perdi kelke da parto de ĝi mem, se ĝi farus tion".

En iu ajn kazo, diras Schor, la esperantistoj ne plu kredas al tiu aspekto de la revo de Zamenhof. "Finvenkismo finiĝis, ne plu ekzistas" diras ŝi. "Neniu pensas ke tio okazos".

Ne tiel rapide, diras Bellos, ŝia kolego en Princeton. Nuntempe, la angla estas firme protektata kiel internacia lingvo, li diras, sed iamtempe, tia estis ankaŭ la sumera, la antikva greka, la latina kaj la franca.

"Dum la kurso de la homa historio, neniu centra lingvo restis centra dum pli pl kelkaj jarcentoj". Bellos diras, "Io ŝanĝiĝis iutage. Esperanto estas projekto perfekte rezonebla kaj la popolo povas veni al ĝi. Mi pensas ke ĝi estas komplete antaumature diri ke ĝi estas perdinta la barkon".

Deborah Yaffe estas sendependa verkisto bazita sur Princetona Vojkruciĝo, la plej malfrua libro de N.J. Her estas Among the Janeites: A Jorney Through the World of Jane Austen Fandom.

**VIDEO:** Bridge of Words: Esperanto and the Dream of a Universal Language, by Esther Schor

*Courtesy Henry Holt*

Enesperantigis Bardhyl Selimi

- **La postkomunisma Albanio**

Post 46 jara da totalisma reĝimo, ankaŭ Albanio komencis la eraon de politika pluralismo aŭ demokrateca reĝimo, komence de 1990 jaroj. La komunista partio (nomata Partio de Laboro) pli kaj pli cedis al novaj reformoj ekonomiaj kaj politikaj.



Tirana- La placo Avni Rustemi

Fine de printempo 1990, la ŝtato komencis la liveradon de pasportoj por siaj civitanoj. Antaŭe, la pasportojn provizorajn ricevis nur tiuj civitanoj senditaj eksterlande pro diversaj ekonomiaj, artismaj, sportaj aŭ edukaj aferoj. Oni ne rajtis eĉ elekti la loĝlokon enlande, ankaŭ la laborejon. la lando similis al granda getoo, tro izolita disde la cetera mondo.

Tiutempe oni lanĉis la leĝon kiu permesis la refunkciadon kaj praktikadon de religiaj institucioj, kiuj ekde 1967 jaro estis malpermesitaj, detruitaj aŭ fermitaj, Laŭ konstitucio de la jaro 1976 Albanio sin deklaris atesita ŝtato!

Plue, la ŝtato nuligis la leĝon laŭ kiu oni kondamnis de 10 jaroj da enprizoniĝo ĝis morto pro "agitado kaj propagando antikomunista", same oni ne plu konsideris la kaŝan transpason de la landlimo kiel perfidaĵo al patrio.

Fine de 1990 jaro, la komunista partio permesis la fondiĝon de aliaj politikaj partioj kaj sendependaj neregistaraj organizaĵoj. Tio notis la inicon de pluralisma sistemo ankaŭ en nia lando.

Albanio petis membriĝon al Organizo Eŭropa por Sekureco kaj Kunlaboro (OSCE).

Martofine 1991, oni organizis ĝeneralajn balotojn kie komunistoj akiris plimulton, sed demokratoj venkis en ĉefaj urboj. Kompreneble la longjara regado influis ankaŭ la homan psikon aparte en la kamparo, kie ankoraŭ oni ne imagis la novan sociordon. Post kelkaj monatoj,

ĝeneralaj strikoj de laboristoj devigis la registaron fali kaj la prezidento komunista dekretis teknikan registaron ĝis la novaj eksterordinaraj balotoj plejbaldaŭe.

La seniluziiĝo de popolamasoj post la malvenko en marto 1991, sed plejprobable ankaŭ mem la ŝtato kondukis al amasa elmigrado al la najbaraj landoj, Grekio kaj Italio. Ordinaraj laboristoj kaj kamparanoj sed ankaŭ intelektuloj, precipe junaĝaj, transpasis la landlimon kun Grekio aŭ la maron, je dimensioj bibliaj. Ĉirkaŭ unu triono de la tuta loĝantaro! Ne pro milito, sed pro ekonomia stato postlasita de la komunisma reĝimo.

Reorganizite, demokratoj venkis en la novaj balotoj marte 1992. La nova registaro alfrontis grandegajn problemojn: ekonomie la lando estis en kolapso; la leĝaro ankoraŭ totalisma, la homoj senesperaj.

Inter la unuaj decidoj estis:

- unuafoje albanoj en la urboj fariĝis domposedantoj, dum la kamparanoj terposedantoj. Dum komunismo la plimulto de urbanoj loĝis en luitaj domoj de la ŝtato. En la kamparo estis privataj la domoj, sed ne la tero. Eĉ la brutaro estis kolektiva.

- ĉiuj eksaj ŝtataj entreprenoj transpasis al civitanoj je formo de akcioj. La vendejoj privatiĝis same.

- la publika transporto, la dentista kaj apotekista servo tute privatiĝis.

- pli kaj pli, preter la ŝtataj lernejoj kaj hospitaloj, stariĝis ankaŭ tiuj privataj.

- oni permesis la libervolan loĝadon kaj laboradon ie ajn en la lando. Antaŭe vilaĝano ne rajtis translokiĝi en la urboj, same la urbanoj sen permeso de la ŝtato.

- tuta komerco privatiĝis, oni rajtis aĉeti kaj vendi ion ajn. La prezoj liberaliziĝis. Antaŭe malfacile troveblis multaj bezonataj aĵoj, vestoj, elektronikaĵoj, ktp.

- ĉiu albano rajtis malfermi sian bizneson. Antaŭe estis malpermesita labori propravole, hejme aŭ en propra ne ŝtata aŭ nekolektiva bizneso.

- nova leĝaro garantiis la homrajtojn kaj la funkciigon de la merkata ekonomio.

- oni konvertigis la landan valuton al fremdaj valutoj kaj permesis la fremdajn investaĵojn.

Tio donis tre rapide la unuajn pozitivajn sekvaĵojn: la merkato vigliĝis, la provizado per nutraĵoj, vestoj, servoj pliboniĝis notinde. La enlanda agrokultura produktado pliiĝis. menciindas ke albanoj alkutimiĝis al longaj vicoj por aĉeti 2 litrojn da lakto, viandon, kafon, terpomojn, fruktojn..Ĉio estis porcionigita.

La vivnivelo ĝenerala pli kaj pli altiĝis.

Sed kompreneble, unuavice profitis la eksaj komunistaj gvidantoj, kiuj antaŭe ĉekapis la ŝtatajn entreprenojn, privatigante la plejparton de ili je sia favoro, ĉar ili havis pli da sperto, rilatoj kun eksterlando, aliebleco al ekonomiaj aferoj ks. Plejprobable, tio estis ankaŭ sekvaĵo de strategio de la eksaj komunistaj partioj en Orienta Eŭropo por la enpaca transiro de komunismo al kapitalismo. Eksaj komunistoj fariĝis do unuaj kapitalistoj.

La malforta ŝtato ne kapablis sukcese kontraŭbatali la korupton, la krimojn, la neleĝan agadon, prostitucion, drogadon kaj similajn negativajn fenomenojn.

Ĝi toleris en la jaroj 1995-1996 eĉ la starigon de la tiel nomataj financaj "Ponzaj piramidoj" kiuj kolektis la monon de la malriĉaj albanoj, promesante redoni ĝin kun tre alta intereso. Kiam evidentiĝis ilia kolapso antaŭvidita, fine de 1996, eksplodis popolaj ribeloj kiuj postulis la monon de ŝtato mem. Februare-marte 1997 oni malfermis ankaŭ militistajn deponejojn kaj elprenis el ili armilojn! La ŝtato kolapsis. La prezidento alvokis Eŭropajn okcidentajn landojn por interveni. Ĉirkaŭ 6500 fremdaj soldatoj enlandiĝis Albanion kaj restis tie kelkajn monatojn por helpi al bonordigado de novaj eksterordinaraj ĝeneralaj balotoj somere 1997.

Venkis socialistoj! Ili trovis ege domaĝitan ekonomian kaj sekurecan staton. Ili aprobis pliajn liberalajn leĝojn, kiel ekzemple la starigon de privataj bankoj, la malfermon de pluraj radiotelevizaj privataj stacioj, kelkajn plibonigojn por la vivo de la malriĉaj homtavoloj kc. Dum ilia regado okazis la liberiga milito en Kosovo, la interveno de NATO kaj forigo de ĉiuj armeaj kaj policaj serbaj trupoj de tie. Albanio akceptis dum kelkaj monatoj duonmilionon da kosovaj rifuĝintoj.

Sed ankaŭ ili ne kapablis resanigi ĉion komplete, precipe ili ne subigis la koruptecon. Post ok jaroj venis al ŝtratpotenco demokratoj, ĉifoje pli maturaj kaj pli decidemaj por antaŭenigi la landon. Estis entreprenitaj kaj realigitaj multaj projektoj por aŭtoŝoseoj, domkonstruado, altiĝo de salajroj ks. Dum ilia okjara nova regado Albanio eniris en NATO-organizaĵo, albanoj akiris la rajton de libera moviĝo tra Ŝengen zono, Kosovo fariĝis sendependa ŝtato.

La socialistoj revenkis en la jaro 1913, promesinte multon sed verŝajne nekapablaj por realigi tion. La popolo iros al la normalaj ĝeneralaj balotoj junie 1917.

Bardhyl Selimi, la 10an de februaro, 2017


- Giuseppe Campolo samideano@hotmail.it


## Sicilio, Esperanto kaj civilizacio

La homa socia sistemo aktuale reflektas la kruelojn reciprokajn rilatojn, kiujn en la naturo la estaĵoj plutenas pro neceso de pluvivo, kiel individuoj aŭ specio.
Sur nia planedo, kie viva karno devas sin nutri per viva karno por pluvivi, la antikvuloj interpretis la korŝiron pro embuskoj kaj tragikajn vivfinojn, kiel volon kaj plezuron de dioj, tiom ke ili taksis necesa la teruran submetiĝon ritigi la oferbuĉadojn por igi ilin pli favoraj.

Ni, avanaj predistoj, spertaj pri kondamnado kaj absolvado, dum ni malestimas ilin kiel barbarojn, daŭrigas manĝegi laŭ la nutroĉeno. Sur ĉi tiu sfero je beleco kaj morto, amata Tero, kiu mortigas nin kaj, oni opinias, kiun ni mortigos, ni homoj, kun obstina idealismo, pensis esti kapablaj renversi tiun brutalan procezon, kiun la naturo transdonis al ni, per la paca kaj neperforta civilizacio, miskomprenante.

Longa dramo de homa genro, preterpasi brutecon! Ekde kiam ni klopodis de tio malproksimiĝi, sukcesante en tia afero nur duone, la antikvuloj, kiuj estas ankoraŭ en ni, disŝiras nian psikon. Kaj tia nia turmenta ena duvizaĝeco, speguliĝas en la mensoga demokratio, kiun ni konas.

La skizoida homo povas nur krei hipokritan demokration, kiu simple estas la absurda pretendo reglamenti tion, de kio li ne sukcesas liberiĝi: t.e. la dominado; kiu forevitas ĉian regulon, agnoskas nur si mem kaj ne estas kapabla respekti ion ajn; ĝia ĉefa instinkto estas disŝiri, tiel favorante la antikvan ordonon kun la plena kontentigo de tiu, kiu gastigas ĝin kaj sen esti interne disiĝinta, kiel male la ordinaraj homoj estas truditaj esti.
Civilizi la dominadon estis ideo genie freneza, eksperimento pri hibridigo, kiu produktis, tiun lumineskan monstron, kiu estas la kaŝita dominado.
Ĉi tiu estas la ŝlosilo por kompreni la hieraŭan kaj hodiaŭan mondojn, la militon kaj la mensogan pacon, la predistojn kaj predatajn de la verda kaj griza ĝangalo, t.e. la merkato. Kompreni la trankvilan konsciencon de tiu, kiu realigas la sisteman oferbuĉadon de la bestoj, faras genocidojn, malsatigas, konkeras, alproprigas al si, sklavigas, neniigas rajtojn, justecon kaj ĉian mizerikordon, ĝuante la ebriecon pri tio; li absolute agas laŭ la linio de la perfortaj kaj senkompataj principoj, kiuj validas ekde la Kreado; li estas preter la kontraŭdiroj, ĉar lia tuta ekzistado partoprenas en la logika – geometria, ekvilibra kaj glacia – senindulgo, kiu estas imanenta leĝo.

Ĉiuj Konstituciaj Ĉartoj validantaj koncernas la malnovan eraon de la hipokrita dominado, laŭ siaj genezo kaj enhavo. Preskaŭ ĉiuj, kiuj hodiaŭ honoras sin per titolo de kostitucijuraj spertuloj, mirige sen kritika kapablo, estas nur kleruloj pri senvalora kodo, kiu koncernas alian mondon.

La konstitucioj ne devas esti alĝustigataj aŭ ĝisdatigataj, devas esti revoluciataj, anstataŭataj; pro tio oni bezonas alispecajn pensistojn. Ĉi tiuj estontuloj, nekutimiĝintaj spertuloj pri konstitucijuro, devas havi superan vidon kaj genion, kaj ankaŭ kritikan spiriton. Tamen tio ne estas ĉio: ili devas posedi la aŭdacon de la altaj animoj, por renversi la konceptadon de la justo, fundamentojn de la vivo, nian malvastan ĉielon kaj eĉ la manieron koncepti la revolucion, kiu estas ĉefe menstipa.
Kaj eble ankaŭ ne tio estas sufiĉa: ili bezonas ankaŭ la kuraĝon je suferado.
La eksterordinara unuiĝo de menso kaj koro, kiun ni nomas homa estaĵo, ne rezignacias kaj ne povas submetiĝi al la sistema krueleco laŭnatura kaj socia; kaj ne povas perdi la aspiron al harmonio. Ĉi tia harmonio estas nomita paco sed la senco estas aliigita. Paco ne havas tian

gravan signifon, kiun oni intencas doni al ĝi. La Paco estas senmilita stato, batalpaŭzo inter batalantoj, kiuj tamen daŭrigas esti tiaj; ĝi neniel estas fina ŝanĝiĝo de menso kaj psiko; ĝi povas esti pli-malpli daŭra sed ne estas evolua fakto.
Tamen, ĉi tiu vorto, paco, nun estas preskaŭ signifomalplena; kaj la prelegistoj insiste utiligas ĝin, stultuloj ĝuas pri ĝi. Aliaj havas honton pri ĝi. Tamen, kiu ne vidas, ke vere ekzistas objekta malfacilo por interkonsenti, por ke oni ĉesigu ĉian militan staton kaj komencu vere kunlabori inter homoj, komunumoj kaj nacioj? Ĉi tie ni ne neas, ke potenculoj volas la unuigon sed ni asertas, ke ili volas la unuigon de sia imperio. Jen sur kiu rifo okazis nia fiasko.

Kie estas la diplomatia fervoro por atingi la necesajn, fundamentajn, finajn konsentojn? La diplomatio ankoraŭ nun okupiĝas pri aliancoj por plifortigi partiojn. Ne por la paco, ankaŭ se mizera.
Ekde kelkaj jaroj ni aŭskultas kaj parolas al poetoj, intencante kredi, ke ili havas pli evoluintajn perceptemajn sensojn. Vi, ho poetoj, kiuj estas voĉo de popolo, estas via la ĉefa respondeco kapti la ambiguajn horizontojn de la realo, disrompante la malhelan mantelon, kiu kovras ĉion kaj fariĝi voĉo por la popolo.

Hodiaŭ la poeto ne povas permesi al si esti simple trobadoro, provizanto de plezuro, ofte nur de sia propra plezuro. Li estas unu el tiuj, kiuj devas prepari la novan mondon. Bonvolu demandi al vi mem, kial ni apudigis la du belajn flagojn de poezio kaj Esperanto! Atentu la fakton, pri kiu milionoj da inteligentuloi en la mondo uzas sian tempon por antaŭenpuŝi la lingvon Esperanto! Ho, jes, oni diras, ke Esperanto estas favoranto de paco! Pli ĝuste ĝi estas stelo, suno radianta harmonion. Ĝi estas preta pivoto, kardana junto, diapazono por agordo de animoj.

Tamen, ni estu praktikemaj!

Ĉi tie ni novmaniere interpretas la rolon kaj agkapablon de Esperanto. Kaj Sicilio ne estas nur loko, en kiu ĉi tiuj ideo kaj iniciato naskiĝis, sed estas simbolo, signo sen konkreta teritoria limo, mensa kategorio.

Miloj da asocioj agas en la mondo por la civila, mensa kaj materia progreso. Ilia agado, ankaŭ se ĝi povas ŝajni efika, ne estas kaj ne povas esti solva pro la simpla fakto, ke tiaj meritplenaj agantoj estas nekonektaj inter si reciproke kaj krome ili ne kunlaboras, kvazaŭ ili partoprenus laŭ reĝimo de konkurenco, kiu kompreneble devus esti sinteno neakordigebla kun iliaj principoj. Ili, kiuj faras grandegajn streĉojn por la socio, kontribuas doni la senton, ke demokratio jam estas plene funkcianta, tamen sen ekfunkciigi ĝin; kaj ili estas eĉ utilaj por iuj.
Tamen ĝi estas movado taksebla je duonmiliardo da homoj. Pozitiva kaj gravega forto, kiu subtaksas sin mem. Tamen ĝi povas savi nin.

Demokratio estas ĉefe kunlaborado, kiun oni devas lerni utiligi. En la kunlaborado estas la ŝlosilo de la nura vera revolucio de ĉiu tempo: la paca civilizacio. La perfortaj revolucioj ne estas revolucioj sed la rekonfirmo, aŭ popola aŭ aristokratia, de la jam ekzistanta sistemo, primitiva, kruela kaj malhumana, fondita sur la kontraŭstaro de la aspirantoj al dominado. Per Esperanto, danke al ĝia interna idealo frateca kaj agema por la efektivigo de la afero mem, ni opinias, ke estas eble helpi la formadon de virtaj ligoj inter tiuj, kiuj agas por la civilizo, kiu estas ununura.

Ĉiuj civilizacioj, kiuj, oni diras, antaŭis la nian, kaj la nia mem, tute ne estas civilizacioj sed barbarsocioj, ni devas ekkonscii tion.

El Sicilio ekiras ĉi tiu trankvila kaj senhezita invito. Neniu proklamo pri paco, kunlaborado por paco! Harmonia civilizacio. Altranga demokratio. Se vi tion samopinias, vi estas siciliano kaj esperantisto.

La diferenciĝo de la asocioj devas esti protekta, ĉar ĝi garantias ilian sendependon kaj estas esenca agmaniero de la demokratia libero kaj evolua procezo. La izoliĝo, en kiu ili agas, povas esti baldaŭ preterita: ĉiuj asocioj en la mondo, kiuj havas samajn celojn, povos kunordigi siajn agojn. Fako de Esperantista Sicilio permesos subitan interŝanĝon de informoj, vokoj. De ĉiu ajn lando el la mondo ekiras ideo, ago, subite ili povos esti konataj ĉie, publikigataj mondskale.
La socioj, kiuj havas en si neniun esperantiston, klopodu trovi volontulon, kiu lernu ĝin (la kursoj estas senpagaj), por ke ili povu interagi kun ĉiuj aliaj. Interreta ĵurnalo en Esperanto, kiu povu esti verkata kaj utiligata en ĉiu angulo de la mondo, estos la plej libera informado neniam kreita. La sociaj problemoj kaj eblaj solvoj tie aperos.
La asocioj povos traduki ilin en la lokan lingvon kaj meti en siajn retejojn tion, kion ili konsideros utila por pli preciza disvastigo en la mondo, en kiu ili agas. Finfine la fermento de bona volo havos sian informadorganon; kaj ne estos la ĵurnaloj pri mortigo kaj perforto, skandalo kaj mensogo. La popolo devos finfine pasi ian favoran fojon de la despera kulturo al agrabla kulturo.
Esperantista Sicilio aliĝas reciproke al esperantistaj institucioj kaj al ĉiuj naciaj kaj internaciaj organizoj kun demokrataj strukturoj, kiuj antaŭenpuŝas Esperanton kaj pacon, subteneblan evoluon, ekologion respekton pri homoj, etnoj kaj ĉiuj estaĵoj, same kiel pri lingvoj kaj dialektoj. Kun tiaj institucioj kaj kun ĉiuj civilaj movadoj, kiuj klopodas antaŭenpuŝi la kulturon kaj la kulturon pri vero,
Esperantista Sicilio volas kunlabori laŭ la principo “fari kune tion, pri kio ni interkonsentas”. Ĝi estos flanke de ĉiuj institucioj, kiuj akceptas havi kiel celon la disvastigon de Esperanto. Tio en la perspektivo krei, laŭeble, unuigon de la fortoj agantaj por la civila evoluo.
La kreskanta asociismo por la subtenebla progreso, kreskanta ekologiisma movado kaj tiu, kiu petas baron al financa povo, denunciante la mastr-aĝion, devus trovi la komunumojn ĉe sia flanko por neebligi danĝeran disigon, kaŭzante kunan oportunecon en la serĉado de pli altaj civilaj ekvilibroj.
La vorto Sicilio alprenas ĉi tie idealan dimension, fariĝas simbola aparteno. Ĉie ajn vi loĝas, ĉiu homo, kiu kunpensas ĉi tiun interpreton de la sociaj ŝanĝiĝoj kaj la civilizeman rolon de Esperanto, por ni estas Siciliano.
Unuopaj inteligentuloj, asocioj, institucioj, komunumoj, proprigu al vi Esperantistan Sicilion. Ĝi naskiĝas pro ĉi tiu motivo. Ne por preni vin, sed por esti prenata.

- **La sendependa Kosovo**

La 17an de februaro 2008 la parlamento de la plej nova ŝtato de Eŭropo proklamis la sendependecon. Temas pri Kosovo, landeto najbare al Albanio, Makedonio, Serbio kaj Montenegro, parto de Okcidenta Balkanio.

Dum la Otomana Imperio Kosovo konsistigis unu el kvar albane plimulte loĝataj Vilajetoj (Provincoj) centre en Shkup (Skopje- Makedonio). La ceteraj estis tiuj de Shkodër (urbo en nordokcidenta Albanio), Manastir (Bitolje- Makedonio) kaj Janina (urbo en nordokcidenta Grekio).

Oktobre-novembre 1912 okazis du Balkanaj Militoj, la unua kontraŭ Otomanan Imperion fare de tiamaj ŝtatoj slavo-grekaj balkanaj kaj la dua inter mem tiuj ŝtatoj por aneksi teritoriojn de imperio, ĉefe albanajn. Tragika tiu milito estis aparte por la albanaj teritorioj en la vilajetoj de Shkup, Manastir kaj Janina. Armeo serba el 300 mil soldatoj invadis Kosovon kaj Serbio aneksis ĝin. La packonferneco en Parizo 1920 decidis ke Kosovo kaj aliaj teritorioj en Makedonio kaj Montenegro plurestu al la ĵus fondita "Reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj", Unua Jugoslavio. Dum Grekio aneksis teritoriojn de la vilajeto de Janina. Restis nur Albanio, agnoskita de Konferenco de Londono (1913) en nuntempaj landlimoj.

Albanoj de la Unua Jugoslavio suferis pli ol 20 jarojn pro manko de ĉiuj naciaj rajtoj, inkluzive de uzado de la lingvo en administracio kaj funkciado de albanlingvaj lernejoj. Sed aprile 1941, post kiam Germanio invadis Jugoslavion, pjejparto de Kosovo, parto de Makedonio kaj Montenegro loĝata de albanaj aŭtoktonuloj aliĝis al Albanio. Sekvis tri jaroj de kunvivado de albanoj en siaj propraj teroj.

Sed novembre 1944, post foriro de germanoj disde Kosovo, la landon reokupis ĉifoje la slavokomunistoj de TITO, unua prezidento de la Dua Jugoslavio. Sekvis pli ol duonjarcento de plua severa regado fremda kaj manko de naciaj rajtoj, kvankam ĉifoje oni permesis la albanlingvajn lernejojn kaj la uzadon de la albana en administracio.

Post la alveno en ŝtatpotenco de Slobodan Miloŝeviĉ, en la jaroj 1990, la situacio ekonomia kaj politika en Kosovo pligraviĝis, la aŭtonomeco akirita pro Kosntitucio de 1976, nuliĝis. Oni maldungis pli ol cent mil laboristojn kaj oficistojn kaj ekzercis pli severan politikan persekvadon de albanoj. Tio provokis armitan ribelon de dekmiloj da junuloj kaj la fondiĝon en la jaro 1997 de la Liberiga Armeo de Kosovo. La ŝtata terorisma serba reagis forte, murdante, enprizonigante, eĉ forpelante unu milionon da albanoj disde Kosovo je direkto de Albanio kaj Makedonio liberaj.

Unuafoje la Internacia Komunumo decidis interveni por savi tutan masakratan popolon. NATO komencis peraeran bombardadon dum ĉirkaŭ 80 tagoj kio devigis la armeon kaj policon serbajn forlasi Kosovon definitive. Anstataŭe, tie instaliĝis la trupoj de NATO kaj internacia administracio UNMIK, kiu prizorgadis la bonordigadon de ekonomio, edukado kaj aliaj aferoj. Estis promesita ke post tri jaroj oni aranĝus referendumon pri la estonta formo de reĝimo de la lando, sed tio ne okazis.

Finfine la parlamento enlanda proklamis la 17an de februaro 2008, la sendependecon kio tuj estis agnoskita de pluraj okcidenteuropaj landoj, de Usono kaj Japanio same. UNMIK estis anstataŭita de EULEX- jura kaj polica servo de EU. La registaro akiris pli aa duvereneco sed ankoraŭ

Kosovo ne povus fondi sian armeon. Serbio obstine konstraŭstaris la memstarecon de Kosovo, kion ĝi daŭre konsideras sian provincon.

Aktuale 115 membroŝtatoj de UNO agnoskas la sendependecon de Kosovo sed ankoraŭ ne Rusio, Ĉinio, Brazilo, Indonezio, Barato. El la EU landoj tion ne agnoskas ankoraŭ landoj kiuj havas problemojn kun separatismo, kiel Hispanio (kun katalunanoj), Slovakio kaj Rumanio (kun hungaroj), Grekio kaj Kiprio (kun turkoj), kvankam la kazo de Kosovo estas unika kaj ne simila al tiuj supre menciitaj landoj.

Kosovo, laŭ serboj estas "ties koro, spirito" ĉar dum Mezepoko tie formiĝis la unua serba ŝtato, kaj la unuaj serbaj preĝejoj ortodoksaj. Tio tute ne veras, ĉar Kosovo havas tre pratempan historion. La antaŭenintoj de albanoj estis iliroj, etendiĝintaj de Danubo ĝis Apenina Duoninsulo, kaj de Aŭstrio ĝis Grekio. Dardanoj, granda ilira gento, etendiĝis de Dalmatio ĝis Malgranda Azio. Ĉiuj jam aŭdis pri Dardaneloj, malvastaĵo mara ĉe Turkio kaj Trojo kiu detruiĝis en XIII jc antaŭ Kristo. Trojanoj estis dardanoj, kiuj intermilitis kun samgentoj pelazgaj antaŭgrekaj!

La ĉefa kaŭzo ke Serbio postulas Kosovon estas la riĉaĵoj subteraj kaj surteraj de tiu malgranda lando je surfaco malpli ol 11 mil kvadrataj kilometroj kaj dumiliona loĝantaro. Trepĉa, granda antikva minejo de plombo kaj aliaj karaj raraj metaloj norde, la senlimaj karborezervoj surfacaj apud Prishtina, fertila agrokultura kampo kaj aliaj resursoj allogis ĉiamtempe serbojn.





Bonŝance Kosovo, ekde jaroj, estas agnoskita de pluraj internaciaj komercaj, edukaj  kaj sportaj organizaĵoj. Rusio promesis agnoski ĝin baldaŭ, rekompence al Krimeo, kio alportos la ties membriĝon ĉe UNO kaj pluan normalan evoluiĝon de tiu plej nova ŝtato de Eŭropo, en bonegaj rilatoj kun siaj najbaroj Albanio, Makedonio kaj Montengro kaj, kial ne, ankaŭ kun Serbio, grava komerca partnero aktuala.

Bardhyl Selimi, 16an de februaro 2017

- **La Suno naskiĝas por ĉiuj**

(Artikolo sendita de Legiono de la Bona Volo, Brazilo)



Marteno Lutero

La Ĉiela Patro ĉiam pretas ree kaj ree proponi al ni oportunajn okazojn, montrante al ni senfinajn, senegalajn belaĵojn. Vidu ekzemple, ke Li sendis al ni **Jesuon**, por ke ĉi Tiu venigu al ni Sian formulon por spirita plialtiĝo (Evangelio laŭ **Johano**, 3:16 kaj 17), kiun **Marteno Lutero** (1483-1546) konsideris kiel la plej kortuŝan pecon de la Bona Mesaĝo:

*16 Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian Solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidas al Li, ne pereu, sed havu eternan vivon.*

*17 Ĉar Dio sendis Sian Filon en la mondon, ne por juĝi la mondon, sed por ke la mondo per Li estu savita.*

Tela: James Tissot (1836-1902)



Jesuon

Nu, tiu Ĉiela Decido por morala, spirita plialtiĝo de homoj rezultigos definitivan socian leviĝon de homamasoj, se ili konvinkite, do obstine, plenumos ĉi tiun instruon de la Kristo (Evangelio laŭ **Mateo**, 6:33):

— *Celu unue al la Regno de Dio kaj Lia Justeco, kaj ĉiuj materiaj aferoj estos al vi aldonataj.*

Antaŭ tia majesta vojoindiko por dia liberiĝo, kiomfoje, pro simpla bagatelaĵo, ni forgesas la malavarecon de la Patro, por ke ni ne postrestadu, kaptite de ungegoj de senscio.

### Ne ĉio finiĝis, tute ne!

Ofte Vi troviĝas en malespero kaj vi krias: *"Ĉio finiĝis! Jam nenio ekzistos!"* Tamen, la Suno briladas ekstere, la aero plu turniĝas ĉirkaŭ vi; la vivo daŭras... La Homaro obstinas, plena je espero. Homoj sin reciproke amas, ili vivas, ili faras ion... Tamen, Vi vidas kaj sentas ĉion amare, ĉar vi fariĝis aparte amara.

Sed antaŭ du mil jaroj, Jesuo admonis:

— *Se do la lumo en vi estas mallumo, kiel densa estas la mallumo!* (Evangelio laŭ **Mateo**, 6:23). [Tio estas, kiel malluma estos via sorto!]

Tamen, jarmiloj da homa Kristanismo pasis. Kaj kiam la Majstro alproksimiĝas por lumigi la mondon per Sia plena Kristanismo, por efektive sublimigi la surteran ekzistadon, malgraŭ ĉiaj kontraŭaj ŝajnoj, per rimedoj, kiujn nur Li scias, tiam Vi konjektas forrezigni?!... Ĉu vi emas "droni proksime al la plaĝo", post kiam vi jam trairis oceanojn da bataloj kaj malfacilaĵoj, kiuj ŝajne volis dronigi vin en malesperon?!

Divulgação



Papo Johano XXIII-a

En momentoj de malentuziasmiĝo, memoru ĉi tiujn diraĵojn de la karmemora **Papo Johano XXIII-a** (1881-1963), kiu per sia konata bonhumoro, diradis:

— *Mi estas ĉiam optimisma, eĉ kiam iu montras apud mi profundan malkvietiĝon koncerne la destinon de la Homaro.*

La Suno naskiĝas por ĉiuj. Ĝi ne kulpas, ke egoismo ankoraŭ regas sur la Tero. *Quousque tandem, Catilina?*

Arquivo BV



Wiston Churchill

**Winston Churchill** (1874-1965) estis ekzemplo pri obstino. Je drameca momento, kiam per potenca mano li kondukis sian "etan insulon" dum ezistado kontraŭ **Adolf Hitler** (1889-1945), lia voĉo stariĝis kontraŭ timo. Kaj la popolo fortiĝis ĉe la fera decido ne cedi fronte al nazioj. Ĉi tio jam estas parto de la Historio.

Tamen, per ĉi tiuj vortoj, kiuj trafe ilustras lian fortan decidkapablon, li ĝis nun invitas nin neniam rezigni:

*Neniam rezignu,*
*Neniam, neniam, neniam!*
*Fronte al io ajn, ĉu granda, ĉu malgranda,*
*Ĉu grava, ĉu sensignifa...*
*Neniam rezignu!*

Estas do ĝuste neniaokaze cedi fronte al defioj en la enkorpa aŭ spirita vivoj. Sed super ĉio komprenu la instruon de la Ĉiela Edukanto, same kiel Liaj Apostoloj komprenis: ĉiam insistu iom pli, kaj vi sentos, ke via saviĝo estas proksima.


Diris la Kristo:

— *Per via pacienco vi akiros viajn animojn* (Evangelio laŭ **Luko**, 21:19).

Sekve, estas oportune konservi tiun dian admonon en la koro kaj en la menso, en ĉiuj momentoj dum nia vivo. Tiel, ni iros pli kaj pli survoje al eterna feliĉo kaj gloro de Dio.

Jesuo estas forta mesaĝo de espero en tempo de grandega seniluziiĝo por multaj homoj.

## **Beletraĵoj**

### Bajram Karabolli

### Kiam mi estis dudekjara

Mi estis studento kaj revenis en la vilaĝo dum longaj someraj ferioj. Fakte la vorto "ferioj" estas envana, ĉar en la vilaĝo, ekde ties fondiĝo, oni ne sciis kio estas ja ferioj. Mia patro ordonis min iri al la urbo (Vlora) pro kelkaj aferoj kaj permesis min resti tie du-tri tagojn por plaĝi. Mi ekiris de la hejmo kaj post unu horo da piedirado, atingis la municipan centron.

Sidante sur benko inter la aŭtoŝoseo kaj la sola kafejo tie, mi atendis iun veturilon. Subite, mezaĝulo akompanata de du maskloj pli junaj, je konduto ekstreme militista kaj sovaĝa, alvenas kaj staras tujapude min. Li estis la buroa sekretario de kompartia organizaĵo de la unuiĝinta kooperativo (kolektiva agrokultura entrepreno), eksa oficiro liberigita, kiun la Partio venigis de Tirana ĉi tie por revoluciigi kaj evoluigi la vilaĝon. Pro tio li posedis senlimigitan potencon.

- Kion vi faras ĉi tie? De kie vi venas? Kien vi iras?..- li demandadis min arogantece, ne atendante respondon.

Iel ajn, mi sukcesis rediri ke mi atendis iun veturilon por iri al la urbo.

- Kial vi iras al la urbo? Ĉu vi scias kie ja estas viaj kamaradoj? Ili rikoltas la tritikon, kultivas la maizon..ili estas en la akcio, tie kie alvokas ilin la Partio kaj kamarado Enver, dum vi vagabondas. Ĉu vi scias ke viaj kamaradoj en Veitnam (diris Veitnam kaj ne Vietnam) estas oferante sian vivon en la milito kontraŭ kruelan usonan imperiismon? Fakte, vi aspektas vera pigrulo. Certe vi havas ankaŭ senvaloraĵojn en via kapo. Vi havas burĝajn opiniojn. Kaj ĉi tiu libro, kio ĝi estas?- tuj li forprenis de mia mano la libron.

Estis ĝi romano de Dumas, en la franca, kiun mi kunprenis por tralegi tiujn du-tri tagojn de mia restado en la plaĝo. Dum mi ekokupiĝis de timego, li rigardadis atenteme la libron kaj pro neebleco kompreni la skribon, demandis min kolere:
- Ĉu ĝi ne estas en la albana? Kia diabla lingvaĵo estas tio?

-Estas en la franca,- apenaŭ mi eldiris solvorte.

- Ĉu vin ne plaĉas la albana? Plaĉas vin la lingvo de burĝaro? Vi devas arestiĝi surloke. Ĉu mi vidu viajn pantalonojn?

Tiutempe, en la urboj kelkaj kuraĝaj junuloj sekvis la aktualan modon, pro tio, kaptite de grupoj de revoluciaj junuloj, ĉi lastaj disŝiris kaj disĉifis la ties pantalonojn. Sed unu el la akompanantoj, je Dia konsilo, konstatis ke miaj pantalonoj estis tute regulaj, ne laŭmodaj (kaj tiaj ili ja estis).

- Kamarado R...fakte la pantalonoj ne estas laŭburĝaj.

Tiel, tute hazarde mi eskapis de fizika perforto, tie meze de la vojo, kvankam la psikologia perforto jam estis plene okazinta.

- Kies filo vi estas?- demandis denove, kvazaŭ frenezulo, la sekretario.

Sciiginte la nomon de mia patro, li ekmorniĝis kaj diris:

- Ho, ho, via patro estis riĉulo, Sed grandanima Partio savis lin kaj ne deklaris lin "kulako". Tamen ni bone scias ke li estas nekontenta. En lia biografio estas ankoraŭ makuloj. Ankaŭ vi sekvis liajn spurojn. Sed, se vi movos la voston, Partio tuj senkapigos vin, same kiel ĝi faris kun ĉiuj malamikoj.

- "Kulako", "ne kontenta", "kun biografiaj makuloj", "reakciulo", "klasa malamiko", "burĝano", "malamika kontingento"....Dio mia, kiaj teruraj terminoj! Ili timegigas vin.

Dum mi klopodis rekonsciiĝi, mi vidis ke la sekretario foriris nervozece kaj rabiece.

Nur mi restis vundita.

Ne tre longe antaŭe, mi estis leginta la rakonton "La Pavilono nr. 6" de Ĉehovo. Mi ne estis kompreninta Gromov-on. Sed, tiujn momentetojn, mi sentiĝis plene Gromovo.

Tiel do, ekde kiam mi estis dudekjara, mia vivo komenciĝis malbeliĝi. Ekde tiam, ekmorniĝis ankaŭ la plej kara kozo mia, la patrio. Ĝin regis manpleno da krudaj homoj, sed plenpotencaj. Ili sieĝis la patrion per pikdratoj kaj la ties loĝantojn enmizerigis kaj enigis en la bunkroj.

Mi sentiĝis senpatria

Kaj tiam mi decidis fuĝi eksterlanden, foriri ju pli foren disde mia patrio, turniĝinta en prizono. Aŭ memmortiĝi. Sed, kio okazus al miaj proksimuloj, post mia foriro (tute ne gravis ĉu mi sukcesis eskapi, ĉu oni kaptus min aŭ mortigus min ĉe la landlimo)? Ilin atendus senfina kalvaro da suferaĵoj kaj persekvaĵoj. Kaj mi ne fuĝis. Nek mi memmortiĝis. Certe, mi ne estas tiom brava. Kaj, dum longaj jardekoj, mi restis meze de la perforto, persekvado kaj spirita dezertiĝo. La ignoruloj, handikapuloj, kanajloj, krueluloj estis ie ajn: super la kapo, antaŭ la okuloj, postdorse, dekstre kaj maldekstre. Ili kontroladis ĉion ĉe mi, la moviĝojn, la veston, la tondon, nutradon, parolojn, pensojn kaj sonĝojn miajn. La sovaĝa diktaturo kontrolis absolute tutan miajn estaĵon kaj vivon. Ĝi sangumis kaj amputis mian junecon, energion, talenton.. Ĝi murdis miajn amojn...Ĝi enprizonigis la pensojn, la sentojn kaj la animon.

Por savi tion, kion plurestis ĉe mi, mi decidis eskapi disde tiu sufokiga kaj mortiga realo, plonĝante en la mondon de la libroj. Tiel, mi rifuĝis ĉe la realo, plene de aero kaj lumo de Servanteso, Ŝekspiro, Balzako, Tolstojo, Puŝkino, Ĉehovo, Jesenino, Migeno, Kadare, Jakov Xoxe, Hugo, Mopasan, Stendal, Londono, Golsuorto, ka.

Tradukis Bardhyl Selimi

Anekdotoj

Juda patrino

Juna juda viro diris al sia patrino: “Panjo, mi decidis edziĝi. Pro la amuzo mi venos vespere al via hejmo kun tri miaj amikinoj kaj petos de vi diveni kiun el ili mi elektis por edzino.”

La patrino konsentis. Vespere la filo alvenis kun tri ĉarmaj fraŭlinoj. Post la manĝo li demandis: “Nu, Panjo, kiu estas mia fianĉino?”

“La rufharulino”, respondis tuj la patrino.

“Nekredeble! Kiel vi sciis tion?”

Respondis Panjo: “Ĉar mi jam ne toleras ŝin…”

Muŝo kaj Mojŝe

Kvar samideanoj ĉino, anglo, ruso kaj judo eniris la kongresejan kafejon "La Verda Sensoifejo" kaj mendis verdan teon. Baldaŭ ili ricevis po unu tason da teo kun... muŝo ene de ĉiu taso. La ĉino tuj manĝis sian muŝon kaj poste trinkis sian teon. La anglo tute rifuzis trinki sian teon. La ruso forĵetis sian muŝon kaj poste trinkis sian teon. Nun divenu kion faris la judo?

Li zorge elglasigis sian muŝon kaj... vendis ĝin al la ĉino!

## Heredaĵo

Tre riĉa usonano festis sian 95 jaran datrevenon. Li invitis al sia hejmo siajn tri plej proksimajn amikojn: katolikon, protestanton kaj judon. Ĉeestis ankaŭ lia advokato. Li anoncis al ili jene:

"Mi deziras heredigi al vi po cent milionoj da dolaroj. Sed mi havas unu kondiĉon: Dum mia enterigo ĉiu el vi devos meti en mian ĉerkon 100 mil dolarojn. Tio estos pruvo, atesto, kiu montros ke vi fidas min.

Post kelkaj monatoj li forpasis. Ĉe la tombo, sub la strikta kontrolo de la advokato, la katolika amiko enĉerkigis cent mil dolarojn kontante. Same faris la protestanto. Tiam venis la judo, elprenis de la ĉerko la ducent mil dolarojn kaj enĉerkigis anstataŭe ĉekon je la sumo de tricent mil dolaroj.

## Marĉando

Patro kaj filo, judaj komercistoj de la orienteŭropa vilaĝo, aĉetas varojn en la metropolo. La filo, vidante ke lia patro marĉandas kun la vendisto kaj akre diskutas kun li pri ĉiu groŝo, demandas:

"Paĉjo, kial vi marĉandas tiel longe? Ja mi kaj vi scias, ke vi tute ne intencas honorigi la ĉekon kiun vi donos al ili.

" Respondas la patro: "Filo, mi estas honesta homo kaj pro tio mi klopodas malgrandigi lian perdon."

## F i l o

Dum sia tuta vivo rabeno Jehoŝua estis tre pia kaj religiema, kaj tute nature post sia morto li eniris la ĉielon, kie li estis akceptita kun granda ĝojo. Sed anstataŭ ol ĝoji li eksidis, kovris sian vizaĝon per la manoj kaj rifuzis partopreni la feston. La anĝelaj penoj konvinki lin malsukcesis kaj fine li estis invitita antaŭ la trono de Dio, la Eternulo mem.

" Karulo", aŭdis la la rabeno profundan voĉon. "Estas menciite ĉe mia listo ke vi ĉiam vivis laŭ miaj ordonoj, do kial vi rifuzas feston je via honoro?"

Rabeno Jeoŝua klinis sian kapon kaj diris: "Mi ne meritas ĝin. Iel mia vivo estis fuŝita, ĉar kvankam mi ĉiam penis subiĝi al via Dekalogo, tamen mia filo forlasis nian religion kaj fariĝis kristano."

"Ankaŭ la mia!" venis simpatia profundvoĉa respondo.

Svatisto

Juda svatisto venas al la malriĉulo kaj diras:

"Mi volas aranĝi geedziĝon al via filo."

La malriĉulo respondas:

"Mi neniam enmiksiĝas en la vivon de mia filo."

La svatisto respondas:

"Sed la knabino estas la filino de la pariza milionulo Rotŝild."

La patro diras:

"Ho, en tiu okazo…"

Poste la svatisto iras al Sro Rotŝild:

"Mi havas judan edzon por via filino."

"Sed mia filino estas tro juna por geedziĝi."

"Sed tiu junulo jam estas vicprezidanto de la Monda Banko..."

"Ho, en tiu okazo…"

Fine la svatisto iras al la prezidanto de la Monda Banko.

"Mi havas por vi junan kandidaton al vicprezidanto."

"Sed mi jam havas pli da vicprezidantoj ol bezonate."

"Sed tiu junulo estas la bofilo de Rotŝild."

"Ho, en tiu okazo…

- **Humoraĵo**


Al la hejmo
Ebriulo stumbletadas al sia domo. Li haltigas unu homon.


- Pardonon! Ĉu vi scias, kie loĝas Joĉjo KOVÁCS.
- Sed vi mem estas!
- Tion ankaŭ mi scias, nur tiun ne, kie mi loĝas!


---


<u>**Matematiko**</u>

- Solvu la ekvaciojn




8=56
7=42
6=30
5=20
3= ?


= 20
= 28
= 4
= ?



+ + = 9
+ + =15
+ + =10
+ × = ?